

# NASKITAJ SUR LA RUINO OKINAVO

MIYAMOTO MASAO



IHARA Saikaku

**Kvin virinoj de amaro**

Serio Oriento-Okcidento n-ro 7

Trad. MIYAMOTO M.

Bind. 13.00 gld.

TANIZAKI Zyun'itirô

**El la vivo de Syunkin**

Serio Oriento-Okcidento n-ro 9

Trad. MIYAMOTO M.

ISIGURO T.

Bind. 14.00 gld. Broŝ. 11.00 gld.

La verkoj de la aŭtoro montras  
ian dekadencan laŭ supraĵa juĝo,  
sed efektive li celis la belon tra  
la virina korpo. Jen liaj facetoj  
montrataj per ĉi kvar pecoj.

NAKAZIMA Atusi

**La obstino**

Trad. MIYAMOTO Masao

Broŝ. 3.80 gld.

Kvar interesaj rakontoj memo-  
rigantaj pri F. Kafka aŭ E. He-  
mingway. Inter ili la plej elstara  
verko "Li Ling" parolas angoran  
barakton de ĉina generalo sur la  
sceno de Nordorienta Azio antaŭ  
2000 jaroj.

K. Kalocsay

**Lingvo stilo formo**

Tria, parte tralaborita eldono

Broŝ. 5.00 gld.


# Naskitaj sur la ruino

— Okinavo —

de

Miyamoto masao

**Librejo PIRATO**



Naskitaj sur la ruino

— Okinavo —

Originale verkita en Esperanto

© Miyamoto masao, 1976



## 1. La kaptito

— *De-te-ko-i!*

Hamada, pretervole dormetanta sub fendo de roko, levis sian kapon surprizite. La kapo forte kunbatis kun pinto de roko, tamen neniom da doloro li sentis, dum li konscie memoris, ke la kapo estis batita tre forte. Li sentis, ke sango defluas de la kapo svenige.

— *De-te-ko-i!*

La detonitaj vortoj en la japana lingvo klare venis de usona soldato, kiu sendube jam staris tuj proksime de la roko, sub kiu li sin kaŝis, kaj ĉasadis japanojn per tia krio: “Venu eksteren!”

— Hm, venis finfine. . .

Venis fine la ŝanco, kiun li longe gvatis kaj atendadis, jes, de post la komenco de la batalo sur tiu insulo Okinavo, la lasta batalejo, aŭ laŭ lia propra esprimo, la tombejo de la japana militismo. Li tuj decidis.

En la sufiĉe granda fendo sidis aŭ kaŭris du aliaj: unu ŝajne suboficiro el la mararmeo, kaj la alia. . . simpla

soldato el la armeo, samkiel li mem. Ambaŭ ekstremitis en la momento kaj levetis siajn ŝultrojn, sur kiuj la epoletoj jam ne troviĝis.

“Nu...” Li volis elbuŝigi kaj doni signon. En la sama momento la suboficiro eltiris mangrenadon de sia zono kaj volis... Jen li kaptis lian manon kaj elŝiris ĝin. Kvazaŭ atendente ĉi tiu tute senreziste cedis al li. Ŝajnis, ke ankaŭ li volis plu vivi, dum lia mano prenis la mangrenadon instinkte laŭ lia longa militista edukado, kiu instruis lin eviti kaptitecon ĉe tia okazo sed elekti propravolan sinmortigon laŭ la samurajismo. Hamada malrapide kaj zorgeme ĝin ĵetis en akvon, kiu sub iliaj piedoj alfluis tra fendoj. Jes, ili estis ĉe la suda marbordo, persekutataj de la malamikaj fortoj.

— *De-te-ko-i!*

Eĥis denove la voĉo. Hamada ekĵetis sian rigardon al ambaŭ, ke ili lin sekvu, kaj post la konstato de ilia nepra sekvo aŭ almenaŭ de la senvoleco lin deteni, li eliris el la fendo la unua.

— *Hands up!*

Tuj antaŭ li staris negra soldato elkreskinta el la tero; li aspektis giganto, ĉar Hamada por la unua fojo vidis malamikan soldaton propraokule. Antaŭ lia nazo li ekstaris kun larĝe malfermitaj gamboj sur apuda roko, kun la buŝo de la aŭtomata fusilo, multe pli mallonga ol la japana. Li senvorte levis siajn manojn.

— *Hands up!*

La usonano denove kriis al lia malantaŭo. Sen turni



sin Hamada ĵetis vortojn al la sekvantoj: “Hej, li diras, levu la manojn.”

— *You speak English?* (“Ĉu vi parolas angle?”)

Hamada apenaŭ povis kapti la frazon decifre, ĉar li longe restis fremda al la angla interparolado; kaj en tia urĝa okazo pretervole eliris el lia buŝo Esperanto: “Ne!”

— ... *Espanĉl?* (“... hispane?”)

La unuaj vortoj preterflugis lian kapon, sed nur la lasta sonis al liaj oreloj klare. Ha, li miskomprenis, ke li respondis hispane.

— *No!*

Ĉi foje li respondis angle.

La negro esprimis sur siaj ruĝetaj lipoj legeblan miron, sed li diris nenion.

Proksimiĝis renkonte al Hamada unu malgranda sendube japana ekssoldato vestita per tro malstrikta usona uniformo.

— Jam en tia stato, nin helpos nenio. Trankvile sekvu, ĉar oni neniel mortigas la kaptitojn.

Estas tute strange, ke li nun ne povas rememori liajn vortojn, dum alies vortojn li ankoraŭ nun, eĉ post tridek jaroj, povas parkeri; sed ĉi tiu viro devis paroli proksimume tiel en tiu okazo. Kaj li ricevis de Hamada la bajoneton, kiun ial ĝis tiam li portis ĉe sia talio, kaj ĝin transdonis al la negro, kiu senzorge sed kun videble sufiĉa kontento ĝin konstatis kaj ĵetis en la maron kun plaŭdeto.

— Iru!

La negro ordonis angle. Do li ekpaŝis la unua kun manoj levitaj super la kapo. Li ne povis sin returni kaj esplori, ĉu la samsortanoj sekvas lin, ĉar li ĉiam sentis, ke la buŝo de la pafilo rekte puŝus lian dorson. Sed ial li povis senti aŭ elflari, ke la aliaj du sekvas lin senreziste.

Paf! Klakis la fusilo, sekvis ŝirkrio kaj malfortaj ĝemoj tuj malantaŭ li. Ĉu iu, eble eskaponta, estis pafita? Sed li terurita ne povis returni sin kun ĉiu poro rigidiĝinta sur la tuta korpo. Li paŝis plu sur ŝtonoj grandaj kaj malgrandaj dissemnitaj sur la tuta bordo nur rekte rigardante la antaŭon. La nevoja vojeto de ŝtonoza sablo plurloke barita de koralrifoj sin etendis longe ĝis la rivero Minatogawa ĉirkaŭ unu kilometron. Dekstre ondadis kviete la glaŭka suda maro, Pacifiko, kvazaŭ apatie al la sanga batalo, kaj maldekstre krutaj rokvaĵoj, sur kiuj, se lia memoro ne perfidis, devis kuŝi landvojo laŭ tiu suda maro foje tra krutaj montetoj kaj sur klifoj.

Ĉu oni min pafos? La ideo foje kaj foje levis sian kapon, malgraŭ ke li neniam kredis demagogiojn de la japana militismo, kiu predikadis por teni sian disciplinon: ĉiu kaptito estos pafata, aŭ en la plej bona okazo estos kaŝtrita, kaj en la patrolando la milita tribunalo atendas kun morto. Okazu kio ajn! li pensis tiel, kaj ĉe tiu penso li reakiris iom da libera spiro.

Kiel jam skribite, li longe atendadis tiun ŝancon kun plena konvinko, ke la nuna imperiisma milito kondukos

Japanion al la plena cindriĝo de la lando, ke la malhoma milito devas tuj ĉesi, ke nur la plena malvenko de la japana absolutismo alportos ian feliĉon, demokration kaj liberon al la japana popolo, kaj ke li nepre devas postvivi la militon kaj vidi propraokule tiun tagon, eĉ se la tuta soldataro de la 32-a Korpuso pereos senspure ŝaŭme. Kaj li mem klopodis, eĉ se nur iomete, ne nur per vana babilado, sed per organizado de eta grupeto kontraŭmilita en sia propra trupo, kompreneble ne sen risko de eventuala mortpafo. Tamen, kiam la ŝanco lin vizitis, li estis konsternita eksteranime, kvazaŭ antaŭ bajoneto ĉe nazo, kaj en lia kapo tiel la teruriĝo perturbis antaŭ la nekonata, nekalkulita sorto, ke neniel venis al li penso pri liaj du kamaradoj, Miyata kaj Yosino, kun kiuj li dizertis el la trupo ĝuste ĉe la plej kriza momento kaj venis ĝis ĉi tie, kun implicita konsento pri kaptiĝo. Ili nestis ĉi tiun matenon aparte de li sub alia proksima rokfendo nur pro la malvasteco de trovitaj fendoj, dum ili tri ĝis tiu mateno ĉiam agis kune jam preskaŭ unu semajnon.

Nek la ardanta suno nek la ultramara suda maro nek la lazura ĉielo restis en lia vidkampo, kaj lia cerbo estis obsedita de la sama penso aŭ timo pri eventuala morto, cetere tute senbaza. . .

— *Stop!* (“Halt’!”)

La negro denove ordonis. Nur tiam li povis apenaŭ ĉirkaŭokuli. Jen aperis el grotoj, el rokfendoj, pluraj sur la subtropika insulo, soldatoj sen armilo en ĉifita

uniformo aŭ eĉ sen ĝi, civiluloj, civilulinoj kun ŝrumpa mieno kaj konsumita korpo, sed foje ankoraŭ kun kaldrono aŭ alia objekto portata sur la kapo laŭ la maniero de tiu provinco, eĉ kelkaj infanoj kun buŝo strikte fermita sed tordita por ne ekplori. Kelkaj estis bandaĝitaj sur diversaj partoj per malpurega ŝtofo aŭ io simila, sur kiu nigrenigra sango koaguliĝis. Ilin pelis kelkaj soldatoj nigraj kaj blankaj same tenantaj la aŭtomatan fusilon horizontale.

Hju — u! Ili fajfis inter si. La sibloj tranĉis la orelojn de la kaptitoj. La soldatoj usonaj saltetis simie trans roketojn kaj ŝtonojn kvazaŭ por ĉasi leporojn, laŭ la esprimo de Ernie Pyle, usona reportero falinta en tiu batalo.

La unuan fojon Hamada povis sin returni. Jen dudek aŭ tridek japanaj soldatoj staris en unu linio, kvazaŭ la plej ĝentilaj knaboj en elementa lernejo, kun sincera, timida kaj hontema mieno. Li trovis, ke tuj post li staris tiu suboficiro el la mararmeo. Hamada mallevis siajn manojn, ĉar li rimarkis, ke jam neniu tenas la manojn supre.

— Ek!

Sonis la ordono respondita per kriĉaj fajfoj. Ili denove ekiris. La soldato, kiu lin kaptis, iris flanke de la vojo, haltis plurfoje, kontrolis kaj ekiris ree, tre facile saltante per siaj botoj, sed ĉiam direktante sian fusilon al la linio. Videblis granda kontento sur lia nigra

vizaĝo.

Ili venis ĝis sablejo iom larĝa kaj ebeneta, antaŭ kiu fluis rivero, kredeble Minatogawa.

— Halt'! Turniĝu dekstren!

Ĉi foje ordonis la japano en usona uniformo, kun stranga hontanta tono. Laŭ tiu tono Hamada juĝis, ke li estis nur simpla soldato, aŭ rekruto. Ili turnis sin dekstren kaj ekstaris unulinie fronte al la maro. Antaŭ ili, kun la maro post la dorso ekstaris kelkaj usonanoj nedistingeblaj, kiu estas kiu; nur la blankaj kaj nigraj restis la kategorioj en la okuloj de Hamada. Ankaŭ pri iliaj rangoj li ne povis sciiĝi, kvankam li rimarkis sur iliaj brakoj iajn signojn.

— De nun oni priserĉos vin. Monon, kajeron kaj aliajn paperaĵojn metu antaŭ viajn piedojn!

Ĉu tiam jam estis pli ol cent kaptitoj aŭ malpli? Ili siavice metis diversaĵojn laŭ tiu ordono, sed li havis nenion por elmeti kaj restis staranta dume.

— *Hey, you...*

Proksmiĝis al li negro, trapalpis liajn poŝojn kaj trovis nenion, sed fine lia mano povis atingi lian pojnhorloĝon, kaj li kun ridetaĉoj deprenis ĝin, enmetis en sian poŝon, kaj tiel lia "Movado" dek jarojn fidele servinta al li estis perdita por ĉiam.

— *Hey you... and you... come on!* ("Hej, vi... kaj vi... venu!")

Alia blanka soldato fingromontris lin kaj lian najbaron, kaj signis per manplato ke ili sekvu lin. Nevola

rideto aperis sur la lipoj de Hamada, ĉar laŭ la japana kutimo, oni signas per manplato turnita supren por voki hundon aŭ similan, sed ĉe la okazo de homo oni ĉiam turnas la manplaton malsupren, kaj tiu de la soldato estis por hundo.

— *Hey, come on!*

Ial frostato trakuris lian spinon. Ĉu fine...? Tamen li penis teni sin aplomba kaj kun rideto malgraŭvole ekŝvebinta sekvis tiun ĉi, kiu iris antaŭen kun pafilo rimenita sur la dorso. Ili supreniris krutan vojeton al la supra vojo. Sur tiu sufiĉe larĝa vojo staris granda kamiono en nigreverde koloro. Apud ĝi ankaŭ du-tri japanoj vestitaj per usona uniformo laboradis kun statua senesprimo. Sur iliaj dorsoj li legis flave farbitajn grandajn literojn: P. W. Kio estas tiu P. W.? Li povis atingi la solvon apenaŭ de tiu vesperigo: *Prisoner of War* (militkaptito).

— *Hey, take woola!*

La soldato montris al ili sufiĉe grandajn kvadratajn ladskatolojn kun tenilo ĉe la supro, kiuj staris apud la kamiono en granda kvanto. Ĉu la ujoj servas por benzino? Li trankviliĝis, sed... kio estas tiu "woola"?

— *Woola?*

Li rediris.

— Nu, prenu tiun akvon!

Laboranta japano klarigis kvazaŭ riproĉe. Ĉu temis pri "water" (akvo)? Li prenis per la dekstra mano unu skatolon.

— Ne, prenu du! La soldato diris plu, kion liaj oreloj jam povis kapti. Do, ili ambaŭ prenis po du ambaŭmane. La skatoloj estis tro pezaj por li konsumita de longa nutromanko, ĉirkaŭkurado kaj manko de sunradioj pro la talposimila vivo dum tiuj tri monatoj.

Apenaŭ eltenante sin ili revenis al la antaŭa loko kaj spiregis post la demeto.

— *Thank you.* (“Mi dankas vin.”)

Ŝercis la soldato ilin kondukinta. Ankaŭ Hamada siaflanke volis reŝerci, sed la lia algluiĝis al lia gorgo.

Oni disdonis akvon al la kaptitoj laŭvice. Kvazaŭ ĉevalo, li sufiĉe sin regalas per la gamelo, kiun oni lasis cirkuli de mano al mano. Ho, pura akvo, al kiu li restis fremda tiom longe! Kvankam ĝi odoris iom pro desinfekta medikamento, tamen ĝi estis tre bongusta. Pli ol unu monaton li ne trinkis tian akvon, kian li prenis nun, pro la senintermita bombardado celanta al fontoj kaj putoj.

— Nu, prenu!

Eble kun tiuj vortoj alia blanka soldato elprenis el sia poŝo ĉe la sidvango skatolojn da cigaredoj, malsigelis kaj la enhavon disĵetis sur sablon antaŭ ili sporade. Ĉiu konkure sin klinis kaj laŭpove kolektis ilin sangokule, eĉ virinoj kaj infanoj ne cedis al viroj. Ili ja tro longe ne fumis. Kiuj restis nur starantaj, estis nur Hamada kaj infanetoj.

— Ĉu vi ne fumas?

Negro aldiris, sed li simple skuis sian kapon.

Kvankam li estis tiel nomata "kamentubulo", tamen tia maniero, kvazaŭ al almozulo, ne permesis al lia memfido preni la plej amatan.

La suno jam sin levis supren ĝis super iliaj kapoj. Profitante tiun paŭzon li komencis observi sian situacion. Estis tute sen dubo, ke ili nun staras apud la rivero Minatogawa, kiu enfluas la maron ĉe la loko distanca ducent metrojn for de la roko, sub kiu li estis kaptita. La ponto, kiun li transiris antaŭ du semajnoj, jam ne troviĝis. Ĉu ĝi estis forbombita? Trans la fluo sur la sablejo impone sin lokis kelkaj amfibiaj tankoj nomataj "aligatoroj" kun sia kanontubo levita cele al la okcidenta fronto, de kie ankoraŭ venas bruegoj kvazaŭ malproksima tondrego. Li rimarkis, ke difektitaj japanaj grenadjetiloj kuŝas malantaŭ li. De malproksima monto sin levis densa nigra fumo. Ĉu la monto Yaesu, kie devas posteni ŝipista regimento depelita de la maro?

Ĉirkaŭ unu horo ili restis tie, dum kaptitoj ĉiam pli kaj pli amasiĝis elpelataj de la pafilbuŝoj. Nepre jam pli ol cent. Kaj kiam la suno ekklinis sin okcidenten, ili ricevis ordonon iri en vico sur la vojon, kie anstataŭ la akvoproviza kamiono ilin atendis pluraj aŭtetoj. Nomi tiun aŭteton ĵipo, oni eksciis multe pli poste. Oni liveris ilin al la ĵipoj po dekkelko aŭ malpli, kaj la veturiloj ekkuris plej rapide tra difektitaj vojoj kaj nevojoj. Ili sin kroĉis al la flanko de la ĵipo por ke ili ne falu surteron, ĉar la tero plugita de kuglegoj ilin lulis supren



kaj malsupren. Hamada ne sciis, kiam oni apartigis civilulojn disde la soldatoj. (Oficiroj kaj soldatoj, kiuj sin miksis en la vicon de la civiluloj, estis elpinĉitaj ĉiam, eĉ post duonjaro.)

Post unuhora kurado ili atingis ian pinarbaron ne difektitan de pafoj, kio povis esti tro rara vidaĵo sur tiu parto, ĉar la tuta insulo, precipe ties sudo, estis surŝutita de kugloj, kuglegoj kaj obusoj, kiujn oni poste nombris po 700 por 1 soldato. La ĵipoj ekhaltis sinsekve senkomplete tretante kampon, sur kiu batatplantoj dissemis siajn malgrandajn florojn similajn al tiuj de konvolvuloj. Jes, ili ekfloris pro la nezorgiteco dum la batalo. Pelitaj de sur la ĵipoj ili iris sur monteton inter la pinarbaro. Tie dornodratoj jam staris kun siaj fostoj, kaj englutis la gregon.

Ankoraŭfoje ili ricevis tie akvon, kaj ankaŭ manĝo-porcion metitan en vaksita kartono.

— Ha, estas sapo!

Hamada haltis deŝiri sian porcion el la kartono ĉe la voĉo, kaj ĵetis sian rigardon al la kriinto apude sidanta. Li elpinĉis aĵon el sia buŝo kaj montris al najbaroj. Estis nenio alia ol fromaĝo, kiun tiu kampul-soldato vidis kredeble la unuan fojon en sia vivo, tamen Hamada diris nenion kaj nur voris la sian. (Tiu manĝaĵo restis ĝis la lasta momento tiel nomata, kaj ne ŝatata de kaptitoj.)

El la kartono li trovis tri cigaredojn markitajn "Phillip Morris". Li fumis kaj fumis kun granda satigo kaj sentis fortan kapdoloron, ĉar li, ne nur li sed ankaŭ

ĉiu soldato, estis dekutimigita de bonkvalita cigaredo, kaj nur foje povis ĝui “Kinsi” (Ora Milvo), sed eĉ pli, pro la manko dum la batalo: preskaŭ ĉiu ne havis eĉ tian aĉan, sed escepton faris Hamada kaj aliaj, kiuj laboris postfronte en proviantejo.

Baldaŭ oni deklaris pridemandon, kaj unu post alia kaptitoj estis kondukitaj en tendon starantan en angulo, kaj revenis kun mieno gravaspekta.

— Kio? . . . kiel? . . .

Maltrankvilaj vizaĝoj sieĝis ĉiufoje antaŭulon, dum tiu ĉi senescepte sin tenis preskaŭ avara kaj ne volis trankviligi la demandantojn, sed nur balancis sian kapon kun afektaj ĝemoj.

Post du horoj Hamada estis vokita. Ŝajne oni envokis ilin laŭnumere iel signita. En la tendo alparolis unu malaltekeska viro kun iom detonita sed klara japana lingvo. Liaj okuloj estis japane nigraj, liaj longaj haroj bone kombitaj kaj pomaditaj ankaŭ estis nigraj. Ne pasis minutoj, antaŭ ol Hamada povis konjekti, ke tiu ĉi estas unu el tiel nomataj “*nisei*” (ulo el la dua generacio de japana enmigrinto).

— La nomo?

Parte ĝentile parte arogante tiu ĉi demandis lin, kun papero liniita antaŭ si kaj kun malgranda teko ĉe la flanko.

— Mi estas nomata Hamada ikuo.

— El kiu trupo?

— El Aŭroro 16789-a Trupo.

Li respondis honeste sed intence en la kaŝnomo de la trupo. La demandanto foliumis sian paperon, kaj tuj montrante iun punkton per sia globkrajono, rediris kun afekta mildeco: “Ĉu el la 2-a Sendependa Infanteria Bataliono, la Globa 16789 nune, sed la antaŭa nomo: la 2-a Surmarimpeta Baza Bataliono?”

Hamada estis ne malmulte surprizita, ĉar lia trupo estis kaŝita en tiu nomo, kaj simplaj soldatoj foje ne konis la veran nomon de sia trupo.

— Kaj via rango?

— Unuagrada soldato.

— Kie vi loĝis?

Post kelkaj detaloj pri la trupo li demandis.

— En la gubernio Wakayama.

Ĉu? Liaj malgrandaj okuloj kun nigretaj haroj palpebrumis momente kaj li notis ion sur sia papero. Post semajnoj Hamada eksciis, ke la usona armeo aparte detale esploris kaj pridemandis tiujn, kiuj loĝis aŭ naskiĝis en la suda parto de tiu lando, por ke ili difinu sian strategion: kien surlandiĝi?

— Kaj via profesio?

— Makleristo.

Tio ne estis malvera, ĉar li, pelate ĉiam de la polico, ne povis longe resti en sama profesio kaj vole-nevole devis sin vivteni per diversaj vivrimedoj, kaj ankaŭ tiu maklerado estis unu el tiuj.

— Ĝis kia lernejo?

— Mi interrompis mian studon ĉe la unua jaro de

kolegio.

— Pro kio?

— Pro mia kontraŭmilita laboro mi estis elpelita. . .

Li respondis honeste aŭ iom fiere aŭ parade, ĉar li tiam kredis tro naive, ke la usona armeo amikas al la demokratia, pacisma tendenco ĝenerale.

— Ĉu vere?

Li kun ankoraŭ pli kreskanta intereso (ŝajnis al Hamada) enskribis. De tio sekvis ke Hamada post duonmonato estis denove alvokita al iu sekcio de la usona armeo kaj instigita fariĝi “specialisto”, tio estis usona agento en sekreta servo, se lia impresio ne perfidis lin. Kompreneble tiam li ne povis antaŭsupozi tian aferon.

Dum li rigardadis liajn tro sinjorecan konduton kaj trajtojn, en lia cerbo naskiĝis ia petolemo demandi al li: “Kiel vi opinias pri la malvenko de la patrio de viaj praavoj?” sed li detenis sin de tia tento.

Li estis liberigita kaj kuŝante sur sablo de altaĵo medidadis sola. Sur la ĉielo tondranta malproksime ŝvebis penikaj nuboj. Lia penso vagis kaj vagis al la pasinteco, al la familio, al la iamaj kamaradoj en malliberejo. . . En ĉiu okazo la milito jam finiĝis por li, kaj baldaŭ finiĝos ankaŭ por ĉiuj, kiel li atendadis, ha, tro longan tempon. Sed nun, ĉu li povos iamaniere akceli la finon al ĝi, eĉ se li ne sukcesis bari ĝin? . . . sendube neniel. . . Kaj fine lia penso fokusiĝis al du militkamaradoj, kun kiuj li dizertis. Ĉu ili povis esti bonŝancaj? . . .

ĉu ili ne estis pafitaj?... Certe tiu negra soldato pafis iun malantaŭ li kaj tiu falis brue... Li ĵetis sian rigardon al iom fora pino, sub kies ombro la suboficiro el la mararmeo gaje kaj malgaje parolis kun iu, ŝajne lia kamarado... "...mi volis min mortigi, sed iu ulo..." Probable tiu suboficiro ne rimarkis lin. Flamis granda indigno en li, sed li regis sin mem. Vidu, plej baldaŭ ci dankos min!...

La ruĝa suno eksinkis sur la maron jam purpuran.

Ili estis denove vicigitaj. Gardistoj kalkulis ilin denove kaj denove. Li multe miris, kial ili estas tiel malkapablaj pri la kalkulo. Dume la gardsoldatoj ial daŭre kalkuladis. Multe pli poste li konstatos, ke ili, usonaj soldatoj ne nur nigraj sed ankaŭ blankaj, estas tro malfortaj en la parkerkalkulado. Ĉu pro la troa progreso de la mekanismo? Ĉiuokaze ili restis tre senpacienigitaj.

La kaptitoj estis destinitaj suriri kvindekope sur kamionojn. Krom la ŝoforo-soldato ilin gardis nur unu soldato. La eskortanta negro eksidis sur la postan panelon de la kamiono, kun la pafilo malzorge tenata sur la genuo. Hamada kaŭris apud tiu ĉi kaj de plej proksime povis lin observi: la nigrega vizaĝo kvazaŭ polurita per pumiko brilegis kun ŝvitgutoj fluantaj, kaj kontrastis kun la dikaj ruĝegaj lipoj kaj blanka dentaro montrata sub la malalta nazo, sed tamen li neniel povis legi el lia mieno ian streĉon, kun kiu tiu ĉi alfrontas la

morton. Li aspektis nur bonhumora kaj eĉ afabla kvazaŭ por iri en ekskurso.

La kamionoj ekkuris kaj tuj venis sur grandan vojon. Hamada baldaŭ devis rekoni, ke ili kuras ĝuste sur la landvojo de la duoninsulo Tinen, kie lia trupo antaŭe postenis. Ha, tiu arbustejo de pandanoj nigre bruligitaj! Ha, tiu banjano ankaŭ nigrigita! En la palpebruma daŭro la intima sceno forflugis malproksimen de lia horizonto.

Krepusko falis, kiam la serpento de la kamionoj sagkuris la duoninsulon, descendis la deklivon apud la golfo Nakagusuku kaj ekascendis la vojon norden al Yonabaru, orienta havenurbeto. Ha, li estis denove mirigita. La vojo jam estis asfaltita komplete. La kaplumoj eklumigis la vojon plenklaire. En tiu lumfasko li vidis nenion, kiu baras la vojon. Sed apude sur la kampoj ruinigitaj jam plurloke staris barakoj, el kiuj elektra lumo fluis gaje kaj komforte, eĉ ia muziko sonis al liaj kurantaj oreloj. La teruro lin obsedis, ke jam en tia stato la malvenko de Japanio estas plene garantiita! Li ankoraŭfoje pripensis la talpan vivon en la nigra groto. Kia kontrasto! La negro komencis fajfi ian melodion. Li ne sciis, kiu estas tiu muziko. Estus konvene al la sceno, se li fajfus ian negran spiritkanton aŭ el Foster.

La kamionoj kuris kaj kuris kun la kaptitoj mutaj kaj diverspensantaj.

Precizan daton li ne povis rememori eĉ en la tempo de la kaptiteco. Sed eble, la 19-a aŭ 20-a de junio, 1945. Li ne sciis, ke jam en la 18-a tago de tiu monato la Plejalta Komandejo de la 32-a Korpuso deklaris sian disfalon, kaj la komandanto Usizima kaj stabestro Tyô, ambaŭ general-leŭtenantoj, finis sian vivon per la harakiro en sia groto, de kie ne malproksime Hamada estis kaptita.

## 2. Antaŭ la 15-a de aŭgusto

— Kiel fartas via bubo?

— Dankon, li fartas tre bone, kaj la via?

Tiaj familiaraj vortoj ankoraŭ ne estis reciprokataj inter kaptitoj. Por tio oni devis atendi ankoraŭ plenajn tri monatojn. Sed la koncentrejon regis nur sufoka kaj obtuza atmosfero ne nur pro la situo de la insulo sur la 32 gradoj de la norda latitudo. Ĉiu restis ĉiam malparolema, sin retiris en angulon siaplaĉe elektitan, kaj kun okuloj malbrilaj kaj malhelaj kvazaŭ de putrinta fiŝo, dronis en profunda meditado aŭ gapis nur la horizonton, de kie ankoraŭ fojfoje venis obtuza tondrado de bombardado. De kia penso la samsortanoj de Hamada restis obseditaj, li povis facile analizi, ĉar li mem ankaŭ ne povis fari escepton de ili, kvankam li pretendis sin konsekvenca kontraŭmilitisto, kaj almenaŭ intelektulo infektita de nenia militisma demagogio. Sed ŝajne liaj prizorgoj apartenis al iom diferenca kategorio, eble unuflanke pro lia ideo kaj aliflanke pro iuspeca trankvilo,



ke lia familio povos esti relative stabila, se temis pri la ekonomia afero, almenaŭ ĉe la unua periodo de la eventuala inflacio postmilita.

Laŭ la antaŭsciigita vico la enketoj pri la kaptitoj daŭris ĉiutage. Ili estis alvokitaj sinsekve en la tendon, kiu staris proksime al la pordego el kradoj kaj dornodrattoj, kaj post pridemandoj pli malpli longedaŭraj elvenis kun nova ĝemo, kvazaŭ por ŝajnigi sin pli grava persono ol aliaj.

— Kio?

— Kiel? Kion oni demandis?

Apenaŭ liberigito revenis al sia tendo, liaj kamaradoj lin bombardis per ĉiam samaj demandoj, en kiuj sin kaŝis ne simpla scivolemo, sed ankaŭ maltrankvilo propra al tiu, kiu ne konas sian sorton.

Malgraŭ la gravmiena artifiko kaj aspekto la enhavo de la demandoj estis ordinaraj tre malriĉa: oni demandis tiel kaj ĉi tiel pri la personeco, kariero aŭ antecedentoj, kaj pri la sorto de la trupo, al kiu tiu ĉi malfeliĉulo apartenis, kaj nur malofte okazis detalaj esploroj pri la topografiaj statoj, se tiu aŭ ĉi tiu naskiĝis aŭ loĝis apud suda marbordo, kien usona armeo eventuale povos surlandiĝi. La pridemandoj havis alian frukton: li poste aŭdis, ke el tiuj enketitoj malkovriĝis ne malmultaj oficiroj, kiuj havis ian dosieron sufiĉe pezan, por ke tiujn oni sendu al milita tribunalo kiel militkrimulojn, aŭ kiuj simple hontis pri sia kaptiteco spite la striktajn admonojn al la militistoj, kiuj instruis prefere mortigi sin

ol esti kaptita, donitaj de Lia Tennoa Moŝto.

En la dua tago post la kaptiĝo venis lia vico. Ankoraŭfoje li ripetis samajn respondojn pri si mem. La esploristo, persono malsama de tiu, kiu faris esploron por la unua fojo, ankaŭ estis “*nisei*”, kaj demandis lin en la japana lingvo kun monotona intonacio. Li estis kun nigraj haroj ĝentile pomaditaj, kvankam en la batalejo, kaj per tio donis al Hamada ian miron. Kiam de lia buŝo tiu ĉi konfirmis al si la protokolon ruĝkrajone markitan, ke li iam laboris kiel aktivulo en kontraŭleĝa laborista organizo, kiu volis interalie bari la agresan militon, liaj lepersimilaj okuloj ekglimetis, kaj li diris al li: “Ĉu vi ne bonvolus kunlabori kun ni, nome, por tuj ĉesigi la militon verki ian alvokon, por ke ni presu flugfoliojn disŝutotajn de sur aviadiloj?”

— Bone, mi konsentas.

Kvankam la malverva tono de la esploristo ne plaĉis al li, post momentoj li akceptis la taskon, ĉar li povis kredi, ke oni devas ĉiamaniere, eĉ se per la usona mano, kontribui por la tuja repaciĝo kaj por savi senutilajn viktimiĝojn. La “*nisei*” metis antaŭ li novan krajonon kaj paperojn kaj fiksitis la limdaton.

Kiam Hamada revenis al sia tendo, kamaradoj en la nova medio tuj rimarkis liajn skribilojn kaj alvoĉis sambuŝe: “Kiel vi enmanigis tiujn ĉi?” La novaj estis mirigaj tiel al li mem, kiel al ili suferantaj longan tempon pro la ekstrema provizmanko.

— Ha, ĉu ili? Mi deprenis de sur la tablo de la ulo.

Mensogo nature elfluis el lia buŝo, ĉar li tuj vidis, ke konfesi ĉion al ili utilos por nenio pro tio, ke la plej multaj ankoraŭ estis katenitaj de la rutina ideo, ke ili devas esti “fidelaj infanoj de Lia Tennoa Moŝto”, malgraŭ sia kaptiteco aŭ pro la komplekso de malplivaloro pli kreskigita de tio ĉi. La ideo ankoraŭ havis sufiĉe profundajn radikojn en la koro de la japanoj.

— Hm, bonege! Ni devas sekvi lin kaj peni por gajni “batalfrukton”.

De dekstre lin laŭdis marsoldato en la aĝo de ĉirkaŭ 30 jaroj, kaj kun ĉapo striita per blanka bendo, ĵetis envian rigardon sur lia mano. Al tiu kaj aliaj kolegoj Hamada senvorte alŝovis skatolon de “Lucky Strike”, kiun li malsigelis antaŭ ili, por ke ili libere prenu cigaredojn.

— Belege! Ĉu ankaŭ “batalfrukto”?

Hamada jesis kun skuata, eble fiereta, mentono. Jes, efektive li deprenis ĝin de sur flankotablo ĉe sia elteniĝo. Li ne volis plu paroli kaj eksidis en angulo.

Nun la aŭtoro devas halti ĉe tiu nova termino “batalfrukto”. La vorto kompreneble estis unu el la plej amataj fanfaraĵoj de la japana armea informejo, sed kiam ĝi eniris en koncentrejon, ĝi ŝanĝis sian aŭtentan signifon en alian, kvankam ne tiom diferenca, kaj laŭdire ĝi vivis longedaŭre, aŭ ankoraŭ nun ĝisvivas inter insulanoj, kiuj devis foje ŝtopi sian stomakon aŭ

aliajn naturajn dezirojn per tia rimedo el staploj de la okupanta usona armeo. Jes, la vorto "okupanta" ankoraŭ ne arkaismiĝis bedaŭrinde en la realo.

Post kvin tagoj en la difinita horo Hamada iris al la tendo de la esploristo kaj redonis la skribilojn senvorte.

— Por kio?

— Post ĉio mi decidis ne verki tian.

La "*nisei*" levetis siajn dikajn nigrajn brovojn, sed — malgraŭ iaspeca atendo miksitita kun trankviliĝo kaj bedaŭro de Hamada — ne volis plu persekuti lin kaj tuj liberigis lin. Hamada preta respondi al ĉia ajn demando aŭ stimulo estis iusence perfidita kaj povis forlasi la tendon.

Sur la revena vojo li plurfoje ripetis al si la saman frazon: "Estu tiel!" Kvankam ankoraŭ striis aŭ feĉis en lia koro ia domaĝsento. Nek la patriotismo nek la puritanismo baris lin kunlabori kun la usona armeo. Li volis kaj penis sin persvadi, sed interne de li io flustradis al li: "Vi mem bone konas, kio puŝis vin al tiu rifuzo." Ĉu ĝi estis latentata patriotismo heredita de la tradicio aŭ io alia? Li dubis, sed prefere li volis kategorii tion: pro la feĉo de la samurajismo. Sed oni povus ankaŭ diri, ke tio venis de lia malkonsekvenca pacismo aŭ same malkonsekvenca "batalema defetismo". Ĝi aŭ ili iam permesis lin sendi al la fronto, malgraŭ lia nemallonga rezisto kaj vana baraktado.

Ĉiuokaze Hamada faris nenion rilate al tia afero, sed notindas, ke inter kaptitoj siatempe cirkulis ia suspekto:

la usona sekreta servo sukcesis varbi almenaŭ kelkajn el tiuj verkintoj kaj aliaj usonmaniuloj por sia estonta laboro, kaj ilin sendis al Havajo por eduki ilin tie por tiu celo.

La militsituacio estis disvolvita jene laŭ la anonco de la koncentreja estraro el japanoj, kiu servis kiel megafono de la usona armea informejo.

La 18-an, de junio, la ĉefstabo de la 32-a Korpuso konstatis sian plenan malvenkon kaj deklaris, ke ĝi jam perdis sian kapablon konduki la militon, kaj ke de nun ĉiu soldato estu libera, sed penu nur por la intereso de la patrio.

La 22-an, general-leŭtenanto Usizima, la japana komandanto, harakiris en la groto en Mabuni, kie lia komandejo nestis, kaj general-leŭtenanto Tyô, la stabestro, sekvis lin en la sama metodo, sed neniu el la stabanoj: jam frue, en la komenco de majo, unu el tiuj majoro Zin, forkuris el la fronto kun preteksto peti al la Japana Ĉefstabo helpon per aviadiloj, kaj la aliaj 5 oficiroj kun simila preteksto eskapis en tiu tago de la deklaro, kaj unu el ili, kolonelo Yahara, kiu efektive gvidis la batalon en tiu insulo, post sia kaptiĝo energie kunlaboris kun la malamiko, alvokante al restantaj soldatoj tuj kapitulaci. Antaŭ dekoj da jaroj iu eŭropa novelisto verkis "La generalo mortas en sia lito", kaj nun... la staboficiroj rajtas morti en sia lito!

La 18-an, general-leŭtenanto Simon B. Buckner, la

usona komandanto, falis pro ekstervoja kuglo. La 20-an, generalo Joseph Stilwell heredis la postenon.

Pri tiaj aŭ ĉi tiaj novaĵoj oni informis laŭ la publikigo de la usona armeo, cetere ne ĉiam kronike.

Post la disfalo de la japana korpuso la nombro de novaj kaptitoj ĉiutage kreskadis, kaj de tiam dum du-tri semajnoj pli malpli 200 alfluadis en la koncentrejon. Ili renkontis scivolon kaŝitan en la flegmaj kaj kolapsaj okuloj de la antaŭuloj. Kompreneble okazis tia sceno, ke ili retrovis interne de la palisaro siajn kamaradojn, pri kies "heroa morto" oni jam trumpetis en la plej pompa maniero.

— Ĉu vi ankoraŭ tenas la vian ?

— Jes, almenaŭ ĝis nun. . .

La plej naiva el la plej naivaj demagogioj faritaj de la japana armeo estis jene: ĉiu kaptito (kaj ĉiu viro ĉe malvenko) estos kastrita kaj senigita je sia "bubo", kaj ĉiu japanino devos servi al negroj, kaj tio tre seriozan efikon havis, por ke soldatoj batalu ĝis sia lasta sango, ol sperti tian hontegon. Kaj nun per tia konversacio novaj kaj malnovaj malfeliĉuloj konstatis reciproke la sanan ekziston de la organo.

Tuj ĉe la enkoncentrejigo aperis antaŭ la malfeliĉuloj kolektive ensenditaj, viro fortike konstruita, dikmalalta, ŝajne energia, kaj en ne tiel mizera usona uniformo kiel aliaj bagateluloj, sin prezentis al ili kiel "la regimentestro", kaj kun sia ŝajngrava mieno kaj en same ŝajngrava

tono tiel kaj ĉi tiel predikis admonojn elokvente kaj ceremonie. Post tio la novicoj devis trairi homan aleon formitan de tieaj laborantoj, same kaptitoj, kiuj de ambaŭ flankoj surŝutis pulvoron blankan por desinfekto, por efike ekstermi pedikojn longedaŭre breditajn sur la korpoj, aŭ surskribis grandlitere P. W. per flava farbo sur la dorson, brakojn kaj sidvangojn de la vesto, aŭ donis al ili ĉemizon aŭ aliajn objektojn kaj se necese, pantalonon aŭ eĉ kalsonon. Poste la novicoj iris al tendo destinita, aŭ starigis novan tendon formante novan grupon, kaj preskaŭ ĉiu prenis du-tritagan "profundan dormon de ŝarko", laŭ japana esprimo.

Hamada povis renkonti siajn kamaradojn: Miyata kaj Yosino, kun kiuj li dizertis el la trupo ĉe la definitiva momento. Ili, entute 13 restintaj soldatoj en la 2-a Sendependa Infanteria Bataliono estis senditaj al la 15-a Sendependa Infanteria Regimento plej persiste eltenanta sian pozicion sur pinto de klifo oriente de Mabuni, sed du oficiroj de la bataliono kun ia preteksto ne volis partopreni en tiu lasta batalo kaj postrestis. Kaj survoje pro hazarda obuso la eta taĉmento estis disigita, kaj ili tri, Hamada, Miyata kaj Yosino, laŭ la iniciato de la unua decidis dizerti el la trupo. Kaj reale ankaŭ la aliaj siavice dizertis, tiel ke el tiuj 13 neniu iris al tiu fatala klifo. Miyata kaj Yosino estis kaptitaj samtempe kun Hamada, sed ial ili estis tenataj ĉe la unua koncentrejo en la duoninsulo Tinen, en kiu Hamada unue estis lokita dumtempe kaj pridemandita.

Ĉe la renkonto Miyata sciigis lin pri la sorto de la kamaradoj. Serĝento Nisi estis tute sana, kiam li estis kaptita, li ne eksplodigis sian mangrenadon malgraŭ ĉiutaga blufado. Hamada amare rememoris, ke li aŭdis ĉe sia ekdizerto lian voĉon vokantan malĝoje kaj senhelpe, "Hamada, . . . Hamada. . ." Li ja tiam detenis siajn du kamaradojn kaj devigis ne respondi, konsiderante, ke la akompano de la suboficiro nur ŝargos ilin. La preterpasantan voĉon de la serĝento en tiu mallumo li ankoraŭ nun povas rememori, kiel li krietis senhelpe. Ŝajnbravulo ĝenerale estas ĉiam tia, kaj la oficiroj aŭ suboficiroj, kiujn apogis nur la titolo, ĉe la kriza momento perdas sian prestiĝon. Ĉefserĝento Sakai estis vundita kaj devis esti amputita ĉe sia dekstra kruro. (Tamen post 20 jaroj Hamada vidis lin tute sendifekta en la urbo Nagojo.) Leŭtenanto Mizusima, la adjutanto de la bataliono, estis frakasita mangrenade de iu japana soldato, kiu indignis pro lia skandala konduto: kunpreni ian vidvinon kaj kune forkuri, malgraŭ ke li sendis multajn al la morto, kiel Hamada kaj liajn kolegojn. Hukui, supera soldato, konata amorulo, montris al ili tute sanan vizaĝon post kelkaj tagoj. Pri. . . ĉesu paroli, jam sufiĉas, entute ili restas fremdaj personoj rilate ĉi tiun rakonton, almenaŭ dum kelka tempo.

La memoro de Hamada jam estis nebula, tiel ke li ne povis detaligi la aferojn en la koncentrejo al la aŭtoro. Sed certas, ke sur sudlanda sablo saturita de koralŝtone-



toj kaj ŝtonoj, malgrandaj tendoj eble por 8 personoj estis starigitaj laŭvice, kiuj eble daŭris ĝis por 200 personoj formintaj unu batalionon, kiu kun aliaj tri formis unu regimenton, kaj kiam Hamada venis tien ĉi, kredeble du regimentoj ekzistis. La estroj: regimentestro, batalionestro, rotestro kun respektivaj helpantoj, furiero, interpretisto kaj aliaj uloj. Ĉu tiam troviĝis plotonestro aŭ subplotonestro, la memoro de Hamada restas jam nebula. Povas esti, ke ankoraŭ tiaj ne troviĝis kaj oni alterne servis por tiu tasko. Cetere notu, ke ĉiaspeca demenco regis ilin ĉiujn: soldatdemenco, kaptitdemenco kaj tiel plu. Ankaŭ ĉe Hamada la demenco tute okupis lin unuatempe.

Kaj en ĉiu tendo simplaj soldatoj aŭ eksoldatoj, kiel Hamada, kuŝis aŭ babiladis kaj fortempigis tiel almenaŭ ĉe la unua stadio, kiam nur manĝo kaj trinko (bedaŭrinde de akvo) estis sola interesajo. La manĝajo estis tiutempe usona porciaĵo en vaksita kartono, aŭ en ladskatolo, kaj la akvo estis alportita per kamiono en skatoloj, kiel jam dirite, kaj oni pendigis drelikan sakon kun krano sube ekipita kaj pendigis tiujn en kelkaj lokoj sub tiucela rako.

Post la fino de la batalo sur la insulo oni ĉiutage varbis kelkdekon da volontuloj por purigi la batalejon: fosi truojn kaj enĵeti kadavrojn, kolekti forlasitajn armilojn, kaj tiel plu. Sed tiuj kadavroj de usonanoj ne estis enterigitaj sed senditaj al la hejmlando, por ke la aŭtoritatularo de la armeo kaj asekur-kompanioj konstatu

ties morton. Ĉi tiu laboro alportis ian ekstran donacon, ĉu manĝaĵon ĉu tabakon. Do multaj, cetere jam tedaj de senageco, konkure iris al tiu ĉi, se la fizika kondiĉo permesis. Hamada mem neniam iris, kvankam lia sano sufiĉe reakiris sian antaŭan staton, krom restanta kuglero ĉe lia maldekstra gambo.

La plej rimarkinda tendenco ĉe la kaptitoj estis falsado pri siaj nomo kaj rango en la armeo aŭ mararmeo. Plej ofte ili havis sian rangon avancitan de si mem. Tion kaŭzis la latentantaŭtimo akirita en la armeo, kie la diferenco de unu rango, aŭ nur unujara veteraneco, dividis paradizon de infero. Ĉiu subulo sklave devis servi al siaj superuloj. Jes, sklave, ekzemple ili devis zorgi pri manĝo, pri lavo kaj tiel plu, eĉ malvesti surobendojn, dum la koncernato senfare povis stari. Ankaŭ la japanpropra fieremo aŭ pretendemo kontribuis por tiu falsado. Kompreneble ne mankis alitendencanoj, kiuj sin malavancis pro diversaj kialoj, foje pro timo antaŭ puno pro sia krimo en sia kariero, ekzemple mortigi aŭ turmenti kontraŭulojn, foje pro honto deca al sia samurajisma eduko, aŭ simple pro sia kontraŭemo. Pli ĝenerala estis falsado de sia nomo. Ili ja timis pri eventuala puno en milita tribunalo post la milito, pri kies ekzisto ili ankoraŭ ne dubis. Tiuj mensogintoj montris grandan konfuziĝon kaj panikon, kiam la rehejmiĝo fariĝis reala kaj proksima, ĉar ili povos esti ne identigitaj de la japana registaro, laŭ ties propra juĝo.

Alia plej ofta mensogo okazis pri la dato de sia

kaptiteco, ĉar ili rangigis sin laŭ sia propra penso: la plej valora estis tiu, kiu post la 15-a de aŭgusto, nome la tago de la japana kapitulaco, estis kaptita aŭ kapitulacinta laŭ la ordono de Lia Tennoa Moŝto, laŭ ilia esprimo. La dua honoro apartenis al tiu, kiu post la deklaro de la korpuso pri la disfalo, farita de la Plejalta Komandejo de la 32-a Korpuso, sed la malplej altan rangon devis havi tiu, kiu estis kaptita antaŭ tiu dato, la 18-a de junio. Komprenoble alia dislimigo estis la vundo. Ĉu kaptita dum sia senkoscieco aŭ male, ankaŭ tio estis grava distingilo. Kiel Hamada en kompleta sano, kvankam kun vundeto, estis hontinda kaptito. Dum li mem sentis nenian rimorson kaj povis resti tute aplomba, kaj povis kontraŭe blufi. Do nature ankaŭ pri tio furoris mensogoj kaj memprokrastoj.

Ĝenerale ankoraŭ tiam ilin minacis la fantomo de la militismo, la fantomo de la japana absolutismo. La kriminala kodo de la armeo ilin katenis, kaj ĉiu restis muta, krom en tiu okazo, en kiu intimuloj sin retiris en angulon kaj mallaŭte interparolis. Kiam la milito finiĝos, ĉu ni povos rehejmiĝi sen puno? La kaptitoj vole-nevole estis enpelitaj en tian skrupulon kaj foje eĉ devis esperi, ke la patrio nepre estu venkita.

De la fino de julio ĝis la komenco de aŭgusto, kelkajn vesperojn oni alarmis kaj ordonis: "Tuj oni estingu ĉiun lumon!" Tiam oni rapidis plenumi la ordonon, kaj ĉia lumo, ĉu kandeloj en tendoj, ĉu flamo en truego fosita en angulo, kie paperruboj aŭ aliaj forĵetaĵoj brulis, estis

estingitaj complete. Kaj nur malofte sekvis obtuza zumado de malproksime. Kuglokurteno tuj alŝpruciĝis ĉielen kun trenataj spuroj brilaj en la suda pura kaj klara aero eĉ en vespero, kaj kraketis kontraŭ unu punkto, kie oni foje povis rimarki ian moviĝon. Sufiĉe konata kaj intima sceno dum la batalo. Du-tri minutojn daŭris la morta silento en la koncentrejo. Ĉu la kamikazoj estis defaligitaj? En la tendo ĉiu englutis voĉon kaj observadis la direkton fervore. Foje iu kriis: “Ho, bombu nin prefere kune kun la malamikoj!” Sed la malo restis klare legebla sur ties vizaĝo, simile al tiu, kiu deklaris, ke li jam ne volas revidi la familion, ĉar li kulpis pri tia hontego permesebla nek de la ĉielo nek de la tero.

Proksimiĝis aŭgusto, kaj kaptitoj povis jam iom reakiri sian stabilecon, eĉ se ili ne aperigis tion sur sia vizaĝo. Neniu jam povis pridubi la venkon de la alianca flanko, kiu estis centoble pli forta ol la aksaj landoj, laŭ ilia propra sperto. Sed la fantomo de la japana militismo ne forlasis ilin. Nur la plej timata kastrado fariĝis jam fabela.

Kiel kutimo ĉe japanoj, ankaŭ tie komenciĝis hazardludoj, kiuj havis grandan furoron ĝis la lasta tago. De ie iu iel “batalfruktis” kartojn, kaj komenciĝis tiu ludo. Denaske japanoj tre amas hazardludon, eĉ la numero de kamiono povas servi por tiu celo, ĉu parnombro aŭ ne, aŭ la unue renkontita homo, ĉu viro aŭ ino. En la senlabora tediĝo do la kartoĵoj fariĝis plej intimaj ludiloj.

Sed pli detalajn la aŭtoro priskribos en pli posta ĉapitro.

Hamada ekhavis ideon post monato da konfuziĝo kaj kolapso, ke li devas iel labori por organizi ian grupeton, kiu penos propagandi demokration kaj eduki kolegojn por tiu celo. Jam antaŭe eĉ en sia trupo li havis malgrandan grupeton, kiu celis ne morti en la batalo, en kiu Miyata estis lia sekvanto. Cetere tio multe utilos por stabiligi la korojn de la kaptitoj per konvinkiĝo, ke la milita tribunalo malaperos kaj neniu estos punita pro la kaptiĝo, kaj ke la repaciĝo tuj baldaŭ okazos, ĉar Okinavo, la lasta fortikaĵo de la armeo, jam tiel frakasigis. Li precipe deziris, se eble, reeduki junulojn venentajn de la longa militisma edukado.

La laboron li komencis per persvado al la samtendanoj.

La suboficiro el la mararmeo, kun kiu li estis kaptita, jam transiris al suboficira bataliono. Iu Oose, el artilerio de la 42-a Divizio, liaj kolegoj Katayama kaj Nakazima, kaj Tukaguti, Suzuki kaj Takada estis liaj apuduloj.

Oose kun kalva kapo estis babilema kaj avida ulo, 30-jara fiŝisto el la gubernio Mie. La staturo malalta kaj sufiĉe dika — ĉiam tia persono, ĉar la milito montris la lastan fazon kaj la armeo mobilizadis sufiĉe maljunajn soldatojn, — li titolis sin subkaporalo. Katayama el la sama gubernio, komercisto aŭ kolportisto de bagatelaj aĵoj, akrokula, kaj duonkalva aŭ kvaronkalva, li tamen estis ne dika. Nakazima kun alta staturo, el aktuala militservo, do ne dika, ĝenerale ne parolema, kun iom

tordita karaktero, same avida, havis makulon iom ŝokan sur sia dekstra vango. Li sin titolis subkaporalo, sed sendube simpla soldato. Li tamen ŝajnis pli honesta ol la kolegoj, nome, li ne estis ankoraŭ hardita de la ondoj de tiu ĉi mondo, sed ĉiam sekvante lian antaŭulon Oose, por Hamada restis nepersvadebla junulo. Tukaguti sin titolis unuaranga soldato el la proviantejo de la Korpuso, sed oni juĝis lin suboficiro laŭ lia sinteno. Fortika, muskolriĉa, malgrasa tamen foje flamema li restis ĉiam muta, kaj nur malofte venis al hazardludo aŭ io alia, ĉiam restis izolita propravole. Sed kiam li partoprenis en la hazardludo, li montris grandan talenton en tiu arto. Li ne kontraŭparolis al Hamada sed ankaŭ ne porparolis. Takada estis nomita Anaso, ĉar li restis facile senplumigebla ĉiam ĉe hazardludo, sed tre amis la ludon. Laŭ lia propra klarigo li laboris en la urbo Takatuki kiel lavisto. Malalta kaj miopaj elefantaj okuloj ĉiam palpebrumantaj kaj murmuranta. Laŭ la juĝo de Hamada li taŭgis por nenio entute, sed denaska honestulo, aŭ pli vere, simpla dupo.

Nur unu junulo nomata Suzuki klinis siajn orelojn al lia parolo. Li studis en politekniko en Tokio, kaj laboris kiel arkitekta inĝeniero en Jokohamo. Iama unuaranga soldato el iu trupo, kiun Hamada jam forgesis. Preskaŭ senvunda, portanta okulvitrojn, mezdika, li parolis iomete en la angla lingvo.

Nur post la transporto al alia koncentrejo Hamada aŭdis, ke aliaj kelkaj tiam same klopodis por la sama celo,

precipe en la centralo de la koncentrejo laboris unu regimentestro nomata Tanaka matutarô, kiu iam studis Esperanton en sia universitato en Hokajdo, kiu lin forpelis pro lia kontraŭmilita aktivado. Li penis multe por la bono de la kaptitoj, ekzemple, kiam ĉiuj povis rehejmiĝi, li energie laboris por tio, sed li mem restis ĝis la lasta ŝipo ĉiam laborante. Tiu ĉi nun laboras en Hokajdo.

La vesperon de la 6-a de aŭgusto, — li ne estis certa pri la dato, sed devis esti en tiu tago, — ĉe la nombrokontrolado la anoncisto moknomata Makku Aasaa pro sia misprononco de MakArturo, sin ŝovis unu paŝon antaŭen kaj en plialtigita tremanta voĉo legis paperon tenatan en la mano :

— La usona armeo bombis la urbon Hiroŝimon per speciala bombo, kiu nur sola detruis la tutan urbon momente. . . la nova estis atombombo. . .

La anoncon sekvis klarigo de interpretisto pri tiu terura armilo. . . Tiu ĉi komentis ĝin klare sed amatore, kio tamen ne sufiĉis konvinki Hamada, tute fremdan al la naturscienco, sed donis nur nebulan koncepton pri la katastrofo. Li tamen povis profundigi sian konvinkon, ke la milito tuj baldaŭ finiĝos per la malvenko de Japanio.

De tiam li kutime pasigis vesperojn kun Suzuki. Ili ĉiam reciprokis siajn opiniojn kaj dubojn, diskutis kaj argumentis, sed ankoraŭ ne venis konkludo, kiamaniere

kaj kiam ili komencu sian praktikan agon. Ankoraŭ tiam ili ja hezitis publike agi antaŭ ekssoldatoj dumlonge edukitaj en la ideo de la glora imperio.

Kaj venis la vespero de la 14-a de aŭgusto.

Kiam ili kune promenis kiel kutime, subite venis al ili surdiga bruego. Ŝajne oni kantis, hurais, sin miksis metalaj batbruoj. Kio? Ĉu ribelo? Hamada okulsignis al Suzuki kaj kune proksimiĝis al la barilo, de kie la bruo venis. Tie trans la dornodratoj ili povis vidi la koncentrejon por la koreaj militlaboristoj, ŝajne pritraktataj pli milde ol japanoj. Ili vidis, ke ĉiuj koreoj elkuris de sia tendo kaj en iu spaco jen kantas, jubilas, batbatas benzinkatolegojn kaj aliajn, oratoras laŭplaĉe kaj senorde sur diversaj lokoj, kompreneble en la korea lingvo fremda al ili ambaŭ. La tuta abelujo incitata zumas de supro malsupren, de malsupro supren.

— Kio okazis, kamarado?

Li demandis al preterpasanta viro trans la dornodratoj.

— Hm, japanaĉoj, iru tuj inferen! Japanio estis venkita!

Li ĵetis akran krion al Hamada kaj Suzuki, kvazaŭ ili estus simbolo de la japana imperiismo mem, kiu enpelis tiujn koreojn en tiun inferan batalejon post duonjarcenta ekspluatado kaj persekutado.

— Ha!... Fine...

Pretervole Hamada eklarmis. Varmaj strioj laŭfluis sur liaj vangoj. La fortikaĵo de la absolutismo nun falas



antaŭ la okuloj. Li vidis la brikmurojn de malliberejo, betonitajn ĉelojn de policejo, la krizanteman floron sur la muro de juĝejo, kiuj kune nun disfalas kun krakegoj.

Li ploris tiun vesperon. Dum la sala larmado foje venis al li nova ideo: oni povas min preni por fervora patrioto, kiu lamentas pro la malvenko de la patrio. Sed kiel ajn...

En la sekvanta mateno la anoncisto, Makku Aasaa, anoncis krie:

— Lia Tennoa Moŝto degnis akcepti la deklaron de Postdam, kiu diras... kaj la registaro...

Li legadis la tutan tekston. En lia mano ankaŭ la papero tremetadis. Hamada tamen aŭdis nenion, sed restis staranta kun okuloj kontemplaj al la norda ĉielo.

Post tiu tago Hamada kun Suzuki komencis sian agon jam duonpublike, sed foje ankoraŭ sub forta minaco. Antaŭ ol ekhavi ian kernon en la koncentrejo ili devis ankoraŭ pasigi kelkajn monatojn, kaj plue kelkajn monatojn ĝis ili povis iel kontribui por dutaga striko de kaptitoj kontraŭ la usona armeo, kiu ne facile volis ilin resendi al la patrio, sed povis resti rigardata plue kiel amika forto por la demokratio al iliaj okuloj, samkiel al la gvidantoj de la Komunista Partio de Japanio, apenaŭ liberigitaj post 18 jaroj!

### 3. Okulon pro okulo kaj denton pro dento

Okazis kredeble en la komenco de aŭgusto, aŭ en la fino de julio, certe antaŭ la kapitulaco de Japanio. Iun vesperon kiel kutime kamiono da kaptitoj estis enportita. Hamada vidis, ke antaŭ la vico staras leŭtenanto Kobayasi, kiu reciprokadis kun la regimentestro saluton aŭ similan. Hamada rapide kurigis siajn okulojn al la sekvantoj. Jen Kondô konsumita kaj kun longa barbo sed ankoraŭ kun brilantaj okuloj kaj kun sia longa mentono intima al li. Li estis iam lia kolego en Naha kien ili venis sendite de la bataliono kaj laboris tie ĉirkaŭ tri monatojn por kontakti kun la superaj instalaĵoj kaj ricevi negravajn ordonojn aŭ diversajn municiojn. Aliajn kelkajn konatajn vizaĝojn Hamada rimarkis, sed jam ne povis distingi, kiu estas kiu. Kiam lia bataliono estis reorganizita kiel infanterio, Kondô reiris al la insuleto Aka, kie lia roto okupanta sin por mekanikaj aferoj estis ordonita rezidi kaj garnizoni plue. Kaj leŭtenanto Kobayasi estis ties ĉefo.

— Sinjoro leŭtenanto Kobayasi!

Hamada vokis lin kaj volis alproksimiĝi al li, kiu kun levita brako siaflanke kriis: “Pli poste!”

Post kiam la novicoj iris respektive al sia tendo aŭ pavilono, Hamada iris sola al la oficira kampejo, kiu situis en la profundo de la koncentrejo.

— Ha, Hamada, ĉu vi restis viva?

— Ankaŭ vi!

Hamada kun sia propra denaska malceremoniemo ignoris la diferencon de la rangoj en la armeo, kaj senvorte enmanigis al Kobayasi tri cigaredojn, kiuj povis esti por li tiutempe granda donaco.

— Kion vi faris de tiam?

— Jes, ni havis neesprimeblajn multajn suferojn. . . Ĉio tamen iris kiel vi diris antaŭe.

— Mi tiam diris, ke la japana armeo estos venkita, ĉar. . . Kia vi povas esti oficiro, kaj kia mi. . . soldato.

— Sufiĉas via blufo. Ankaŭ mi miaflanke faris ĉion eblan.

Por glatigi la longe detenatan langon de Kobayasi, Hamada siaflanke komencis paroli pri sia historio, de la ekbatalo ĝis ĉi tiu koncentrejo tre koncize, kion povus diveni nur samsortanoj kaj samideanoj.

— Ni iru en alian lokon!

Kobayasi proponis. Ili venis iom distancan lokon sub ombro de iu arbo, kiu malgraŭ multaj vundoj kaj bruloj ankoraŭ povis stari, sed nedistingebla el kiu speco. Iu viro akompanis ilin iom de fore.

— Kiu li estas ?

Hamada demandis.

— Mia servosoldato.

— Ĉu ?

Hamada estis mirigita. Ĉu la oficiro en la kaptiteco ankoraŭ ĝuas tian privilegion ?

— Jes, laŭ la konvencio en Ĝenevo. Ankaŭ mi por la unua fojo eksciis nur ĉi tie. Nu, Yasuda, vi povas ripozi, iru for !

La viro ĝentile salutis kaj foriris de la loko.

— Hm, oficiro estas tre bona profesio, mi vidis.

— ... Ĉu vi rimarkis, Hamada, oficiron apude kuŝantan ?

— Mi bedaŭrinde ankoraŭ ne havas tian malhonoron konatiĝi kun ia oficiro.

— Vi estas tute sama. Li estas tiu Umesawa.

Umesawa ? Ĉu li estas tiu majoro ? La komandanto de la 1-a Bataliono, studinta en kadeta lernejo, kaj unu el la plej unuaj kaptitoj dum la batalo sur la insulo Okinavo, ĉu li estas tiu ?

— Kion li pensis, kaj kion nun pensas, mi volas scii. . . Cetere post la disiĝo, kion vi faris ?

Hamada demandis kaj estis konsternita de la respondo. Leŭtenanto Kobayasi takeo, la estro de la mekanika roto de la 2-a Surmarimpeta Bataliono, iam laborinta kiel inĝeniero en la aŭtofabriko Toyota kaj uitaisto el la skolo Araragi, parolis sian historion al Hamada jene :

La usona atako sin direktis unue al aerodromoj en la insulo Okinavo, kaj al la insularo Kerama, kie sin kaŝis tiel nomataj min-boatoj, moknomataj de usonanoj "mefitoj", impetontaj en necesa okazo kun du minoj ekipitaj ambaŭflanke, kaj frakasos malamikan ŝipon kune kun la korpoj de la du sturmantoj mem. La unua surlandiĝo okazis ja al tiu insularo: Zamami kun la 1-a Bataliono, Tokasiki kun la 3-a, kaj Aka kaj Keruma kun la 2-a, al kiu apartenis Kobayasi, kaj iam Hamada. Estis la 24-a de marto. Ĝuste tiam la komandanto de la Ŝipkorpuso, kolonelo Oomati faris revuon en la insulo Aka, kaj majoro Miyake, la komandanto de la baz-trupoj, akompanis lin.

La aŭtoro nun trovis, ke li devas ekspliki iom komplikitan sistemon de tiu ŝipkorpuso. Ĝenerale dirite, ĝi naskiĝis de malakordo inter la japanaj armeo kaj mararmeo.

Ĝi konsistis el tri specoj: la unua estis transportista, t. e. el simplaj maristoj rekviziitaj kaj sin okupis per la transportado de municioj kaj aliaj necesaĵoj; la dua estis nomata ŝipingeneria, sed ilia laboro estis tiu de alilandaj marsoldatoj, kun siaj boatoj ili navigis tien ĉi tien, kaj ekipitaj per mitraloj aŭ malpezaj kanonoj ili rekte batalis kontraŭ malamikoj; kaj la tria estis iom komplika; ĝia unua parto konsistis el kadetoj, kiuj sturmos en necesa okazo kun siaj du minoj ekipitaj ambaŭflanke de rapid-

kuraj boatoj, konsistantaj el kruĉplakaĵoj kaj motoro modifita el tiu por kamiono, do oni tuj povos imagi al si faman kamikazon, "sinmortig-aviadilon", sed ĉe tiu okazo surakve; kaj ĉi tiun akompanis la alia subalterna trupo, kiu por la unua pretigis bazojn, t. e. grotojn kaj aliajn instalaĵojn, kaj en necesa okazo labori por surakvigi la boatojn. Kaj la komandsistemo: la tuton komandis la ŝipkorpuso, kun kolonelo Oomati kiel ĝia ĉefo, sed ial siajn proprajn komandejojn havis la min-boataj kaj bazaj trupoj respektive. Hamada kaj Kobayasi apartenis al la lasta trupo.

La 23-an de marto, je la 10-a horo matene kolonelo Oomati estis donanta sian lecionon aŭ admonon certe tute formalan kaj sensencan antaŭ la soldatoj, kiuj ĵus finis sian paradon surmare kaj surtere. Tiam abrupte kelke da grumanoj alflugis kaj rastis mitrale la insuleton Aka. Venis la dua kaj tria persekutoj deaere. Neniu kontraŭaera pafilo troviĝis en la trupo, do ĉiu konfuzite hastis kuregi al sia pozicio fosita en monteto, poste nomata Odayama, laŭ la nomo de la komandanto, en la mezo de la insuleto kaj sin kaŝis senspire. Sed baldaŭ la usonaj aviadiloj forflugis post sufiĉa mitralado kaj bombado.

Alarmis la ŝipkorpusa komandejo pri la atako radie. La 24-an preskaŭ ĉiu barako kamuffita per kanoj aŭ aliaj materialoj jam estis en flamo. Aliflanke malamikaj boatoj penetrantaj en mallarĝan markoleton inter Aka kaj

Keruma unue salvis senreste la boat-grotojn, kiujn la baz-trupoj fosis nur per pioĉoj kaj ŝoveliloj kun etkvanta dinamito, tiel ke preskaŭ ĉiu boato momente pereis en flamo. La komandanto de la 1-a roto rezidanta en Keruma, leŭtenanto iu mortis tiutage. Sub la komando de serĝento Oonaka la restintaj soldatoj de la 1-a roto sin kaŝis en pozicion fositan sur la mezo de monteto. La sama okazis ankaŭ en la insuleto Aka, kie rezidis la bataliona centralo kun siaj du rotoj kaj mekanika roto, kies ĉefo estis Kobayasi. (Pri la du batalionoj situantaj sur la insuleto Zamami kaj Tokasiki la afero estis preskaŭ sama, kaj la sola diferenco: Majoro Umesawa, la komandanto de Zamami, estis kaptita tiun tagon. Nome la usona flanko superis ne nur en la strategio kaj taktiko sed ankaŭ en esplorado kaj aliaj punktoj.)

Ĉi tiun nokton kolonelo Oomati, la komandanto de la ŝipkorpuso, kaj majoro Miyake, la komandanto de la baz-trupoj, prenis tri restintajn min-boatojn kaj ne por ataki malamikojn kuris al la insuleto Tokasiki, evitante la batalon kaj pretekstante la ordonon de la ĉefstabo, kiu afablis ordoni al ili veni al la ĉefinsulo. Ĉu por kamufli ilian eskapon? Oni organizis "sturmotrupon" el la 2-a, 3-a kaj mekanika rotoj respektive el dek soldatoj, kaj tiuj ĉi sturmis profitante mallumon al la usona trupo, kiu bivakis marborde, sed kiam la atakantoj venis en la vilaĝon, la malamiko trovis ilin kaj donis fortan regalon per mitraloj kaj obusĵetiloj. Mortis pli ol dek, preskaŭ ĉiuj vunditaj, kiuj povis apenaŭ retreti al sia pozicio

meze de la monteto Odayama. Tiam tro strangan konduton montris subleŭtenanto Someya, la komandanto de tiu trupo. Kiel aliaj soldatoj li sufiĉe sin regalas per sakeo antaŭ la ekiro kaj iris al batalejo. Sed kiam la trupo revenis post la retreta trumpeto, oni ne trovis lin en la vico. Oni diris, ke li estis kaptita, dum li restis en granda ebrieco en malgranda truo, apud kiu staris blanka flageto. (Hamada volis paroli kun li kaj serĉis en la koncentrejo, li tamen ne sukcesis trovi lin tie. Iuj diris, ke li estis sendita al Havajo por ricevi “specialan edukon” tie.)

La “volontuloj”, kiuj efektive venis tien rekviziĉite el la korea duoninsulo, kaj kiuj devis surakvigi la boatojn, en la unua tago forkuris kvazaŭ araneidoj en vento. La plejparto el ili jam tiun tagon iris al la tendaro de la usona flanko. La restintaj soldatoj de la 1-a roto, post dek tagoj venis de Keruma al Aka sub la komando de serĝento Oonaka post la morto de la estro. Ili transiris la kanaleton profitante mallumon, kaj kuniĝis kun la ĉeftrupo. La bataliono mem jam ne havis kontakton kun la korpusa komandejo en la ĉefinsulo.

La tuta trupo eniris la monteton Odayama, kie oni jam fosis sufiĉajn grotojn kaj fuortetojn, kaj nestis tie. Feliĉe la usona armeo ne atakis — aŭ la trupo ne meritis ian atenton — post forbruligo de la boatoj, eĉ ne batuis pro la japanoj kaj nur bivakadis sur marbordo, kurigis ĉiutage kaj ĉiuvespere boatojn ĉirkaŭ la insuleto kaj la garnizonon izolis kaj sieĝis per malsatigo kaj soifigo, kiuj sufiĉe konsumis ilin ĝis marasmo.



Post malpli ol unu monato la tuta insuleto fariĝis infero pro manko de nutraĵoj. La japana komandanto, laŭ la konsilo de ĉefserĝento Oonogi, malpermesis fosi bata-tojn, kaj proklamis, ke se oni fosos ilin aŭ nur deŝiros foliojn el ili, eĉ se tiu estas la posedanto de la kampo mem, la trupo mortpafos senescepte; kaj oficiroj kaj suboficiroj kun bastono komencis patroli la insuleton, punis tiujn, kiuj aŭdacis ignori la proklamon. De mustelo kaj serpento aŭ mungo ĝis tervermo kaj heliko (ne tiu frandata en Francio kaj aliloke) jam povis esti la semo de ĉia kverelo, ne nur sovaĝa herbo sed ankaŭ arbofolioj estis studitaj pri la manĝebleco. Eĉ pingloj kaj trunko de cikaso aŭ pinglegoj de pandanoj tute sentaŭgaj, estis formanĝitaj. Tiam japanaj gazetoj informis, Hamada poste aŭdis, ke eĉ infanoj sturmis al la malamiko kaj heroe mortis. Tio venis sendube de ilia volo prefere morti pli frue ol morti iom-post-iome.

Ne pasis du monatoj, kiam ĉiuj loĝantoj en la insuleto kapitulacis al la malamiko. Ĉi tio sendube helpis multe la trupon rilate al la nutraĵa problemo. (Kontraŭe en Tokasiki okazis granda tragedio, ke ĉiu loĝanto estis devigita propravole mortigi sin pro la sama kialo. En tiu punkto nia majoro Oda estis pli sagaca ol sia kolego majoro Akamatu; la kapitulaco nepre venis de lia politiko aŭ taktiko, sugestita de Oonogi.) Ek de la ekbatalo la manĝon oni prenis nur du fojojn en tago (same en la ĉefinsulo) sed tuj baldaŭ iĝis unufoja, kaj tiu manĝo konsistis nur el fingreto da batato. Do perseku-

tataj de la malsato oni organizis foje “sturmotrupon” kaj volis rabi manĝaĵojn, sed ĉiufoje nur fiasko atendis ilin kaj la soldatoj vane faladis amasigante kadavrojn sur kadavroj.

Spite de la malpermeso du soldatoj elfosis batatojn kaj manĝis, aŭ laŭ aliaj rakontoj, deŝiris foliojn. Surloke ili estis kaptitaj, kaj la komandanto ordonis pafmortigi ilin. En la sekvanta tago — tuj antaŭ la mortpuno — ambaŭ dizertis el provizora karcerero, groto, kaj kapitulacis al la usona flanko. Ĉi tiun tagon serĝento Oonaka estis komandanto de la deĵorantoj, kaj pro tio lia roto (efektive malpli ol dudek) estis punita per redukto de manĝaĵoj, t. e. ili ricevis nur akvon.

Tamen ekzistas alia rakonto, aŭ pli ĝuste, memoraĵo de iu japana kadeto, kiu nun laboras en Tokio kiel advokato. Laŭ li, ambaŭ soldatoj estis mortpafitaj. Sed Hamada mem vidis unu el ili, nome la unuarangan soldaton Sima, kaj parolis kun li en la koncentrejo Yaka. Li ankoraŭ nun kredas, ke tiu ĉi persono nepre devis esti tiu Sima, sed. . .

La afero skuis la tutan batalionon kaj pelis al plena maltrankvilo, ĉar ilia sorto povis esti ankaŭ por la restantoj. Spite de ĉio la estraro de la bataliono, se ne diri ĝissate, ne malsufiĉe manĝadis kaj foje povis trinki fortan brandon propran en tiuj sudaj insuloj! Tia famo cirkulis tra la trupo. Kie fumo leviĝas, tie fajro troviĝas, oni diras. Certe la estraro kun la komandanto kiel la unua, se ne frandi, almenaŭ devis manĝeti pli multe ol la

simpluloj! Ĉie ekozis kolizioj gravaj aŭ malgravaj, kaj kverelo sekvis kverelon.

Ĉe tio leŭtenanto Kobayasi decidis finfine. Li alvokis al si unue kelkajn suboficiojn kaj poste ĉiujn soldatojn, t. e. kvardeko da vivantoj, konfesis sian opinion kaj petis ilian juĝon. Ŝajne ĉiu jam konis la veran staton de la milito, kaj precipe, ke en la insulo Okinavo sendube la tuta korpuso jam estis frakasita komplete, ĉar indikis la fakto, ke la tondranta kanonado kaj bombado jam preskaŭ ĉesis. Do neniu kontraŭstaris al la decido de Kobayasi.

La sekvantan tagon la rotestro ordonis starigi en la unua vico suspektindan suboficion nomatan Konisi, kaj postsekvigis lin de unu soldato kun nuda bajoneto, kaj plue li sin gardis kontraŭ eventuala atako de majoro Oda, tiel ke ĉiu portis pafilon ŝargitan. En la fronto iris Kobayasi kaj tiu suboficio. Li malingis sian sabron, ordonis trumpeti kaj malsupreniris de la monteto. En la plena taglumo la tuta roto publike kaj spite kapitulacis preskaŭ ribele. Ĉu Oda miskomprenis lian agon aŭ ne? Li jubilis laŭdire pro tiu ago, ĉar la sola intereso de la majoro dependis de la nutraĵa problemo kaj puntilio. Li ne ordonis persekuti la perfidulojn. Do feliĉe la epokfara evento tra la tuta japana militista historio sukcesis sen sangoverŝo.

La evento en Aka estis studinda kaj studenda por la ĝenerala historio de Japanio, sed tamen. . . la aŭtoro tie notis nur la parolon de Kobayasi, kiu bedaŭrinde antaŭ dek jaroj mortis en la urbo Nagojo.

En la komenco de septembro alvenis soldatoj rezidintaj sur la insuletaro Kerama: Zamami, Aka kaj Tokasiki. Ili ĉifonitaj kaj marasmaj sinsekve deruliĝis de kamionoj. Malnovaj kaptitoj en spaliro, kiel kutime, okulerĉis siajn konatojn. Ankaŭ Hamada.

Post majoro Oda sekvis jen serĝento Oonaka kun sia tornistro, kvankam sen armilo, ankoraŭ dece kondukis siajn subulojn. Krom kelkaj oficiroj ĉiu aspektis fantomo. Magra, kun senbrilaj fiŝaj okuloj, dratdikaj kruroj... Nenia esprimo povis ilin adjekti. Kvazaŭ el dratoj ili restis malgrasaj, almazole ĉifonaj, sed interhel-pante sin apenaŭ malsupreniris de la kamionoj, kaj preskaŭ ĉiu falis surteren kaj ne plu movis sin. Sed Hamada jam estis kutimigita al tia sceno, ke povis veni al li nenia speciala emocio nek ia larmero.

.....

La ĉiam ripetata ĝojo kaj malĝojo.

Dum Hamada parolis kun Oonaka, proksimiĝis unu viro skeletaspekta.

— Hamada, ĉu vi ne bonvolus alporti al mi akvon?

Li ĵetis sian okulon al tiu petanto. Li estis serĝento laboranta en la centralo, nun konsumita de malario, insekte ĉirpis al li. Hamada iam havis ian simpatian al li, ĉar la saman nomon li havis. Li restis ĉiam impertinenta kaj amata de nenia simplulo, pro sia sovaĝa konduto sklaviga. Hamada tamen donis akvon en gamelo.

De Oonaka Hamada aŭdis dum kelkaj tagoj pri la situacio sur la insuleto post la evento de Kobayasi.

Majoro Oda, kiu ne povis kontraŭagi al la aŭdaco de Kobayasi pro ties batalpreteco, dum kelka tempo ĉiam skoldadis subulojn ĉe ĉia movo, sed ŝajne lian koleron kvietigis la penso pri la nutraĵoj ĉiam pli kreskanta, kaj la ribelo de la rotestro kun la subuloj iusence plifaciligis la demandon. Do li ordonis pli severe limigi mangaĵojn kaj restis tute senmova rilate al la usona sieĝo, kiu siavice ne faris rimarkindan atakon kaj nur alvokadis kapitulacion de sur boatoj patrolantaj ĉirkaŭ la insuleto.

Ankaŭ Oonaka spitis foje la malpermeson: li neglektis foje fiŝkaptajn per mangrenadoj, aŭ deŝirojn de batatfolioj. Ĉu la centralo sciis tion aŭ tute ne? Ĉiuokaze ĝi silentis kontraŭ li. Kredeble ĉiu "roto" agonianta same agis kiel la lia. La bataliono jam tenis nenian forton nek vervon reataki la sieĝantojn kaj restis nur vegetanta. Majoro Oda kolapsis kaj idiotmiene ĉiam incitiĝis ĉe ĉia movo sed povis doni nenian instrukcion. Ĉion en la bataliono gvidis ĉefserĝento Oonogi, la unua suboficiro. Li ja apartenis al la "tri kanajloj" en la bataliono. Tiu trio konsistis el la komandanto, serĝento Hamada kaj tiu Oonogi.

Kiel jam dirite, antaŭ la komenco de aprilo la koreaj militlaboristoj kaj la vilaĝanoj senescepte kapitulacis memvole aŭ kontraŭvole. Unuj post aliaj ankaŭ soldatoj malaperis. Ili gvatis ŝancon, eliris al marbordo kaj tie trovis jen usonajn marsoldatojn jen patrolboaton, kiu

mikrofone alvokadis la submetiĝon. Kelkaj kadetoj, kies boato estis unue detruita, sinmortigis per mangrenado.

Kaj venis la 15-a de aŭgusto.

La patrolboatoj urĝe ĉirkaŭkuris la insuleton kaj laŭte alvokis :

— Japanio jam kapitulacis, akceptis la deklaron de Postdam. Via trupo devas sekvi. Tuj sendu vian parlamentaron por negoci!

Ĉiu rotestro estis kunvokita. Sed tio jam estis nur nominala kunveno, kaj preskaŭ ĉiu oficiro jam estis for. La unua roto estis sub la komando de la serĝento, kaj la estro de la mekanika roto dizertis kun siaj subuloj krom kelkaj deĵorantoj en la centralo. “Ĉu ne komploto de la malamiko?” tia ideo kompreneble povis aperi, sed la pli sana konscio venkis. Majoro Oda, kiu restis muta ĝis la fino, eldiris :

— Bone! Ni sendu parlamentaron. Oonogi elektu taŭgan kaj aliajn kelkajn!

Kaj en la sekvanta tago kelkaj delegitoj kun blanka flago malsupreniris kun sia eskorto. Oonogi estis la ĉefa parlamentario. Kiam ili ekiris, Oda aldiris post la dorsoj :

— Demandu, kiel oni traktos la oficirojn? Ĉu komprenite?

Estis la fino de aŭgusto. Sur la insulon Okinavo venis la sezono por tajfunoj, kiuj ĉiam damaĝis ĉi tiun sudan regionon. Oni komencis “doni la finan punkton

per negocado kun superuloj”.

Tio ekkokazis spontane, almenaŭ en sia unua periodo. Serĝenton Hamada kaj kelkajn aliajn ulojn disbatis tiuj, kiuj iris al ili por “negoci”.

Hamada iris al Kobayasi en la sekvanta tago kaj la lasta flustris al li:

— La atakintojn mi ne konas precize, sed unu el ili devas esti Sugimoto el la surakva trupo.

Tiun kuraĝulon Hamada pene elserĉis. Al li tiu Sugimoto konfesis, ke li iam apartenis al la Metallaborista Sindikato en Tokio sub la Tutlanda Konsilio de la Japanaj Laboristaj Sindikatoj, kiu estis la lasta maldekstra sed laŭleĝa organizo kaj rolis kvazaŭ la lasta bastiono de la kontraŭmilita forto, kvankam ĝi estis diverssence limigita en sia ago pro la karaktero tendenca al maldekstra socialdemokratismo. Sugimoto aĝis 30 jarojn kaj mobilizite en la armeo li laboris kvazaŭ vokto por tiuj koreaj militlaboristoj. Li, altastatura, kun vangoj elstarantaj kaj kun nigraj dikaj brovoj, certe forta, antaŭ tiu vespero parolis kun Hamada, kiu siaflanke proponis al li, ke ili ne vane perfortu iamajn superulojn sed tiun teroron utiligu por la demokrata administrado de la koncentrejo. La terorismo en la koncentrejo! La perfortaĵo mem estis ne malofte en tiu ejo, sed tia ago ĝis tiam preskaŭ ĉiam okazis nur pro privata venĝemo aŭ rankoro, kaj ofte venis de la dekstra flanko, aŭ ne malofte de la estraro de la bataliona centralo. Oni tre ofte linĉis tiel nomatajn “ruĝulojn”, kiuj volis “perfidu la

patrion”, sed nun. . .

— Povas esti ke ankaŭ vin oni iamaniere punos. . . mi mem klopodos, ke tia afero ne okazu almenaŭ al vi, sed. . .

Kobayasi malforte ridis: “Ankaŭ mi kulpis ne malmulte, ĉar mi estis oficiro. . .”

Dum unu vespero Sugimoto sukcesis organizi plejparton de la surakva trupo, kiu konsistis preskaŭ el koreoj rekviziiciitaj. Ĉe tiu “laboro” Hamada metis sian kolegon Suzuki ekster la afero, ĉar la ago mem akompanos sian sekvon, eventuale severan punon. La afero en Aka devis esti solvita de la aka-anoj, laŭ Sugimoto, lia nova kamarado.

En la sekvanta vespero Sugimoto iris la unua kaj elkondukis ĉefserĝenton Oonogi al la Yaka-Ginza, t. e. la ĉefa vojo trakuranta meze de la koncentrejo en Yaka. Sieĝate de kelkdeko da iamaj subuloj Oonogi paliĝis kaj sidante rekte sur la tero pardonpetis tiel kaj ĉi tiel, kvazaŭ lokusto tenata ĉe postkruroj, ĉiam adorkline, sed de la malantaŭo iu forte piedbatis, tiel ke li falis survizaĝen, kaj tio faris signalon al la atakantoj kaj oni lin ĉirkaŭbatis. Post sufiĉa regalo per pugnoj kaj piedoj ili trenis lin kun sangeroj el la buŝo kaj nazo al la pordo de la palisaro de lia ejo kaj batpuŝis lin internen.

— Transdiru al Ikeda, ke morgaŭ estos lia vico!

Leŭtenanto Ikeda, kiun oni eltrenis en la sekvanta vespero, dekomence tremetadis konvulsie.

— Ĉu vi forgesis min?



Unuaranga soldato nomata Itô, kiu ricevis plurfoje survangojn de tiu ĉi, prenis lin je la brusto.

— Ĉu vi, estante leŭtenanto, ne povas rekte staradi senmove? Kiam vi batis min, mi tenis min rekte.

Ikeda falis pugnobatita kaj sekvis sur lin la pugnoj kaj piedbatoj de la ĉirkaŭo. Ne mankis ankaŭ manfarita pantoflo, t. e. boto dehakita ĉe la malantaŭo, kaj eĉ ŝtono. Ili servis kiel armilo kontraŭ la eksa superulo. Sur liaj vangoj striis sango, kaj la okuloj preskaŭ elkaviĝis.

Tiamaniere ĉiun vesperon po unu persono ili linĉis laŭ sia propra nigra listo, kaj disbatis la viktimojn duonmorte. Oficiro, suboficiro, ĉiu laŭvice, nome, laŭ la grado de la rangoj, t. e. la kulpeco, ricevis sian adekvatan punon. Por ke la oficiroj aŭ aliaj iamaj turmentistoj terurigu, la linĉistoj nepre avizis la sek-vonton.

Tiu ĉi insurekcio estis ial neglektita de la ĝendar-maro, aŭ estis ne atentita almenaŭ por la trankvileco de ilia stato mem. Ili ja volis resti blindaj, por ke ne okazu la ĝenerala konflikto. Ankaŭ la stabejo de la kaptit-regimento tute silentis, aŭ probable fortimigite ne povis interveni, ĉar la direkto povis ĉiam ŝanĝiĝi al ili mem. Cetere ili mem en sia koro povis jubili, ĉar ankaŭ ili estis el tiuj turmentitaj viktimoj iam en sia trupo. Ĉiuokaze la teroro estis limigita nur en la kadro de la koncernatoj al la insuleto Aka.

Finfine venis la vico de la batalionestro.

Sinjoro Majoro eltrenita antaŭ la bando, restis tiel lepore timida, ke liaj dentoj klakis. Ĉu tia malkuraĝulo povis esti komandanto de “Lia Tennoa Moŝto” kaj rabis la vivon al multaj subuloj kaj civiluloj en la nomo de la milita disciplino? Ĉu tia estis kursfininto de la japana kadeta lernejo? Sen epoleto, la oficiro povis fari nenion. Oni ridis. Prave la armeo estis venkita!

La nova viktimo tamen tiel kaj ĉi tiel provis preteksti aŭ ekspliki, kaj ne volis sincere pardonpeti.

— Mi agis nur laŭ la sankta ordono de Lia Tennoa Moŝto.

Ĉe la vorto “tennoo” li rektigis sin kaj apenaŭ elbuŝigis. Momente oni hezitis ĉe tiu vorto pro sia longa tradicia eduko, sed tiam Hamada, kiu efektive ĝis tiam batis neniun, levis sian pugnon por la unua fojo.

— Bone! Do anstataŭ Tenĉjo vi ricevu ĉi tiun!

En la sama momento oni disbatis lin frakase. Hamada sentis grandan kontenton ĉe tiu bato; la agrablo kaj kontento transiris de la pugno al la kapo; li sentis infane, ke li efektive punis la tennoon.

Oonaka estis elkondukita, sed neniu kuraĝis lin bati, kiam li senreziste sidis sur la teron kaj fermis siajn okulojn kun la vortoj: “Batu min!”

Kobayasi ricevis du-tri vangofrapojn. Sugimoto, kiu propramane ne batis lin, diris: “Ankaŭ vi kulpis!”

— Ĉu ankoraŭ unu fojon ni ripetu!

Iu diris, sed Sugimoto detenis tiun. “Jam sufiĉe!

Se ni plu agus, la jankioj povus interveni. Ĉiu fariĝis jam sufiĉe modesta. Ankaŭ ĉiuj oficiroj en aliaj trupoj timas. Antaŭ ol elvoki la intervenon de la ĝendarmaro, ni retretu jam tie ĉi!”

Ĉi tiun aŭ la sekvantan vesperon ĉefserĝento Oonogi malaperis el sia loko. Laŭdire li duonfreneza provis eskapi de sub dornodratoj, kaj estis pafita de gardisto. Tamen tio povis esti nur fikcio, ĉar tiun vesperon neniu aŭdis ian pafon. Pli vere la aŭtoritatularo transsendis lin en sekuran zonon. Kaj Hamada poste denove renkontis lin, kiam li povis reiri hejmlanden: unu el la akceptantaj oficistoj el tiucela oficejo en Nagojo ja estis li mem.

En ĉiu okazo la taktiko aŭ operacio estis sukcesa. La rezultato estis kontentiga. Antaŭ ĉio la eksarmea hierarkio estis faligita. La ĝistiam aparta traktado al la oficiroj kaj suboficiroj fariĝis nur nominala, kaj neniu jam devis iel esprimi sian respekton al ili. Ili jam ne vokis eĉ inter si “Sinjoro Ia Moŝto” sed simple “sinjoro”, kaj vokis siajn iamajn subulojn kun “sinjoro”. Proksimiĝi al Oda ĉiu evitis, sed foje Sugimoto intence iris al li kaj vokis lin, “Hej, sinjoro Oda!” kaj per sia aplombo kaj blufado malagrabiligis lin, kiu tamen ne povis diri ion ajn. La speciala servosoldato iam nuliĝis, kaj kun sia gamelo iama oficiro iris por akvo. Kobayasi estis unu el tiuj. Prave post la rehejmiĝo iu profesoro, kiu iam laboris kiel interpretisto, diris al Hamada: “Por fariĝi sen “ci” kaj kun “sinjoro”, oni ja bezonis viajn

pugnojn !”

En la fino de septembro subite plifortiĝis la famo pri la rehejmiĝo, pri kiu oni ĉiam kaj ĉie reciprokadis la demandon : “Ĉu vi ne havas ian novaĵon ?” Kiel en la tempo de soldateco, la saluto aŭ demando tiel cirkulis ankaŭ en la tempo de la kaptiteco.

— Nun, ni reiros al nia hejmo.

Ĉiu skuiĝis kaj emociiĝis. Oose, la eksartileriano, ĉiam fermis kaj malfermis sian grandan sakon, ne, sakegon, kiun porti nur du homoj apenaŭ povus, kaj kontroladis la enhavon. Iom da dubo Hamada havis, sed al neniuj li diris tion. Suzuki eble same, sed Tukaguti restis tute flegma kaj rigardis aliajn hastemulojn kun siaj “blankaj okuloj”, nome kun kompleta antipatio. Parolante pri la du kolegoj de Oose, Hamada vidis nur la saman sekvon al sia superulo. Takada, la Anaso, jubiladis. Kun Sugimoto Hamada parolis nenion pri tiu famo.

Kaj iun tagon efektive venis kelke da kamionoj al la koncentrejo.

— Ha, rehejmiĝo, la rehejmiĝo !

— *Go home !*

La tuta koncentrejo bolis de ekscitiĝo. Ĉu mia miskalkulo ? Ankaŭ Hamada estis konfuzita. Li devis konfesi en la koro, ke li forte skuiĝis pro la kamionoj.

— Ĉiu oficiro kaj suboficiro kolektiĝu kun siaj proprajoj antaŭ la centralo !

La mikrofono ekipita sur fosto antaŭ la centralo kriis, kaj la estraranoj ekkuris.

— *Go home!* Hura!

— *Go home?*

Iuj mimikis al ŝoforo-nigrulo, kiu ridis kun dentoj blankaj.

— Ha, la rehejmiĝo!

— Hura! *Go home!*

Kiam oficiroj kaj suboficiroj aperis ĉe la pordego de la koncentrejo, oni formis spaliron.

— Hej, mi nepre skribos al via familio.

Kobayasi kaj Oonaka siavice diris kaj premis la manon al Hamada, kiu ankoraŭ ne forlasis ian dubon pri la novaĵo. Ĉu oni fariĝis lerta en la manpremado, se oni manĝas jankiaĵojn? Tia ironio venis al lia koro, sed li detenis sin, por ke li ne ŝoku ilin.

— Hm, mi petas, estu sana!

Ili devis esti nepre observintaj sian promeson, sed lia edzino ricevis nenian informon de ili. Ŝi ja transloĝis en la urbon Toyonaka, kie ŝia patro loĝis, ĉar la domo en la urbo Wakayama estis forbombita.

La restigitoj forokulis ilin svingante manojn. Hamada reiris al sia tendo, en kies angulo Tukaguti sola sidis senvorte. De sia flanko Hamada diris nenion al li, ĉar eĉ li estis jam tedita de lia kutima grimaco kaj flegmemo, foje de la sarkasmo. Ankaŭ io simila al simpatio kuŝis en la koro de Hamada, ĉar Tukaguti rajtus tiam reiri, se li konfesus sian veran rangon. Baldaŭ Suzuki revenis.

La trio sidis tute muta.

Malgraŭ fervora atendo la sekvantan tagon ne aperis kamiono al la koncentrejo. Iuj pravigis, kvazaŭ por konvinki sin mem :

— Ĉar ŝipoj malmultiĝis. Do post semajno oni denove sendos kamionojn, kiam revenos tiuj ŝipoj.

Nova komento trakuris en la ejo, kaj post semajno efektive venis kelkaj kamionoj.

— Starto! La unua bataliono estu preta!

Kredeble nur tiam Hamada eksciis, ke li apartenas al tiu bataliono. La tendoj denove ekbolis de ekscitiĝo kaj ilin ekregis granda tumulto. Kvazaŭ lernejoj knaboj, kiuj ekskursos, ili ĉiuj reciprokadis tiajn kaj ĉi tiajn vortojn. La koro de Hamada ne sen timo kaj dubo ankaŭ forte ekbatis, li devis konfesi al si.

— Ĉu vere la rehejmiĝo?

Li nerimarkite okulis al konata interpretisto, kiu hazarde pretervenis tien. Li skuetis sian kapon nee. Hamada tuj konjektis. Li tamen nenion diris al siaj samtendanoj, ĉar li vidis, ke iliaj oreloj ne havos spacon por aŭskulti tiajn malbonajn vortojn. Ili sciis nur per si mem! Li pensis, sed li devis ankaŭ konfesi, ke lia koro pli forte kaptiĝis de ia maltrankvilo ĉe tiu klara neo. Li cerbumis kaj cerbumis, sed li atingis nenian konkludon pri sia sorto. Prave, ĉar ja por la unua fojo en la vivo li spertis la kaptitecon en la milito.

Ĉirkaŭ unu horo kuris ilia kamiono la unua, sekvis

aliaj kelkaj. Ili atingis lokon kun aspekto simila al la koncentrejo Yaka: troviĝis dornodratoj, fostoĵ kaj gardturoj sed kun kelkdeko da pavilonoj, kiuj povos enteni po kvindek personoj, laŭ lia okulmezuro kaj sperto. Hamada staris sur siaj piedpintoj, sed povis vidi maron aŭ ŝipon nenie, kvankam de sur la kamiono.

— Morgaŭ de tie ni surŝipiĝos.

Oose konvinkis sin, sed la voĉo estis ne forta, kiam ili estis metitaj en unu pavilonon. Ŝajne lia kalva kapo ŝrumpis. Li ja volis forpeli de si maltrankvilon kaj timon per tiuj vortoj. Sinjoro Anaso diris kvazaŭ plore:

— Sinjoro Hamada, ĉu ni reiros?

— Mi pensas, ne.

Hamada duonkolere deklaris. Tukaguti montris siajn dentojn nigrajn pro fumado kaj kapjesis.

— Ŝajnas al mi, li pravas.

Anaso malĝojis. Oose mute rigardis ilin sed post momentoj malforte murmuris:

— Oni ne rajtas diri malbonajn vortojn.

La timida Anaso denove demandis:

— Kio sekvas, sinjoro Tukaguti?

La demandito senkomplete persekutis la etanimon de la kolego:

— De morgaŭ deviga ŝvitlaboro.

— Kio estas tiu deviga...?

— Tio estas, ke almenaŭ sinjoro Anaso laboru kelkajn jarojn en la terkonstruado, sinjoroj jankioj aparte petos de vi.

La deviga ŝvitlaboro! Jes, nepre devas esti tiel!  
Hamada tuj pretigis sin por tio.

— Ŝajnas granda missorto!

Oose denove murmuris al siaj kolegoj, Katayama kaj Nakazima, kuŝigante sin en la mezon de la pavilono.

Tiun nokton venis uragano kaj ŝtormo. Venis tajfuno sur la insulon post la milito. La pavilonoj falis post sufiĉa skuiĝo, kaj ĉiu kaptito devis kuŝi jen sub ia kesto jen sub la kovro de falinta pavilono. Ne helpis ilin provizore tuj fositaj kanaletoj, kaj akvo trapenetris iliajn korpojn ĝis la kalsono. Hamada povis dormi neniom. Por la unua fojo li sopiris al sia edzino kaj fileto, kiun li ankoraŭ ne povis vidi.

*Prisoners of War* (militkaptitoj)

*Labour Camp* (laborkampejo) Sobe

En la sekvanta mateno, kiam la tajfuno furiozinta tra la tuta Okinavo, kun la rapido de kelkdek kilometroj en horo, kuris norden al Kyûsyû aŭ alia loko, kaj aperis serena lazura ĉielo, kiu dubigis, ĉu la hieraŭa uragano kaj ŝtormo povis esti nur sonĝo, li rimarkis tiajn ŝildojn sur la pordego de la koncentrejo, kvankam neniu el ili rimarkis ilin hieraŭ.

Ĉi tiu Sobe, ne malproksime de la okcidenta marbordo, oriente de la haveno Naha, apartenis siatempe al la vilaĝo Yomitan, sed nun ĝi konsistigas unu kvartalon de la nova pli ampleksigita urbo Naha. En tiu ĉi koncentrejo Hamada kaj liaj kamaradoj unu jaron laboris por la



usona bezono, kiu faris el tiu insulo sian bazon por agresi al aziaj landoj, kaj ĝin faris neniel subakvigebla aviadilportanto.

La sama sorto atendis ankaŭ la aliajn kolegojn en la koncentrejo Yoka. Ili estis dislokitaj en sep koncentrejojn kaj devis same labori, ĉiam sopirante al sia hejmo, dum la oficiroj, suboficiroj, vunditoj kaj malsanuloj aŭ koreaj militlaboristoj povis reiri al sia hejmloko. Same civiluloj multe pli frue reiris al sia propra aŭ fremda loko. Inter la kaptitaj civiluloj troviĝis, Hamada poste aŭdis, unu esperantisto, kiu baldaŭ organizis rezistadon kontraŭ la okupado, kaj post kelkfojaj punadoj nun laboras kiel parlamentano de la Komunista Partio de Japanio. Lia nomo: Senaga kamezirô! Kaj ankaŭ alia ekseperantisto. Li nomiĝis Nakasone genna. Tiu ĉi iam estis unu el la fondintoj de tiu partio, kaj verkis iam kelkajn artikolojn por Esperanto.

Ne nur ĉefserĝento Oonogi, serĝento Hamada, sed ankaŭ kelkaj kolegoj de Hamada, kiel Hukui, kiuj false sin titolis kiel suboficiro, povis pli frue reiri al sia loko. Kobayasi kaj Oonaka same, kiel jam skribite. Pri Sugimoto Hamada poste aŭdis, ke li sendiĝis al la koncentrejo Makinato, kaj tie li poste fariĝis unu fokuso de nova konflikto, sed precizan historion Hamada jam ne povis scii.

## 4. Laborkampejo

La aspekto de la koncentrejo ŝajne estis ĉie sama, se temis pri tiuj de la usona armeo.

Oni pikdratumis kampon, kiun buldozoj ebenigis. En ĉiu angulo staris gardturo, kie kun mitraletoj deĵoris soldatoj nigraj aŭ blankaj kaj gardis ĝiajn internon kaj eksteron tage kaj nokte.

Kiam oni eniris la pordegon same el pikdratoj kaj kadro, oni trovis vojon kurantan tra la koncentrejo, kiun japanoj ĉie senescepte nomis iu Ginza, laŭ la nomo de la avenuo en Tokio. Ĝi larĝis dudek metrojn aŭ iom pli. Tuj apud la pordego staris la deĵorejo, aŭ budo aŭ barako por gardantaj ĝendarmoj. Kaj interne de la pordego najbaris, en la okazo de tiu ĉi rakonto, maldekstre la pavilono de la regimenta centralo (oni ne miskomprenu, temis pri tiu de kaptitoj), kaj loĝis la regimentestro, adjutanto, furiero, interpretistoj kaj skribistoj, kaj tie oficis. La aspekto de tiu pavilono multe diferencis de tiuj de la simpluloj. Ĝi konsistis el priĉarpentitaj fostoj

kaj kadroj, kvarflanke maŝumita kaj drelika kovris ordinare nur ĝian tegmenton. Antaŭ ĝi staris cikaso aŭ alia arbeto kaj unu aviztabulo.

Malantaŭ tiu centralo troviĝis kuirejo. Unue ĉi tie oni metis "*ration*", usona porciigita manĝaĵo en vaksita kartono aŭ ladskatolo, kaj de tie liveris, sed iom poste oni instalis tie fornegojn kaj aliajn ekipaĵojn kaj kuiris rizon kaj aliajn nutraĵojn, kiujn la usona aŭtoritatularo eltrovis en iamaj japanaj grotoj, gvidite de tiurilataj japanoj, kaj pli poste, kiam ankaŭ ili elĉerpiĝis, oni aranĝis manĝon el kalifornia rizo aŭ maizo, ambaŭ ne bongusta almenaŭ ĉe la lango de japanoj. Ĉi tiu instalaĵo, kiel tiu de la japana armeo, estis kloako de ĉia kanajlaĵo.

Antaŭ la centralo, nome, dekstre de la pordega interno, staris la pavilono de la kuracejo. Komence ankaŭ ĉi tiu estis simpla primitiva pavilono, tutsame al la aliaj por la simpluloj, sed iom poste oni ŝanĝis ĝin simila al la konstruaĵo de la centralo kvazaŭ ies vilao en la okuloj de kaptitoj. Interne laboris kelkaj kuracistoj same el kaptitaj japanoj kaj asistis ilin iamaj flegistoj aŭ sintitolaj flegistoj, kaj kuracis negravajn malsanulojn kaj vunditojn, sed gravajn sendis al la hospitalo en Kadena. La kuracistoj devis esti ĉiam malkontentaj kaj restis bruskaĵ, ne malofte surŝutis sian malkontenton al pacientoj, ĉar ili mem ne sciis kien direkti sian malbonhumoron. Iliaj kolegoj, la oficiroj, jam frue revenis al sia hejmo, sed ili devis restis nur pro sia specialisteco.

Do la kuracejo, kiel la kuirejo, estis la kloako, kie furoris ĉia korupto aŭ aliaj punindaĵoj. Oni diris, dudek skatoloj da "Lucky Strike" povis doni unumonatan senlaboron, kaj... foje eĉ la rehejmiĝon post ioma alispeca manovro.

Najbare de la centralo, tamen iom disigite per dratoj troviĝis la ejo por la 1-a bataliono, kaj sekvis la 3-a. Apude de la kuracejo loĝis la 2-a bataliono kaj al ĝi kontinuus la ejo por la 4-a. Unu semajnon post la alveno de la 1-a bataliono, t. e. tiu de Hamada kaj liaj kolegoj, venis ankaŭ la aliaj tri batalionoj sinsekve, kaj okupis respektive sian lokon. Kaj eble post unu monato atingis tien la aliaj du batalionoj, kiuj konsistis el la 28-a Divizio, okupintaj la arkipelagon Sakisima, t. e. la insuletoj Miyako, Isigaki, aŭ Daitō kaj aliaj. Ili ĉiuj estis kaptitaj nur post la 15-a de aŭgusto, sen notinda batalo, kaj konsistis el soldatoj en la aktuala militservo. Do ili foje fieris antaŭ la aliaj kvar batalionoj dirante, ke ili kapitulacis nur laŭ la sankta ordono de Lia Tennoa Moŝto malkiel tiuj memvole submetiĝintaj aŭ malhonore kaptitaj, kaj volis ĉiam sin distingi de tiuj. Dum aliaj kaptitoj, kvankam ne kun iaspeca estimo almenaŭ surbuŝe, ne konsentis pri tiu ilia fierindeco, ĉar, ili diris, ili ja ne spertis tiun intensan batalon kaj ricevis nur la bombardojn el la maro kaj ĉielo, nome, ili tute ne konas la militon. Tamen ĉi tiu blufu kredeble utilis neniom por persvadi la alian flankon, aŭ eĉ ilin mem.

Krom la ejoj por ses batalionoj ankoraŭ restis spacoj

por du batalionoj en la plej profunda loko, sed ĝis la fino venis neniu por pleniĝi ilin. Kaj ĝuste sub gardturo, interne de la palisaro najbara de la 6-a bataliono, troviĝis spaceto, pikdratumita, ĉirkaŭ 20 kvadratmetra, kaj en ĝia mezo staris nur fosto. Oni diris ke ĝi servas kiel detenejo de kulpuloj. Hamada tamen forridis ĝis tiu tago, kiam li mem devis konatiĝi kun tiu spaco.

Kiam oni eniris kian ajn batalionan palisaron, oni trovis fronte la pavilonon de la bataliona centralo, kie deĵoris kaj loĝis la estraranoj, same kiel tiuj de la regimento, la batalionestro, du rotestroj, skribisto kaj aliaj. Ĝi estis preskaŭ samaspekta kiel tiuj de la simpluloj, sed la enhavo... tute alia, nome tie same reĝis kloakanoj, — nur subklasaj.

Malantaŭ tiu ĉi trivice staris pavilonoj, kun sufiĉe larĝaj du vojoj. Pavilonoj najbaris unu al aliaj, preskaŭ kontinue, nur kun spaceto dumetra aŭ iom pli, kaj la stajoj de najbaraj pavilonoj estis starigitaj interkruce ambaŭflanke de kanaletoj fositaj malprofunde. En ĉiu pavilono loĝis 50 kaptitoj, kiuj faris unu subplotonon, kaj 4 subplotonoj faris 1 roton, kiu kun alia 1 formis la batalionon. Nome la bataliono konsistis entute el 400 personoj, inkluzive la estraranojn, se ne mankis la kontingento pro iu akcidento aŭ simila io, ekzemple eskapo, malsaniĝo aŭ vundiĝo. Ne estis certe, ĉu en tia okazo oni kompletigis la kontingenton aŭ ne.

La batalionestro estis nomita Kawamura. Li estis tiu, kiu ĉiam lecionis aŭ prelegis pri la moralo en la

koncentrejo al ĉiu novulo, kiam ĉi tiu venis en la koncentrejon Yaka. Li sin titolis subkaporalo de iu trupo, sed ial neniu ŝajne kredis tion. Dikmalalta, fortike konstruita, rapidmova, kun adampomo ruĝa sendube pro forta drinkado, li ne estis amata de ĉiu kaptito, sed ŝajne de ĝendarmoj jes, kaj ĉiam tiuj vokis lin intime: Kawamra, Kawamra, akcento ĉe wa kaj -mra, sed ne -mura, malkiel japanoj, kiuj akcentas ĉe Ka. Li tamen havis penetran kaj klaran voĉon, kiu sufiĉis por montri, ke li iam spertis komandon.

La homo ja estas stranga estaĵo. Hodiaŭ Hamada neniel povis imagi al si la trajtojn de la regimentestro, kontraŭ kiu li devis lukti. Certe li estis tia, kia estis la tipo de japana soldato, solidpaŝa, ne alta, muskolriĉa kaj flatŝata subkaporalo el iu trupo.

La estro de la 2-a roto sin nomis Naiki. Propradire li laboris en la urbo Kanazawa kiel komizo de iu asekurkompanio, kaj versis hajkojn sub la gvido de iu konata hajkisto. Post la rehejmiĝo Hamada foliumis kelkajn numerojn de tiu hajk-gazeto, li tamen povis trovi nenie lian nomon. Kredeble tiu Naiki ne estis lia vera nomo, kiel kutime en la kaptiteco. Altastatura, maldika, blankvizaĝa kaj kun okulvitroj kun metalaj kadroj, li restis ĉiam modera, kaj parolis delikate kun siaj subuloj.

Pri la 1-a rotestro, sub kiu troviĝis Hamada, oni diris, ke li estis iam stratbubo en la urbo Hiroŝimo. Muskolriĉa li povis karakteriziĝi per siaj nigraj vermosimilaj brovoj. Li ĉiam portis novan kaj bonfaldan

pantolonon. Li estis la unua, kiam oni devis iun puni fizike. Liaj pugnoj multe kontribuis al la ordo de tiu koncentrejo. Japanoj diras: helpi malfortajn kaj disciplini fortajn. Tukaguti ofte sarkasmis pri li, ke li helpas fortajn kaj disciplinas malfortajn. Cetere li estis tiu, kiu venis "elvoki" japanajn venkitojn kune kun usonaj soldatoj al la marbordo de Gusigami, orienta marbordo de Mabuni, kie Hamada kun siaj du kolegoj estis kaptita. Do oni nepre devis lin danki pro sia savita vivo, sed neniu montris ian dankemon al li kredeble pro lia karaktero, impertinenta antaŭ subuloj kaj humila antaŭ superuloj. Hamada povis imagi de li ian humilaĉan kanajlon en polica arestejo, kie multaj tiaspeculoj nestis.

En tiuj ĉi kondiĉoj Hamada, Suzuki, Oose kaj liaj kolegoj, Tukaguti kaj sinjoro Anaso en la sama subploto, nome en la sama pavilono, devis pasigi komunan vivon preskaŭ unu jaron.

La ellitiĝo (efektive litoj ne troviĝis por ili) okazis la 6-an horon. La pretiĝo por iri al laboro la 8-an kaj la laborfino la 17-an. La reveno de laborejo okazis ĉirkaŭ la 18-a. Ĉi tia estis ilia tagordo preskaŭ ĉiam sama. Post vespermanĝo ili estis tute liberaj. Do ĝenerale dirite, iliaj vivkondiĉoj estis multe pli bonaj ol tiuj en Sovetio. Oni devas konstati tion unue.

Cetere ĉi tie notindas, ke Hamada tiutempe hazarde trovis, ke sur usona gazeto, — ĉu *Newsweek* aŭ *Life*? — lia longtempe estimata kamarado Eŭgeno Varga artikolis, en la angla traduko: La japanaj imperiistoj

detruis nian Sovetion, la patron de la socialismo, do ili mem prave devas rekonstrui ĝin! Ĉi tie la ekonomikisto montris sin tute fremda al la socialismo, nome li ne scipovis distingi regatojn de regantoj, laboristojn kaj kamparanojn de kapitalistoj kaj bienuloj. Tamen Hamada siatempe ankoraŭ ne povis dubi pri la sovetia socialismo; — (Hamada tiam ne sciis, ke lia Stalin parolis en granda aplaŭdado: Ni venĝis nin pro Port-Arturo.) — tion li atingis nur post la jaro 1950, kiam la Komunista Partio de Japanio skismiĝis pro la interveno de Kominformo = Sovetio aŭ de la stalinismo.

Ĉia supozebla laboro, se temis pri fizika, ne mankis al ili. Nur malofte Hamada povis trafi ian intelektan laboron, sed nur, ekzemple, presi ion per manmanipula multobligilo. Sed plejparte simpla fizika laboro atendis ilin, kiun povis plenumi nur la manforto. “La plej granda missorto”, laŭ la esprimo en la hazardludista termino, estis la cement-laboro, en kiu oni devis porti surdorse cementsakojn, de kamiono al laborejo, aŭ miksi cementon kun sablo kaj akvo, aŭ porti la tiel miksitajn al konstruejo per ĉarumo puŝe. La gudrado al la malsupraj partoj de kamiono apartenis al tiuj missortoj. Oni devis eniri en tranĉesimilan foson kaj de tie per ŝprucpistoilo ŝmiri la bezonatan parton de kamiono, kiu staris sur tiu foso, kompreneble surŝutite per la nigraĵoj tutkorpe, de la kapo ĝis la gamboj. Kompare kun ili simpla terfosado estis multe pli bona, kvankam



ŝvitiga. La plej feliĉa estis la ordigo de soldata tendo kaj la laboro en kuirejo. Ambaŭokaze oni ne malofte donis aŭ cigaredojn aŭ manĝaĵojn kaj aliajn objektojn sen peno por “batalfrukto”.

Sed krom tro malofta escepta okazo ankaŭ tiuj mis-sortaĵoj mem estis ne tiel pezaj, — por la honoro de la usona armeo la aŭtoro devas deklari ĉi tie, — kompare kun la laboro de japanaj laboristoj aŭ kampuloj, kvankam Hamada mem ĝis tiam neniam spertis tian fizikan laboron. Eĉ se en terkonstruado, se oni ŝajnis sin pene laboranta, la gardistoj restis preskaŭ ĉiam senriproĉaj. Precipe nigraj soldatoj estis mildaj malgraŭ sia aspekto. Iuj ne malofte kondukis siajn subulojn-kaptitojn al ia kaŝita loko ombroriĉa, kaj kun alternigataj pikadanoj ofte siestis kune. Nur la diskriminacioj konas kompati la mizerulojn. Hamada ofte diris al kolegoj, ke la japana soldateco estis pli drasta, drakona ol la kaptiteco en la usona mano. Tamen kompreneble troviĝis esceptoj. Kaj tiuokaze oni ĉiam pelis tien kaj ĉi tien, kaj laborigis por tio, kio klarvide celis nur la konsumon de la fizika forto, kaj urgigis: “*Haba, haba!*” (“*Rapidu, rapidu!*”)

La ĉiutaga laboro okazis jene. Post la manĝo oni kriis: “*Enviĝo!*” kaj alterne laŭ bataliona vico oni enviĝis apud la pordego, kien alkuris kamionoj kondukataj de usonanoj, kaj po 50 por unu kamiono ili ricevis kaptitojn, sed esceptokaze nur 20 aŭ iom pli, kaj maksimume 300 aŭ iom pli. Komence oni ne sciis

distingi kiuj soldatoj el kiuj trupoj, sed baldaŭ oni ekpovis distingi ilin laŭsoldate. Cetere jam tiam oni eksciis: parolante pri negroj troviĝas multaj diferencoj, ekzemple duonnigra, kvaronnigra, okonnigra kaj tiel plu, kaj la mienoj mem, tute prave, ne estis identaj sed havis grandan diferencon kompreneble. Tiam tuj facile distingeblan diferencon Hamada eksciis nur post duonjaro de sia kaptiteco. Kiam oni eksciis preferi laboron, oni diversmaniere penis eviti malfacilajn laborojn, jen irante al necesejo malgraŭ sia vico jen pretekstante ion ajn. Cetere jam tiam la flanko de "labordonantoj" mem ekmontris elektemon kaj intence prenis nur tiujn, kiuj intimiĝis al tiuj; tio okazis precipe ĉe nigraj soldatoj.

Hamada tamen havis sian propran opinion. Li ne volis eviti ĉian malfacilon malgraŭ sia nefortikeco. Verdire, kvankam li iam laboris inter laboristoj kiel organizisto de sindikato, tamen li ĝis tiam spertis preskaŭ neniam fizikan laboron krom en duonjaro, en kiu li laboris en iu fibroindustria fabriko, kien li penetris nur por organizista laboro, kaj ne sciis, se diri troiĝe, distingi tornilon de alezilo. Do li decidis, ke almenaŭ dum sia kaptiteco li laboru efektive fizike kiel simpla laboristo, kio multe kontribuos al li mem por lia posta ago. Poste Hamada devis konstati, ke tiu ideo venis ankaŭ de lia misjuĝo, kiun la Komunista Partio de Japanio mem same faris pro la veneno de la stalinismo: la usona aŭ alianca armeo apartenas al la demokrata emancipa forto.

Hamada ne sciis, kian opinion siatempe havis Suzuki,

sed ankaŭ tiu ĉi agis preskaŭ same. Tukaguti ĉiam kun sia indiferenta mieno ne elektemis. Do iusence ilia roto havis tri strangulojn. Oose kaj aliaj. . . senbezone paroli. Nun Hamada ankoraŭ hodiaŭ povas ŝerci, ke li estis unu el la fondintoj de la Universitato de Ryūkyū, pro tio ke li fosis kelkajn kanaletojn sur ĝia tereno kaj dorse portadis cementsakojn por ĝi.

Ĉiu, kiu havis ian kontakton kun usonanoj, senescepte estis mirigita aŭ konsternita de ilia malintelekto, kompreneble en ilia ĝenerala nivelo, precipe pri tiuj, kiuj siatempe laboris en la marsoldata korpuso en Okinavo en 1945-46. Ili ne scipovis kalkuli parkere la nombron de kaptitoj starantaj kvinope, kaj ĉiam ĝenis tiujn per senbezona longa starado. Ja usonanoj legis nur komikaĵojn kun "Blondy" kaj ĉasis nur la sidvangojn de virinoj kun fia krieto: "*Push! push!*". Kaj alia escepto. Iu usona serĝento iam donis al Hamada la gazeton "Akahata" ("La Ruĝa Flago"), la organon de la Komunista Partio de Japanio, restarigita post la milito, kaj parolis al li pri la japana progresema verkisto Kobayasi takizi. Sed tia specimeno estis tro rara, rarega. Parolante pri esperantisto li renkontis neniun, sed foje vidis iun buldozon, sur kies flanko troviĝis grandaj verdaj literoj: Verda. Li tamen ne sukcesis trovi tiun personon en sia mallibera stato. Hamada atribuis tiun malintelekton de usonanoj al la granda progreso de la tekniko en tiu lando, kaj parte al la malalta nivelo de frontaj soldatoj. Ĉu li pravis aŭ ne, li ankoraŭ nun estas malcerta.

Tiutempe sur la insulo Okinavo troviĝis sep koncent-rejoj: Rycom (Komandejo de la usona armeo en Ryūkyū = Okinavo), kiu staris apud tiu instalaĵo de la usona komandejo en Syuri (nun aneksite: Naha); ĉi tiun oni povis konsideri kiel la komandejon aŭ korpusan stabon de la kaptitoj, kaj en Sobe, Makinato, Oroku, Yaka, Isikawa kaj ankoraŭ unu alia ie. Kaj ŝajne tiu de Sobe estis destinita por la laboroj en la staplejoj en Kadena kaj apuda aerodromo (tiu terzono poste fariĝis la plej granda bazo de Usono kontraŭ la aziaj landoj), kaj foje oni iris ankaŭ al Rycom aŭ al la ambulanco sur la kabo Zanba, al la jam menciita universitata tereno, kaj aliaj proksimaĵoj. Do unuvorte Hamada kaj aliaj laboris precipe en la suda parto de tiu insulo.

La staplejo de Kadena estis unu el la plej riĉaj ejoj de la “batalfrukto”, kvankam tiea laboro ne estis tiel facila. Tie oni malstivis per vinĉoj diversajn nutraĵojn en kestoj, diversajn materialojn por konstrua laboro. Kaptitoj devis porti ilin surŝultre aŭ surdorse kaj amasigi aŭ foje malamasigi ilin en aŭ de iaj difinitaj lokoj en aŭ el ia difinita formo aŭ ordo surkampe kaj kovri aŭ malkovri per dreliko, aŭ fiksi aŭ malfiksi per dratoj kaj stajoj. Kredeble ĉiun tagon tien venis 300 personoj dum pli ol duonjaro.

Oni rompis tie kestojn per diversaj metodoj kaj deprenis la enhavon. La plej granda “batalfrukto” estis biero en ladskatolo. Ĝi estis multe malpli densa ol

la japana, tiel ke oni povis ŝerci: “Ĉu usonaj kapitalistoj estas ja avaraj kaj miksis akvon en la bieron?” La dua estis cigaredoj. “Lucky Strike” estis la plej amata, sekvis “Camel” kaj “Phillip Morris.” Ankaŭ bovaĵa skatolo el Aŭstralio estis preferata. Meleagro, laŭ ili, meritis nur kiel koko. Vinbera suko ne estis tiel amata krom en ŝvitiga vetero. Por distingi ilin unue kontribuis tiuj, kiuj povis legi la etiketojn, sed pli poste ĉiu majstris la arton kiel distingi laŭ la desegnaĵoj sur la kestoj. Nur malofte do oni rompis keston de vinagro.

Komence oni timis eventualan malkovriĝon de sia “batalfrukto”, sed pli kaj pli oni fariĝis tiel sentima, aroganta kaj aŭdaca, ke oni devis kontroli ĉies korpon ĉe la pordego de la koncentrejo. Oni palpserĉis korpon de sur vestaĵoj, kaj la kaŝejoj pli kaj pli iris profunden, ekzemple ĉe testikoj. Foje malfeliĉulo, kies kaŝita trezoro estis tro granda por simpla skoldo, devis staradi dum kelkaj horoj ĉe la pordego, sed plejparte nur ĝis tiu vespero. Sed tiuj missortuloj estis ne tiel multaj, kaj la aŭdaca “batalfrukto” ĉiam pli grandamase enfluis en la ejon.

En la subplotono de Hamada plej entuziasme gajnis “batalfrukton” Oose kaj liaj du kolegoj. Ili amasigis al si ĉiuspecajn objektojn, tiel ke fine ili povis provizi sin per du grandaj sakegoj manfaritaj el dreliko. Tukaguti nur malofte, sed tiokaze li nepre gajnis la plej rimarkindan “batalfrukton”. Hamada kaj Suzuki ĝisfine restis tute sentaŭgaj en tiu arto kaj al ili ĉiam mankis

necesaĵoj. Miyata en alia roto kaj Takada foje liveris al Hamada cigaredojn kaj aliajn objektojn. La memfido aŭ fiero ne permesis ja al Hamada, li pretendis en sia koro, sed reale li ne havis tian kapablon, kvankam li en la unua fojo montris sian kapricon kaj per tio admirigis siajn kamaradojn.

Nenio atendis ilin post la taglaboro. Oni diris, ke la internacia konvencio garantias la korespondan liberon al la kaptito, sed tra la tuta tempo Hamada ricevis nenion de sia edzino, dum li mem skribis pli ol tri fojojn, kaj la edzino asertis post lia reveno, ke ŝi plurajn fojojn skribis al li.

Sekve aŭ nesekve kaptitoj ĉiun vesperon entuziasmis en ĉiuspeca hazardludo. Oni distranĉis kartonojn en konvena formato kaj sur ili pentris per farboj diverskoloraj kaj tiamaniere faris por si t. n. "flor-kartojn" (speco de japanaj ludkartoj, modifitaj el tiuj de Eŭropo aŭ alia loko), kun ĉia miniatura arto tiel bele, kiel la vendataj en japanaj magazenoj. La vetaĵo estis kompreneble cigaredo. En tiu ĉi mondo la cigaredo ludis la rolon de la mono. Ekzemple oni aĉetis pantalonon tute novan per 20 skatoloj da cigaredoj kaj botojn nenovajn per 5 skatoloj.

El lignopecoj oni faris pecojn por la ŝogio aŭ por la maĝango same majstre. Oni ĉizis ilin miniature kaj sperte, kaj inkumis en la enĉizitajn literojn same kiel ĉe la vendataj.

Tiamaniere ĉia ludilo, krom la goo pro la malfacileco

kolekti pecojn, troviĝis en ĉiu pavilono. Inter la “batalfruktoj” troviĝis ne nur tiuj ludiloj, sed ankaŭ, poste malkovriĝis, eĉ revolvero.

Krom en pluva tago oni ordinare la trenaĵon de pavilono lasis supren levita, tiel ke oni preterire povis enrigardi almenaŭ la suban parton en la pavilono. En la mezo staris tri aŭ kvar fostoj vice, kaj ĉirkaŭe po kelkaj en ĉiu latero. En la mezo pendis lampo unue benzina poste elektra. La planko estis alta ĉirkaŭ 30 centimetrojn, kiun kaptitoj mem aranĝis per ligneroj kaj tabuletoj. En la okazo de la subplotono de Hamada, unue Tukaguti faris plankon nur por sia spaceto, sed poste ĉiu tiel imitis, ke fine oni elfaris komunan plankon. En la aliaj pavilonoj oni same faris tiel. Eble tio ne estis inventita de Tukaguti sed de la komuna saĝo de mizeruloj, aŭ ĝenerale de la homoj. Oni metis sur tiu planko kvaroble falditan litkovrilon kaj ĉe la kapa parto oni metis unue keston el kartono aŭ ligno, poste metis sur tiun alian keston, kaj en ĝi aŭ ili oni metis siajn ĉiutagaĵojn. Ĉe la pieda parto oni metis sakon manfaritan aŭ ion. Tio estis la spaco por unu viro.

Por rakonti pli detale oni bezonus tutan volumon, do por fini la aŭtoro devas rapidi per unu epizodo. Iun tagon ie unu usona soldato trovis, ke iu kaptito posedas japanan flagon de la leviĝanta suno, kies ĉirkaŭon kovris multaj aŭtografoj kaj la vortoj “Por via feliĉa batalo!”. Ja japanoj kutime donis tian flagon al sia amiko, edzo aŭ

filo, kiun mobilizis la armeo. Jes, en ĝi esprimiĝis ilia deziro ne morti sed reveni sana. Tiu usona soldato estis interesita kaj proponis interŝanĝi kun cigaredoj. Jes, 20 skatoloj da "Lucky Strike"! Do la bonsortulo akceptis la proponon volonte. De tiam ekfuroris la flago. Kompreneble la japanoj ne havis tian flagon post la severega batalo. Iu unue elŝtelis ŝtofon kaj ruĝan inkon, kaj sammaniere ankaŭ nigran inkon aŭ ion similkoloran al tuĉo, kaj lerte elfaris la pseŭdaĵon. La saĝulo ĝuis grandan sukceson. Do sekvis multaj sammaniere. Ĉar tia flago povis simboli por usonanoj, ke ili devis brave batali kaj akiri ĝin de kadavro, la modo ekregis probable la sferon de la usonaj soldatoj. (En tiu laboro Hamada kontribuis nur per sia ŝercaĵo, nome li ofte skribis anstataŭ sia nomo fantaziajn nomojn de la famaj herooj en popularaj romanoj, aŭ eĉ la nomon de la tennoo "Hirohito".)

Kaj fine — unu tagon unu negro aperis kun blanka ŝtofo kaj aliaj aĵoj kaj ordonis: "*You make!*" ("Vi faru!")

La koncentrejo pli kaj pli ekhavis sian ordon. Oni faris unue banejon sed nur kun planko kaj duŝilo, kio ne plaĉis al japanoj kutimiĝintaj al bankuvo. Do oni alportis de ie benzinskatolegojn malplenajn, kaj instalis ilin sur brikoj kaj metis fajron sub ili. Po unu persono oni povis mergiĝi en ili. Barbirejo ne ekzistis komence. Do oni devis tondi la harojn per tondiloj de "batalfrukto" kaj razis sin per samdevenaj raziloj. Oni reciproke barbiris tiel. Hamada ne povis kompreni fine, kial tiuj



kalkulemaj japanoj bonvolis servi senpage al kolegoj. Tamen li mem povis ĝui tian senpagan laboron, sen kio li povus esti kiel nuntempa junulo barbokovrita kaj kun distaŭzitaj haroj longe pendantaj.

Teatra trupo naskiĝis. Unue oni prezentis nur jam popularajn melodramojn, sed iom poste naskiĝis originalaĵoj. Tamen la enhavo ĝenerale estis ne rimarkinda. Hamada kaj liaj kamaradoj poste devis memkritiki sian agmanieron, kiu ne kapablis utiligi la teatraĵon post ĉio. Oni faris belan scenejon el traboj kaj tabuloj, dekoracio aŭ prilumo ne mankis, kaj unu fojon en monato oni tie prezentis ian, kian foje ĝendarmoj mem vizitis kaj kune aklamis.

Kelkajn fojojn la usona flanko prezentis filmon. Sed la enhavo ne plaĉis al la japanoj, ĉar ĝi, fabrikita por stimulo al la usonanoj, ĉiam laŭdis nur ilian flankon, kaj cetere en la angla lingvo; precipe la scenon de la usona unuflanka venko japanoj ne ŝatis. Vidi ekzemple bruligatajn kolegojn per fajrojeto aŭ distretatajn de tanko ne estis agrable kompreneble. Do baldaŭ la filmoprezento malaperis de la repertuaro de la koncertejo.

Dume Hamada kaj Suzuki fervoris organizi grupeton, kiu eventuale povas eduki aŭ reeduki kaptitojn kaj adapti ilin al la situacio multe ŝanĝita de tiam, kiam ili devis forlasi sian hejmon. Ili penis instrui, kio estas demokratio. Hamada nun bedaŭras, ke li tiam efektive ne konis la kvintesencon de tiu ideo. Por li la demokra-

tio kaj socialismo havis preskaŭ saman signifon, kiel en la hejmlando mem, ĉar li vivis sub la bestia regado de la absolutismo.

La iamaj kamaradoj en la armeo estis for, kaj restis nur Miyata, kaj kiel sekvanto Yosino, sed ambaŭ en alia roto, el kiuj nur la unua foje montris sian amikecon, sed pli kaj pli li reiris al sia denaska kampuleco. Sugimoto laŭdire estis en Makinato. Al Hayasi, nun la estro de la 2-a bataliono, la iama Makku Aasaa, li penis proksimiĝi, sed ial Hayasi de sia flanko ne volis tion, foje eĉ montris abomenan mienon. Kredeble li prenis lin kiel ultramaldekstrulon, kiu volis ĉie elvoki konflikton. (Post la rehejmiĝo tiu Hayasi kelktempe laboris kiel estrarano de iu organizo gvidata de Kompartio, sed kiam komenciĝis la korea milito kaj la cirkonstancoj iĝis malfavoraj al tiu organizo, li ekŝiĝis de ĝi kaj nun estas kvartala mastraĉo en la urbo Osako.)

Tamen ili sukcesis akiri kelkajn junulojn ĉefe el la 5-a kaj 6-a batalionoj. Al ili li ofte iris por paroli pri la japana historio, ĉar detruis la superstiĉon pri la tenoo estis la unuasignifa laboro. Iu tiutempe hazarde donis kelkajn numerojn de la taggazeto "Uruma Sinpō" (Gazeto Uruma = Okinavo), en kiuj troviĝis la kolumno pri la origino de la tenoo, verkita de fama historiisto Hani gorō, progresema historiisto kaj simpatianto por Esperanto, iam disĉiplo de Kuroita katumi, la pioniro de la japana historio kaj samtempe de la japana esperantista movado. Do Hamada senbedaŭre ekspluatis la enhavon.

Ĉi tiu artikolo esence estis ne senmanka kaj tro epizodema, sed iel klarigis facilkomprene la sencecon de la tennoismo. Kelkaj kontraŭagis rekte al lia vizaĝo, precipe junuloj el Miyako, kaj foje eĉ volis lin bati kiel naciperfidulon, sed li iel kaj iel povis sin elturni, kaj fine sukcesis persvadi almenaŭ kelkajn, kiuj tamen en la definitiva momento ne formis avangardan parton.

## 5. “Venkis ne la japanoj!”

Hamada ne scias, kiom da kaptitoj siatempe troviĝis sur la insulo Okinavo, sed li povas supozi jene: la koncentrejo Sobe konsistis el unu regimento, el 6 batalionoj, kaj ĉiu bataliono havis kontingente 400, do entute 2 400, kaj se aliaj ses koncentrejoj ampleksis la saman nombron, tiam la tuto devis esti 16 800. Sed efektive la nombro ne estis sama, ekzemple tiu de Rycom havis nur 400. La usona aŭtoritatularo diris, ke sur la insuloj mortis 102 000 kaj kaptiĝis 10 000 el la tuta soldataro 237 640; kaj aliaj ciferoj diris: mortis 107 539 (nur konstatitaj) kaj kaptiĝis 9 401. Al tiuj ciferoj oni devas adicii la nombron de la transsenditoj el la arkipelago Sakisima situanta inter Okinavo kaj Formoso, de 1 divizio kaj 2 brigadoj, kaj subtrahi la nombron de la oficiroj, suboficiroj, malsanuloj kaj vunditoj, pli frue resenditaj, do totale: proksimume 13 000 aŭ 14 000.

Jam pasis la jarfino de 1945, venos baldaŭ printempo al la hejmlando, sed neniam indico por ilia resendiĝo, dum

aliaj "altranguloj" jam foriris en la pasinta jaro. La malkontento kaj incitiĝo pli kaj pli kreskis, ĉar la timo pri la puno pro la kaptiĝo jam forvaporigis de iliaj koroj, kaj nur brulis en ili la sopiro al sia hejmo, al sia familio, kiu devis esti maltrankvila pro la ĉiutage kreskanta inflacio. Ankaŭ la seksdeziro estis unu el la plej gravaj motivoj, ĉar temis pri viroj maturaĝaj kaj ne tro maljunaj.

En tiuj kondiĉoj Hamada kaj liaj kolegoj projektis ĝeneralan strikon de ĉiuj 7 koncentrejoj, kaj por tio ili fiksas provizore la daton por strebi: la unuamajo de 1946.

Hamada nun devas amare konfesi pri sia troa subjektivismo. Ili mem havis nenian rimedon por kontakti kun la aliaj koncentrejoj, sed metis sian esperon nur al tio, ke se ili mem lanĉos la batalon unua, aliaj sekvos sammaniere, sed nenia bazo ekzistis por certigi tion. Do ili devis esti nur subjektivistoj kaj simplaj naivaj idealistoj, sed neniel materialistoj, kvankam li mem ĉiam predikis pri la doktrino: materialismo kaj dialektiko.

Spite iliajn naivajn kalkulojn ĉiutage kaj ĉiuvespere kreskis la tensio en la koncentrejo kaj laborejoj, ĉar la amaso mem deziris tion, tute senrilate al la projekto de Hamada kaj liaj kamaradoj. Ne nur en pavilonoj sed ankaŭ en laborejoj ili penis por persvadi por la striko, sed senkoncerne al tia predikado la amaso mem komencis iel aktivi por la postulo pri la rehejmiĝo.

*"Go home!"*

La sola slogano devis esti nur tia, sed Hamada donis

anstataŭ tio “unue demokratiigon de la koncentrejo” per ĝenerala elekto de la estraro, kiu sentime negocos kun la usona aŭtoritatularo. Grandega eraro! Tamen li siatempe ne sciis tion, sed nur post la eksplodo.

En la 2-a bataliono, la estro Hayasi, nome tiu Makku Aassa, ŝajnis plene ekspluati sian postenon kaj agitadi. Li tamen tute ignoris aŭ volis ignori la movon de Hamada kaj liaj kamaradoj, kiuj volis unue organizi grupeton komunistan aŭ similan kiel la kernon de la movado, jes, laŭ la abocolibro de la komunismo. En tiu bataliono, alia elektro-laboristo el la gubernio Gihu, kies nomon Hamada nun ne povas rememori, kunlaboris parte kun Hamada parte kun Hayasi. En la 3-a bataliono, viro nomata Sobe zensaburô, kies veran nomon neniu sciis, laboris por tiu agitado kaj organizado por la rehejmiĝo. Li sin nomis poeto, disĉiplo de la konata poeto Satô sônosuke kiu versis pri tiu insulo tre multe, kaj iam versis kanzonon “Elegio de Sobe”, kies fragmentoj ankoraŭ nun restas en la cerbo de Hamada. “Post la batalo floras. . .” aŭ “Mi iĝis kaptito bedaŭre. . .”. Hamada, denaska senmuzikulo, ne povis kanti nek povis memori la tuton parkere, kion li mem nun elkore bedaŭras. La kanzono estis furora longatempe ĝis ilia rehejmiĝo, kaj krome lia talento pri la muzikilo “zyapisen”, nome, praŝamiseno furora en tiuj insuloj, estis alte taksata, tiel ke li povis esti amata kanzonisto en la koncentrejo. Li estis indiĝena civilulo de tiu insulo, sed

li sin falsnomis soldato, por ke li povu iri al la ĉeflando per tio, ĉar lia familio loĝis tie, evakuite antaŭ la ekbatalo.

Oni agitis ĉiuokaze pri la rehejmiĝo aŭ demokratiigo de la koncentrejo, unue nerimarkate, sekrete, sed ĉiam pli ekkuraĝis, kaj fine agis preskaŭ publike eĉ antaŭ la koncentrejaj estraranoj aŭ usonaj soldatoj, kaj la atmosfero fariĝis pli kaj pli minaca kaj eksplodiga, kaj la movado subite kaj rapide disvastiĝis tra ĉiu pavilono kaj roto, kaj ĉiu bataliono kaj la tuta regimento. Oni havis plurfoje malgrandajn kunsidojn aŭ interkonsiliĝojn, kaj ĉie formiĝis spontane ia kerno. La grupo de Hamada kaj Suzuki pli vigliĝis en tia etoso, sed ĝi restis ĉiam nur unu el kelkaj.

Ĉie, ĉu en pavilono ĉu en laborejo, oni demonstracie skribis sloganojn japane kaj angle. Se gardisto restis malatenta momente, oni tuj farbis ne nur sur la korpo de kamiono sed ankaŭ sur pretervoja usona tendo. En la lasta stadio oni skribis sur sia jako najbare de P. W. aŭ sur la rubando de sia ĉapo :

*Let's go home!* ("Lasu nin reiri al la hejmo!")

*No hope, no work!* ("Sen espero, sen laboro!")

De sur kamiono por laborejo aŭ por la koncentrejo oni alkriis preterpasantaj kamionojn, kiuj venis de alia koncentrejo. Kiuj laboris en la staplo de Kadena, skribis farbe tiujn sloganojn sur ĉiu bontrova kesto, esperante ke oni sendos ilin al aliaj koncentrejoj. Projekto ŝteli multobligilon ne sukcesis, kvankam tiu ideo venis de tiuj

veteranoj de “batalfrukto”.

En la mezo de aprilo, la centralo de la regimento, kiu ektimis pro la ondoj ĉiutage kreskantaj kaj furiozaj, kontaktis kun la ĝendarma estraro pere de tiu de Rycom, sed sen konsiliĝo al la simpluloj, kaj prezentis peticion al la komandanto de la usona ĝendarmaro, iu McCoy, kaj apelaciis al la tuta regimento: “Oni ne estu hastemaj, sed atendu pacience tuj venontan respondon.” Post kelkaj tagoj oni algluis tiun respondon en la angla kun la japana traduko sur la aviztabulo antaŭ la centralo: “Ĉion decidi rajtas nur la usona prezidento. Via peticio estis sendita al li. En ĉiu okazo vi atendu kviete kaj trankvile la venontan respondon. Blinda movo povas nur prokrastigi vian rehejmiĝon.”

Kompreneble tia respondo ne povis kontentigi la kaptitojn nek trankviligi la skuiĝon unufoje komencitan. Kontraŭe ĝi donis konvinkon, ke oni devas pli firmigi sian decidon kaj energie agi. Almenaŭ oni ja povis eltiritian respondon de la flanko de la ĝendarmaro nur per tia ago, do ankaŭ oni povos iel tratabi sian vojon por la rehejmiĝo, kaj ĝis tiu celo plenumiĝos, oni devos agi kaj movi la estraron, kaj tiel plu.

En la sekvanta tago, la 23-an de aprilo, vespere ĉirkaŭ la 7-a horo, oni alvokis la kunvenon de la reprezentantoj de ĉiu pavilono laŭ la iniciato de Hamada, kiu konis nur la taktikon de Profinternio: kunvoki reprezentantojn de ĉiu laborejo kaj starigi komunan kunagon. La kunsido okazis en la malplena palisaro najbara de la 3-a



bataliono. Venis tien preskaŭ reprezentantoj nek elektite nek komisiite, sed nur volontuloj aŭ memvoluloj sen mandato. Do nature foje du-tri personoj el sama pavilono, sed neniu el certaj pavilonoj. Kredeble ne mankis ankaŭ blufuloj, eĉ spionoj. Sed ĉiuj aktivuloj krom Hayasi kolektiĝis. Suzuki volis sin levi por venigi Hayasi, sed iu alia haltigis lin dirante: “Li kredeble havas alian opinion, lasu lin kiel li volas! Ŝajne li volas alkroĉiĝi al sia posteno.”

Kvankam jam estis la 7-a horo vespere, tamen la printempa tago de la suda insulo ankoraŭ restis luma, kvazaŭ en taglumo.

Suzuki ekparolis, post la klarigo de la signifo de la kunsido, li proponis kiel prezidanton Sobe zensaburō. Oni akceptis la proponon kaj nomis lin prezidanto sed sen aparta seĝo, sen podio kompreneble. Do oni nur lian kapon povis vidi de ekster la rondo kun bruoj.

Fervore sed iom senorde Sobe prezidis. Sur la vojo al la regimenta centralo kelkaj junuloj kun ŝtonoj en sia poŝo staris pikede kontraŭ eventuala atako fare de la centrala estraro. La ĉefo de la pikedo estis tiu, kiu iam forte kontraŭargumentis al Hamada, parolanta pri la neceso de la abolo de la tennoismo. En la kunsido Hamada parolis jam modifinte sian unuan projekton, sed ankoraŭ ne sen tenaco al ĝi:

— Unue kaj due, nia postulo devas esti tuja rehejmiĝo. Ŝajne historia inflacio detruas la vivon de nia familio, kaj dume, ni, patro, filo aŭ edzo, ĉiukaze la

ĉefa laboranto, ankoraŭ hodiaŭ, post sufiĉa tempopaso de la militfino, restas tenata interne de tiuj pikdratoj... Nun en la nomo de tiu kunveno ni skribu al la usona prezidento Truman pere de la komandejo de la ĝendarmaro en Okinavo, subkolonelo McCoy. Kaj plie ni postulu al ĉiu partio en Japanio, kaj ankaŭ al la tennoo, por ke ili klopodu por nia tuja reiro.

Krome li ankaŭ menciis pri la endeco de la ŝanĝo de la estraro de la centralo kaj batalionoj. Ili ja ne konsideras nian postulon, sed ĉiam malversacias aŭ proprigas la komunajojn kaj maljuste aŭ draste agas kontraŭ ni. Ni ŝanĝu la estraron kaj elektu mem la nian, kiu plej penos por nia postulo: la rehejmiĝo. Por tio ni havu publikan voĉdonon kaj elektu novan estraron fare de ni mem, ne blinde obeantan. Ankaŭ pri tio ni petu al la komandanto de la ĝendarmaro.

Li parolis entute tiel kaj proponis kompreneble maloratore.

— Ĉu la Komunistan Partion vi volas inkluzivi en tiuj partioj?

— Jes, kompreneble!

Hamada urĝe jesis. Se li ne tuj reagus, alia povus rompi per sia arkaika argumento kun la esprimo “naci-perfidulo”. Hamada tamen ne aldonis, ke la partio ja estas la popola avangardo, se ne, la afero irus aliflanken kaj vokus nur tedan disputon.

— Postuli al la tennoo aŭ al la prezidento estas maldece. Mi proponas ŝanĝi: peti.

Iu laŭte parolis la amendon, kaj sekvis aklamado de kelkaj. Hamada kompreneble estis preta por volonte cedi. Do, kiam la prezidanto Sobe parolis pri la amendo, li aprobis la unua.

La kunsido decidis tian agprincipon kaj elektis komisionojn por negocado kaj projekto de la peticioj kaj postuloj. Sobe estis elektita al la unua kiel ĝia prezidanto, kaj al la dua Hamada kaj aliaj du personoj. Kaj oni plue decidis pri la sekvanta kunsido, kiu okazos postmorgaŭ vespere, kaj tiam ĝi konsistos el oficialaj reprezentantoj nepre elektitaj, kaj en tiu kunsido oni elektos plenumkomitaton, kaj ĝis tiam la negoc-komisiono estos provizora gvidantaro. Neniu el la grupeto de Hamada estis elektita en ĝi, do li devis havi ian maltrankvilon. Suzuki restis ekster tiuj komisionoj.

La negoc-komisionanoj tuj iris al la centralo kaj informis oficiale pri ilia decido. Laŭ la raporto de Sobe antaŭ pli ol dek kune irantaj kaj atendintaj ekster la loko, la regimentestro paliĝis kaj komencis tremeti. Ankaŭ la furiero, kiu ĉiam satelitis la estron, ne povis elbuŝigi eĉ unu vorton malgraŭ ĉiutaga blufado. Ili ja ekflaris la movon, sed ŝajne ne venis al ili la ideo, ke oni postulos ilian ekŝiĝon. De tiam la negocistoj petis interpretiston sekvi ilin kaj kune kun la regimentestro, kiu trude postulis akompanion, iris al la ĝendarma oficejo staranta antaŭ la pordego kaj tie prezentis la postulon al deĵoranta ĉefserĝento, kaj klarigis la enhavon. La ĝendarmo diris, ke li nepre transdonos la postulon morgaŭ matene al la

komandanto. Hamada, kiu pensis ke la aŭtoritatularo neniel permesos la liberan elekton de la estraro, ne povis esti tiel optimisma kiel Sobe, kiu senĝene esperdonan raporton faris. Do Hamada devis komenti iel. Ĉu pro ia mistraduko? aŭ tro hasta komprenemo de la negocistoj, precipe de Sobe? Iam optimisma konjekto radikigiĝis en la koroj de la akompanintoj.

Kio sekvis? La memoro de Hamada iĝis jam nebula.

En ĉiu okazo, kiam en la sekvanta tago Hamada kaj Suzuki revenis de la laboro, oni unue elektis sian plotonestron. Hamada proponis kandidati al Tukaguti, kiu tamen obstine rifuzis. Do vole-nevole li mem devis kandidati por tiu posteno. Suzuki kaj Takada kaj iu alia konsistigis la elekt-komisionon. Oni konstatis, ke Hamada estis elektita per 46 voĉoj kontraŭ 3 por la malnova estro, kaj 1 sindeteno.

En la sekvanta tago okazis la elekto por la rotes-treco, kiun ĝis tiam okupis unu el la 4 plotonestroj, kaj Hamada estis elektita. Li povis tuj ekscii pri la situacio en la aliaj plotonoj: neniu volis kandidati kun granda hezito parte pro timo parte pro ĝeno. Li devis amare rideti imaginte sian figuron, kiu ĉiutage komandas: la rekruto kiu fariĝis la rotestro, neniam spertinte ĝis tiam ian komandon. Sed la kubo jam estis ĵetita, do...

Sinsekve venis la rezultoj en la aliaj batalionoj. En la 5-a kaj 6-a ankoraŭ tro forte regis la privilegio kaj hierarkio de la armeo, tiel ke neniu volis kandidati, kaj sen voĉdono la antaŭaj estroj povis resti sur sia seĝo,

sed kie oni havis voĉdonon, ĉie senescepte sukcesis la flanko de la aktivuloj. Hayasi povis esti elektita por la posteno de la batalionestro, kiel ĝis tiam.

Kiam Hamada estis informita pri la ĝenerala venko, inkluzive la sian, kun granda kontento li komencis verki sian projekton por la peticio. Se tiu ĉi projekto estus aprobita de la kunsido kaj prezentita al la aŭtoritatularo, ĝi povus resti ja historia dokumento, sed bedaŭrinde la sorto estis alia. En la letero adresita al la tennoo li verve skribis sed kun koro ĉiam detenata, kaj klare elmontris sian malamon kontraŭ la reĝimo.

— Al sinjoro Hirohito. . .

La komencis, sed baldaŭ retrokonsideris kaj ŝanĝis la tekston :

— Al Via Tennoa Moŝto. . . laŭ via ordono, ni soldatoj. . . batalis sur monto kaj kampo de tiu ĉi insulo Okinavo (li forgesis pri la mararmeo), kaj mortis tie niaj kamaradoj entute 110 000 vane, kaj apenaŭ savitaj, ni hodiaŭ, ankoraŭ nun, devas atendi la tagon de la rehejmiĝo, kies dato estas tute nekonata de ni, kaj vegetas en la koncentrejo pikdratumita. . . Ni pensas, ke vi havas devon klopodi por nia tuja rehejmiĝo. Kiel la plej supera respondeculo de la milito. . .

La stilo kaj enhavo estis ĝenerale tiaj.

Tiuj adresotaj al la japanaj partioj devis esti verkitaj de la elektrolaboristo en la 2-a bataliono.

Hamada montris sian projekton al Suzuki kaj modifis iom laŭ lia konsiladmono. Mi montros poste ĝin al aliaj

komisionanoj, li pensis.

— Ellitiĝo!

En la sekvanta mateno oni kriis. Li malgraŭvole ordigis la vicojn por la regula nombrokontrolo, sed la batalionestro intervenis, ke li transprenu la postenon nur ekde tiu vespero. Li volonte cedis, ĉar li denaske ne ŝatis ordoni aŭ komandi aliajn personojn. Kaj li mem pretigadis sin por tiutaga laboro.

La 8-a matene.

— Viciĝu!

Oni proklamis, do li sin levis, eliris de sia pavilono, sed kio okazis? Krom Suzuki neniu lin sekvis. Ĉiu sampavilonano nur restis sidanta. Oose kaj liaj du kolegoj tute aplombe sidis kaj diris al li: “Ne rapidu, sinjoro Estro!” Tukaguti same, ĉiuj aliaj same. Hama-da iris sola al la bataliona centralo kaj rigardis tuj antaŭan avenuon Sobe-Ginza, apud kies pordego oni devis atendi kamionojn, kiuj devis tuj veni. Tie sidis kelkdeko da kaptitoj surtere kaj restis muta. Ĉirkaŭ ili la regimentestro kaj aliaj estraranoj konfuzitaj paroladis ion kaj ion, sed ili enradikiĝintaj ne volis sin levi. Ekster la pordego kriadis ion kelkaj usonanoj. Venis tien lantmove alia kelkdeko el la 2-a bataliono, ĉar tiun tagon tiu bataliono devis unue iri al laboro, sed ankaŭ ili eksidiĝis surteren senvoĉe. Venis alia kamiono kaj elvenis du negroj el ĝi. Al ili iu kriis trans la pordego: “*Go home!*” La negroj miris kaj elvortis nenion. La

regimentestro jam ekkonsciis sian situacion kaj kriis, kriis :

— Nur post la laboro ĉion ni aranĝos. Sed nun vi tuj iru, se ne, la afero perdiĝos.

Venis alia kelkdeko el la sama bataliono, ankaŭ ili eksidiĝis surteren, ĉifoje apud la elirejo de sia palisaro, ĉar la nombro jam saturis la ejon. Kaj iuj el ili komencis ekkanti, ve, la himnon al la japana armeo, ĉar ili ne sciis alian kanton, kiu povus unuigi ilin en komuna afero. La japanoj ja ne havis sian Marseljezon.

La ĉefuloj ĉiuj ekkuris tien reen kaj volis iel persvadi la sidantojn sed neniu... Ĉiuj, kvazaŭ grandaj rokoj, restis senmovaj. Hamada eksciis pri sia miskalkulo, kaj samtempe pri sia malkapablo konduki la aferon. Kredeble Suzuki, kiu iam ekstaris malantaŭ li, devis rimarki, ke de sur lia vizaĝo malsupren kuris lia sango.

— Se vi volas, ke nepre iuj laboru, anstataŭ ni vi mem iru al laboro. Stultulo!

Al la regimentestro iu alkriis de la interno de la palisaro de la 2-a. Sekvis lin multaj insultoj jam nedeteneblaj plej incite.

Hamada reiris al sia pavilono. Parolis li nenion. Ankaŭ Suzuki. Trakuris la penso en lia kapo: ĉio perdiĝis!

En la pavilono regis tia etoso, kia ĉe la pordego.

— Se vi tiel fervoras labori, stultulo, nun estas la ŝanco, iru vi mem al la laboro!

Tukaguti sarkasmis al la rotestro, kiu venis al ilia pavilono kaj volis iel fliki la scenon. “Hodiaŭ mi volas ripozigi miajn ostojn. Mi petas, anstataŭi min, sinjoro estro.” “Atendu iom ĝis mi fekos postmorgaŭ!” akompanis alia krio. Estis de Katayama. Takada strabis al Hamada kun granda kontento.

De la 3-a bataliono venis krioj, kaj ŝajne ankaŭ tie multaj sidis sur la tero. Probable la stato en la aliaj batalioj estis sama.

Ha, tro hastis la afero. Ĉio jam devos bankroti! Hamada estis obsedita de la sama penso. Ilia projekto organizi ordan proteston videble fiaskis, sed la amaso mem lanĉis sian proteston siamaniere. Ili ja prave spitis kaj neglektis la decidon de la kunsido de la reprezentantoj. Ne trejnitaj ili tamen volis agi, se la postulo estis prava, kaj vere ĝi estis prava, do ili ne povis resti sen ago. Dum la oficiroj kaj suboficiroj, nome profesiaj aŭ duonprofesiaj militistoj jam frue reiris al sia hejmo, kial nur ili, simpluloj, kiujn la reirintoj mortokruele turmentis ĉiamaniere en sia tempo? Tamen la blinda eksplodo povos konduki la aferon al nepra fiasko. Al Hamada kun tia penso venis Hayasi, la Makku Aasaa.

— Kion vi aŭdacis fari? Kiu respondecas pri tia afero?

Hamada ĵetis neglektajn okulojn kaj tuj sin retiris en sian pavilonon kaj eksidis senvorte. Baldaŭ Hayasi foriris senhelpe. Cetere li devis trovi, ke la ĉefkonspirinto estis ne Hamada.



Bone, ankaŭ mi partoprenu aktive en la afero! Hamada decidis. Takada proksimiĝis kaj flustris al lia orelo:

— Sinjoro Hamada, kio sekvos?

— Mi ne scias... Vi ja ĵus parolis tiel brave kontraŭ la estro. Devas esti, ke vi scias kio...

Ambaŭ ekmutis, nur Oose diligente ligis kaj malligis siajn sakegojn. Nakazima restis fumanta. Tukaguti sidis ĉe la elirejo de la pavilono kaj tenis silenton. Ne estis fenomeno, ke li restas muta, sed ial hodiaŭ tia sinteno donis al Hamada tian impreson ke tiu povos esti por li kolono en ĉiu okazo, jes, kolono neskuebla.

Hamada restis senvorta same, dum vorticis en lia kapo diversaj opinioj. Suzuki rompis la silenton:

— Kion ni faru de nun? Ŝajnas ke la afero iras al pereco, ĉu?

— Nenio jam helpas nin en nia projekto. La afero jam estis lanĉita, do nur...

Hamada rimarkis rideton sur liaj lipoj strikte fermitaj. Jes, ni ne bremsu, ĉar la amaso mem deziris kaj volis agi. Prediki nun pri la ordhava striko aŭ simila estas sence kaj perfide. Jes, en la eksplodo mem troviĝas ja ia regulo. Do konsekvence ni batalu kaj iel traktu por ni la vojon. Hamada tiel pensis, sed kia aroganteco nomi blinda eksplodo tian memvolan rezistmanieron de la amaso! Li nun ĉiam sentas rimorson rememorante la eventon, tiel ke lia vizaĝo ruĝiĝas pro la honto.

La rotestro, plotonestro kaj aliaj kriadis en plena

gorĝo :

— Sinjoroj, volu enviciĝi!

— Oni povos negoci pli poste, do hodiaŭ iru bonorde al la laboro, ni petas.

Kawamura, la batalionestro, venis al li kaj elvokis lin.

— Hej, sinjoro, mi petas, bonvolu rearanĝi la aferon. Se ne, la. . .

Lin sieĝis ankaŭ la rotestro kaj aliaj. Malantaŭ Hamada ekstaris Tukaguti senafekte sed batalprete.

— Nenion fari mi povas. Min ne koncernas la afero. Vi mem devas solvi, ĉar la estro. . . Cetere vi ankoraŭ restas la rotestro.

Hamada okulis al la rotestro flanke staranta. Li rifuzis, sed lasis ilin tie kaj volis iri al la regimenta centralo. Tiam li rimarkis, ke interpretisto, kiun Hamada estimis iusence, ĉar almenaŭ ne kanajlo, rapidis tien kaj detenis lin je la brako.

— Hodiaŭ vi ne iru eksteren de via bataliono!

— Pro kio? Kial?

Dum ili parolis interpuŝe tiel kaj ĉi tiel, venis la furiero de la regimento, la konata apaĉo, kune kun siaj kelkaj subuloj.

— Hej, Hamada, se vi kuraĝus eliri, . . . provu!

Hamada neniel povis pretendi pri sia fizika forto. Li ja ne povis lukti eĉ kontraŭ unu el ili.

Damne! Li reiris al sia pavilono, kun insultoj en la koro.

Kamionoj, kiuj venis por ricevi laboristoj-kaptitojn, vice staris longe kaj longe, kiujn oni povis trarigardi de sia pavilono. "*Haba! Haba!*" Hamada povis imagi la figurojn de la soldatoj incitataj sed nur starantaj kaj insultantaj estraranojn. La mikrofono de sur la tegmento de la centralo petis plore kaj plore: "Trankvile kaj orde vi iru al la laboro, ni petas. Pri viaj postuloj ni nepre aranĝos ne malbone, ni nepre parolos al la ĝendarmaro..."

La laborvico tiutaga estis: la 2-a, 3-a, 4-a, 5-a, 6-a kaj 1-a batalionoj. Malgraŭ tio tiutage la 2-a restis ĉiam en sama loko kaj la vico neniel volis moviĝi. Ŝajne la oficejon de la ĝendarmaro deĵoris nur malgranda nombro kaj kredeble ili juĝis, ke la estraro de la regimento ne povos solvi la aferon. Ili venis rekte al la 2-a bataliono.

Post kelka tempo laboristoj-kaptitoj venis eksteren de sia pavilono pezpaŝe kaj lante. Dum en ordinara tago oni bezonis nur 15 minutojn por la eliro de unu bataliono kaj estis disponita ĉiudirekten, tiun ĉi tagon la paŝoj estis de bovoj, lantaj aŭ eĉ testudaj. "*Haba! Haba!*" Puŝate aŭ bastonate ĉe sidvangoj oni malvolonte iris sur kamionon iom post iom, sekvis ilin la longa vico serpente. Unu paŝon, unu paŝon. Sekvantoj plensvarmis ĉirkaŭ la elirejo aŭ antaŭ la centralo kaj kuracejo, vojlarĝe sidiĝis kun sidvangoj surtere, kaj pelate nur de pafilbuŝoj ili lantis bove, testude, limake.

— *Haba! Haba!*

Nigraj kaj blankaj soldatoj kriis, insultis indigne, flame, tiris per brakoj aŭ bastone pelis. La fusiloj ankoraŭ restis sur la dorsoj, kaj nur bastonoj en mano svingiĝis, sed ili ankoraŭ ne batis iun ajn. Lantmove la kaptitoj eltiritaj de sia vico tamen iom post iom surkamioniĝis. Se en tia maniero, oni bezonus 20 minutojn por ŝtopi kontingente unu kamionon per 50. Pasis jam la 9-a horo, sed povis starti nur kelkaj kamionoj. Hamada mem el- kaj eniris je sia pavilono kaj kun netrankvilo restis observanta la scenon de sia loko ne malproksima.

Al li sendis sian mesaĝon Sobe trans pikdratoj:

— Ni restas en granda konfuzo pro akcidenta eksplodo. Kion fari?

Hamada vidis antaŭ ĉio tiajn frazojn rapide skribitajn sur flava papero.

— Ni finbatalu konsekvence, ĉar la batalo jam komenciĝis. Unuigu vian batalionon, mi mem klopodos por la nia. Nur tio.

Sekvis lia respondo:

— Ni neniel povas aprobi tian agon, kia spitis la hieraŭan decidon. Kiu aŭdacis tiel ekagi? Kiu? Kiuj? Ili ja volas rompi la aferon.

De sia loko Sobe skribis tiel kaj tiel. Hamada estis ŝokita de tiu plendo. Kaj li mem iris al tiu palisaro, kie iu junulo atendis lian respondon. La junulo estis ne konata de li.

— Diru al li, mi ne scias, kiu aŭ kiuj lanĉis. Mi

mem volas sciigi de li. Tamen la afero jam estis komen-  
cita, do restas por ni neniu alia rimedo ol nur iri  
antaŭen, mi kredas. Ni povos poste esplori la kaŭzon  
aŭ kaŭzintojn, kaj se necese, kulpigi tiujn, sed nun. . .

De tiam jam nenia mesaĝo venis de Sobe.

Dum ili korespondis tiamaniere kaj senfrukte, venis  
kantanta voĉo de la 5-a bataliono kaj tuj baldaŭ ŝanĝiĝis  
en ĥoron de kelkdek personoj. Li aŭskultis, jes, estis  
“La kanto de bivako”, militista kanto sed kun iel trista  
melodio. Konkorde al ĝi venis la sama kantado de ĉiu  
bataliono. Fi, fuŝe! Se kun tia kanto la usona flanko  
povos nin juĝi kiel skoriojn de la militista aŭ faŝista  
kliko. Sed tamen tiu ĉi kanto, kvankam kun sia mili-  
tisma karaktero, sonis melankolie kaj sentimentale kaj  
penetris la korojn de kaptitoj. Ne decis kanti tian, sed  
kian kanton ili povis kanti por tiu okazo? Kaj cetere  
ilia mensostato ja akordis al ĝi. Malpli decus kanti “Vivu  
longe Lia Tron’” kompreneble. . . Dum li mergiĝis en tia  
penso, la voĉo ŝanĝiĝis al “Kanzono de Sobe”, same  
melankolia. Hamada amare klinis siajn orelojn.

Venis Naiki, la estro de la 2-a roto, kaj dekondukis  
lin al senhomejo.

— Hej, ni estas en granda embaraso. Jam ĉesu!  
Mi petas. . .

— Jam ĉesu? Ĉu ankaŭ vi rigardas min la aŭtoro?  
Mi mem estas embarasata.

— En ĉiu okazo mi petas, ke vi persvadu ilin. Se  
ni ne agas dece kaj kviete, ĉio bankrotos. . . Nur la

fiasko nin atendas.

— Mi ne povas persvadi. La scenon faris ne nia projekto. Viaj kutimaj negativaj kondutoj kondukis fine la aferon al tia stato, eksplodo certe blinda. Mi konfesas, ke mi restis tute fremda al tio ĝis nun, sed. . .

— Ĝis nun? Kaj de nun?

— Ne babilu sofismaĵon.

Antaŭe Sobe kaj nun Naiki ŝajne dubis pri li kaj rigardis lin kiel la motoron de la afero. Pro tio lia ĝistiam ŝanceliĝo estis firmigita anstataŭe, kaj li ekpovis resti aplomba, senŝancela kaj senskua. Se tiam iu agitus, li mem povus kontraŭstari kaj ĉiel klopodus por bari, kaj predikus litanie pri la projektata lukto, laŭplana kampanjo, sed. . . nun du amikoj ŝajne lin kondamnis, li nature. . . Li ekvolis konduki la aferon ĝis la fino kun sukceso. Ĉu li estis denaska kontraŭemulo? Jes, tre povis esti, li ne povis nei sian tian karakteron, kiu ofte lin pelis al malsukceso.

Tamen nun li restis enfermita en la palisaro, kaj aliflanke Sobe, kun kiu Hamada apenaŭ povis kontakti, ŝajnis en granda konfuzo, kaj antaŭ ĉio li mem estis tro ekscitita por konduki la aferon, tiel ke li ne povis klare koncepti la situacion, kaj nek povis praktike gvidi nek klare kompreni, en kian direkton la evento kuros. Hamada apenaŭ sin pretigis, por ke en necesa okazo li mem manifestaciu kun siaj kamaradoj. Sed la vico de lia bataliono. . . se tiel procediĝus la afero, venus nur posttagmeze. Li cerbumis kaj cerbumis, kaj fine atingis

la konkludon : se la centralo ne povos solvi la aferon, kio estas tute klara, la evento fine iros al malfeliĉa okazo, ekzemple, la pafado. Ankaŭ bone, tiam mi mem. . .

— Hej, Hamada, ne tiel agitu! Ankaŭ mi restas multe ĝenata.

Venis denove Hayasi. Ŝajne ankaŭ li trovis en li la motoron de la afero.

— Ne diru stultajon! La afero ja komenciĝis de via propra bataliono.

— Ĉiuokaze tia afero kondukos nin al grava, gravega situacio, mi kredas. Do, ni devas iel solvi.

— Hm, kiel?

Venis tien denove Kawamura.

— Sinjoro Hayasi, hodiaŭ oni malpermesis liberan eniron. Foriru, mi petas.

— Kion kuraĝis vi diri! Mi venis nur por ordigi la aferon.

Li replikis, sed tien alvenis ankaŭ la furiero, kies fizika forto estis konata, kaj enŝovis sian nazon inter ilin. Ŝajne Hayasi estis deprimita de tiu ĉi bandano, kaj mienis timide.

— En ĉiu okazo vi retiru vin en vian propran ejon. Mi komprenis vian intencon.

La apaĉo ŝajnĝentile tiel diris, kio sufiĉis por lin elpeli. Ili ĉiuj reiris al sia proprejo.

Jam proksimiĝis kredeble la 10-a horo. Oni jam konsumis du horojn, sed nur triono de la 2-a bataliono

estis sendita al la laboro, kaj la vosto de la serpenta vico ankoraŭ restis sidanta sur la "avenuo". Hamada vidis, ke ankaŭ la 3-a bataliono jam eksidis kvazaŭ nemovebla roko, kaj kiel japanaj estraranoj, tiel usonaj soldatoj kuradis tien kaj tien ĉi en granda konfuzo kaj paniko.

Jen tiam la mikrofono ĉe la centralo abrupte ŝanĝis sian tonon :

— Estas decidite, ke hodiaŭ oni ne havos laboron. Oni en havos laboron. Ĉiu reiru al sia pavilono! Ĉiu reiru al sia pavilono! Hodiaŭ oni ne havos laboron. . .

— Hura! hu — ra! hu — ra!

Ĉiuj sidantoj sin levis de la tero risortite en la sama momento.

— Jen vi havas, fi, jankiaĉoj!

La mikrofono plue daŭrigis :

— Batalionestroj, rotestroj! Vi ĉiuj tuj kolektiĝu al la regimenta centralo! Tuj, tuj! Senprokraste! Ĉiuj batalionestroj kaj rotestroj kolektiĝu al la regimenta centralo! . . . Dume la aliaj restu en sia pavilono, sen permeso neniuj neniuj eliru el la sia! Oni malpermesis eliri eksteren. Ne eliru, sed restu en la. . .

Ĉiu, kiu promenadis tien kaj reen ekstere, tuj ensaltis en sian propran neston.

El ĵipoj starantaj ekster la pordego, usonaj soldatoj kun sia aŭtomata fusilo aŭdacis veni kaj blokis la palisarojn. Iliaj fingroj estis ĉe la ĉano.

— Ĉiu eniru en sian pavilonon! Se oni restus ekstere, oni povus vin pafi. . .



Kawamura, la batalionestro, kun brakbendo ĉe sia maldekstra brako, enrigardis la internon de la pavilono de Hamada kaj tuj foriris ien kun tiuj vortoj:

— Kio sekvos? kio?...

Takada boris Hamada per siaj leporsimilaj okuloj.

De sub la pavilono Hamada vidis, ke usonaj soldatoj kun sia fusilo surbrake tenata, en certaj distancoj staras kaj sieĝas la koncentrejon. Mankis nur tanko, se oni troigis la esprimon, sed ĵipoj kaj kamionoj, per kiuj tiuj soldatoj alkuris, staras svarme, kaj ili fiksis siajn mitralojn cele al la koncentrejo. En tiu momento basflugis unu aviadilo preskaŭ tuŝante la suprojn de la pavilonoj. Iu krietis al ĝi "Damne!" sed tamen la voĉo sonis ne tre forte. Por diri senkaŝe, ankaŭ la koro de Hamada komencis forte ekbati ĉe tia sceno ne imagita antaŭe, surpriza kaj konsterna disvolviĝo de la afero. Sed en tia stato venis nenia ideo por evoluigi la komencitan, nek la penso, ke li povos esti punata.

Suzuki komencis agitparoli starante en la mezo de la pavilono. Hamada trovis, ke li restas tute aplomba kaj senĝena kaj li parolas pli elokvente ol iam ajn, sed ankaŭ kun ioma ekscitiĝo kaj ekzaltiĝo. De la najbara pavilono oni levis la trenaĵon kaj aŭskultis lin ŝtele.

Denove ekparolis la mikrofono:

— ... Mi aŭdis, ke vi postulas la demokratian administron, pri kiu mi mem devas konsenti. Sed la demokratio, vi sciu, samtempe postulas al vi kaj la tempon kaj la spacon. Certaj konflikt-semantoj ignoras

tion kaj volas enpeli vin ĉiujn en pereon. Sinjoroj, vi ĉiuj ne estu mistifikitaj de ili. En la milito venkis ne la japanoj, sed la usonanoj, kaj vi estas kaptitoj. — Vi devas nepre teni tion en via koro... Tiel parolis Lia Komandanta Moŝto, sinjoro McCoy...

“Konflikt-semantoj”, “venkis la usonanoj”... La ideo “usona armeo emancipa” momente forvaporigis de lia cerbo. Jes, li diris la veron. La usona demokratio, al kiu Hamada metis sian esperon, estis nun senvualigita kaj momente malkaŝis sian veran fazon: feroča imperiismo kaj nenio plu! Kie do en niaj postuloj troviĝas ia koliziaĵo kontraŭ la demokratio? Jes, prave li diris: venkis la usona imperiismo! vi estas kaptitoj! Ĉu la elementa homrajto, administri sin mem kaj reiri al sia hejmo post la fino de la milito, ne ekzistas por la usona demokratio? Anstataŭ Suzuki Hamada ekstaris ĉe la meza fosto de la pavilono kaj ekparolis:

— Kio do estas la demokratio, per kiu sin titolas la usona armeo? Ne per bajonetoj, sed per aŭtomataj fusiloj oni parolas nun pri la demokratio. Kio do? Ĉu ĝi diferencas de la alia imperiismo agresa, feroča... kiel ekzemple de la japana? Nun ni devas unuigi nin pli forte kaj pli firme ol antaŭe...

Dum li parolis, li trovis, ke la mienoj de la kolegoj klare montris... ili foriras de li, ĉiam pli... Kvazaŭ perdi enmanaĵon for de si li pensis, li sentis, ke la sango okulvideble forlasas lian kapon. McCoy diris, eĉ ĉantaĝis, kaj ili havas nenian alian rimedon ol la unuigo, ĉu

certe tiu unuigo povos savi la situacion? Se tiuj fusiloj ekfaŭkos kaj ĵetos fajron, kion povos fari tiu unuigo? Ĉio estas jam finita! Ĉies okuloj elokventis tiel ĉi. La agitado sendube donis nenian efikon. Li mem sentis, ke li sola aŭ ili solaj restas en granda abismo.

— Nu, mi iru al la centralo.

Suzuki volis eliri spite de la ordono, kiun oni ĵus proklamis. Tiam la rotestro enŝovis sian fi-vizaĝon.

— Ĉiu enviciĝu!

— Enviciĝo!

Kriis en ĉiu pavilono salve la komando. Hamada kaj Suzuki vidis sian vizaĝon unu al la alia. Ambaŭ restis mutaj kaj senmovaj momente. Abrupte Tukaguti elflirtis eksteren kaj ĉiu kvazaŭ trenate de li sekvis lin. Neniu sciis, kion Tukaguti volis. Ĉiu plotono eliris. Ankaŭ Hamada. Staris antaŭ ilia pavilono Kawamura, la batalionestro.

— Venu ĉi tien!

Li diris, kaj samtempe kelkaj usonanoj kun fusilo pafpreta venis de malantaŭ la batalionestro. Nenia ŝanco por...

— Galop'!

Ĉiuj kaptitoj kuris pelate de la soldatoj. Se iu postrestis, tuj de la malantaŭo ties dorson puŝis la faŭko de pafilo kvazaŭ volante enpiki. Ankaŭ la plotonestrojn kaj rotestrojn ne esceptis la persekuto. Ankaŭ Kawamura kuris, kuris, ĉiuj kuris, kuris. Kiam oni elkuris de

sia palisaro kaj venis al la “avenuo”, oni ordonis plu kuri maldekstren, kaj tiel fine ĉiuj estis enpelitaj en la vakantan palisaron, kie oni kunsidis pri la postuloj, kaj kie oni ĉiam prezentis ian teatraĵon. Post la 1-a, la 2-a bataliono sekvis, kaj la 3-a. . . Ĉiuj kaptitoj fine estis koncentritaj en tiu loko. Kaj oni vicigis ilin laŭbatalione, kvazaŭ lernantojn en matena kunveno de elementa lernejo por aŭdi ian predikon aŭ similan de lernejestro.

— Kio?

— Kio sekvos?

— Kion ili volas aŭdaci. . . ?

Dum regis kompleta kaoso, alfluis denove la voĉo tra la mikrofono :

— Atent'!

Kriis la regimentestro tra la parolilo.

— Damne! Ni devis lin disbati hieraŭ vespere.

Iu flustris, sed neniu reagis.

La mikrofono malaltigis sian tonon.

— Ĉiu restu staranta senmove! Neniu rajtas ripozi ĝis oni permesos. Se vi moviĝos aŭ libere promenos, povos okazi granda katastrofo. Usonanoj povos vin pafi. Nun ni, la regimenta centralo, klopodas por savi la aferon iel. . .

— Damne! Iru al la infero!

Venis la voĉo de la direkto de la 2-a bataliono. Kiam la rideksplodo disvastiĝis ond-circle, venis pafoj de mitralo de la antaŭo. Da, da, da, da. . . La kugloj flugis minace super la kapoj preskaŭ tuŝante. Surprizite

ankaŭ Hamada detiris sian kapon kvazaŭ testudo. Li vidis la okulojn de najbara Suzuki sangantaj. Fi!

Naiki kun brakbendo venis al li.

— Hej, ni devas solvi la aferon per negocado. Oni diris, ke ni devos esti starantaj ĝis ni cedos.

Kaj li elpoŝigis ankoraŭ alian brakbendon kaj donis al Hamada: “Kun ĝi vi povas moviĝi libere. Se sen ĝi, oni tuj pafos.”

Hamada komencis ŝanceliĝi. Komprenoble li ne volis disfaligi la batalon, pretekste ke ĝi okazis pro senvola aŭ pretervola neprojektita eksplodo, aŭ kiel “sovaĝkatan strikon”, sed tamen la situacio klare postulis, ke oni devis iel fliki la aferon. Estis sunklare ke kaptitoj sen armilo neniel povos kontraŭstari al armitaj soldatoj, kiuj ja “venkis”. Li vidis, ĉiuj jam restas kun siaj kruroj en la aero, nome la demokratio, lia espero, pendas nur en la aero.

— Kion mi faru, vi volas?

— Kun mi iru al la centralo kaj de tie vi parolu, ke ĉiu restu kvieta kaj orda.

— Ne! Mi ne volas. Prefere, mi pensas, tie ĉi ni elektu niajn reprezentantojn por negoci kun la jankiaĉoj. Se ni konfidus la aferon al la centralo, ĉio tuj perdiĝus.

— Stulte! La jankioj restas flamantaj en granda indigno. McCoy mem venis tien ĉi kaj manumas sian revolveron. Se vi insistus, li tuj pafus.

Hamada trovis, ke paroli kun Naiki jam donos nenion utilan al la flanko de la kaptitoj, do li demetis la truditan

brakbendon de sia maldekstra brako kaj redonis ĝin al lia poŝo same trude.

— Ĉu ni levu la manojn ankoraŭfoje? Ĉu vi povas? ... Vi sciu antaŭ ĉio, ke la hodiaŭa evento okazis spontane pro la ... Vi scias. Mi mem staris ekster la afero ĝis nun. Mi petas, vi iru kun viaj manoj levitaj, sed mi ne. Se oni konsentos negoci, mi volonte iros, sed se ne, neniel, ankaŭ miaflanke. La regimentestro respondecu ĝis la fino.

Dum ili tiel reciprokis vortojn certe sterilajn, la jam eldevigitaj laboristoj-kaptitoj estis sinsekve resenditaj de la laborejoj. Oni enpelis ilin de sur la kamionoj per kolboj kaj tuj koncentris en la saman lokon. Hamada rimarkis, ke kelkaj ladskatoloj defalis el sub iliaj vestoj komike.

Ili ĉiuj restis starantaj mute. Dum Hamada cerbumadis, de kio li komencu, abrupte la ĉirkaŭo ektumultis. Li returnis sin kaj vidis, ke ĉiu pavilono de ĉiu bataliono ŝprucigis flamojn samtempe. Usonaj soldatoj ja ilin faligis kaj duŝis per benzino kaj metis la fajron. Nigraj fumkolonoj kaj ruĝaj fajrokolonoj leviĝis supren. Ĉiu ekkriis malgraŭvole. En tiu momento ekflugis kugloj minace super la kapoj. La fumkolonoj kaj fajrokolonoj sinsekve leviĝis pli alten, kaj nigraj drelikaj rubpecoj alflugis ankaŭ tien ĉi. Kaj ekpafoj de mitraloj ĉe la plej eta moviĝo, minace, aŭdace, feroce...

La batalo estis finita! La skuiĝo pli kaj pli disvas-tiĝis ondcirke kune kun la malespero kaj paniko, kaj la

senhelpeco obsedis ĉiujn, tiel ke oni klare ekmontris sian penton pro sia miskonduto, kiu permesis sekvi la “konflikt-semantojn”. Kiel diri? Nun ĉio, pene kolektitaj “batalfruktoj” dum longa tempodaŭro spite de ĉia danĝero, nun restas en la flamo, kaj tuj cindriĝos. Nur pro momenta kaprica malprudento, kiun profitis la “konflikt-semantoj”! Nun oni devas peti indulgon al la usona flanko. Nenia helpo jam nun, nur kulpis la “konflikt-semantoj”. Hamada legis el la vizaĝoj de la ĉirkaŭantoj kaj estis obsedita de la senfina kaj senlima malespero. Jes, malespero, kiun li jam plurfoje spertis en sia vivo, precipe en malliberejo antaŭ kelkaj jaroj. Tio certe ne venis de lia defetismo, sed de la vera figuro de la japana popolo. En la situacio de la kaptiteco oni havis nenion perdendan krom sia ĉeno sed ankoraŭ tenace obseda estis la malgranda, tro malgranda proprietaĵo! Li ekploris, ekploris en sia sanga larmado. Li devis ja singulti antaŭ la vera, reala figuro de la popolo, kiun li fidis ĝis tiam, kiel la unikan forton por ĉia vero kaj justo. La batalo estis jam finita. La movadon por la rehejmiĝo kaj demokratiigo de la koncentrejo rekomenci estis jam preskaŭ senespere, sed iam... certe iam ankaŭ ili... Hamada en la larmado meditis tiel kaj tiel kaj volis sin persvadi pri la forto de la popolo, sed tamen en lian cerbon neniel venis tia ideo, ke oni lin denuncos kiel unu el la “konflikt-semantoj”, ĉar li vere ne meritis al tia honoro.

Pasis jam la tagmezo, sed oni ne donis manĝon nek

trinkon. En la 4-a horo posttagmeze oni apenaŭ liveris akvon, kiu estis brule dezirata sur tiu suda insulo.

Venis la horo por vespermanĝo, sed oni donis nur akvon.

Ĉiuj restis starantaj ĝis ĉirkaŭ la 9-a horo vespere, cetere oni ne povis scii pri la horoj, ĉar neniu posedis horloĝon. Kaj de tempo al tempo oni pafis super la kapoj pretere. Ĉar oni pafis lumkuglojn en tiu vespero, la arkoformaj balistikoj aspektis tre bele kaj rememorigis al ĉiu pri sia paseo, ĉiuflanka persekutado. Ankaŭ li vole-nevole rememoris la marbordon de Gusigami, iom oriente de Mabuni, kie li estis kaptita. Li rememoris pri la lumkugloj, kiuj mergiĝis en la akvon de tiu marbordo, kaj devis amare rideti. Ni ja ankoraŭfoje levos niajn manojn. Krom tio restas jam nenia rimedo. Bone, ni levu la manojn, kaj se necese, ni levos plurajn fojojn, sed iam venos la tempo, kiam ilin ni devigos levi la manojn antaŭ la popolo. . .

Hamada povis resti jam trankvila. Nenio pli malbona okazos plu. Okazu kio ajn! Okazu kio ajn!

Je la 11-a horo oni permesis al ili kuŝi surtere. Ĝis tiam nur fekado kaj urinado estis permesitaj. Ĉiu kun grumblo kaj ĝemo ekkuŝis sed post nelonge komencis dormi. Ankaŭ en la cerbo de Hamada restis jam nenia kaŭzo por cerbumi, ne, la cerbo estis jam tro laca por enteni ion ajn. Suzuki, kiu kuŝis tuj apud li, tuj endormiĝis. Certe ankaŭ li estis lacigita. Do ankaŭ Hamada tuj endormiĝis profunde, dum la steloj sur la suda lazura



ĉielo scintilis kvazaŭ kompatante.

*Malkutime li dormis ĝis oni komandis, "Leviĝu!"*

Ankaŭ en la sekvinta tago daŭris tia puno: senmove staradi, sed ĉi foje oni permesis kuŝiĝi jam ĉe la vesperiĝo.

## 6. Krimo kaj puno

Ĉiu mute revenis al sia pavilono, verdire, al ĝia ruino. Oni pene demetis cindron kaj rubojn kovrantajn kaj serĉis siajn posedaĵojn. Ĉio forbrulis, restis nur fulgomakulitaj ruboj de malplenaj sakoj, malplenaj ladskatoloj, kuleroj, forkoj. Hamada havis nenion domaĝindan, krom kajeroj kun la notoj pri la procedo de la batalo sur tiu insulo, kiun li komencis noti nur en tiu koncentrejo. Ĝi konsistis el diversaj memoroj kaj rakontoj, precipe pri la sorto de lia trupo. Ankaŭ pro perdita alia kajero li domaĝis. Ĝi estis el liaj utaoj kaj aliaj verketoj. Li estis kaptita de profunda malĝojo nur pro ili, sed li ne povis elskrapi ilin el la cindra amaso, kiel aliaj kolegoj. Cetere lia konscio aŭ vantamo ne permesis fari tian agon. Ankaŭ Suzuki restis gapa ĉe la loko. Tukaguti same. Oose kaj liaj kamaradoj pene elfosadis kaj jubilis kaj maljubilis ĉe nova eltrovo. Takada same.

Hamada jam eksentis malamikecon ĉirkaŭ si. Kamaradoj, kiuj lin elektis kiel rotestron nur antaŭ du tagoj,

kaj kiuj sen lia aprobo komencis saboti kaj elvokis la indignon de la malamika flanko, nun ekmontris siajn blankajn okulojn al ili, precipe al Hamada. Li restis tute muta, ankaŭ Suzuki... Povas esti, ke iu aŭ iuj el tiuj komencos defii ilin ĉe ĉia ŝanco kun ĉia preteksto. Tiam? — tiam restos al ili nenia rimedo krom rebati fizike. Kredeble lanĉos la kverelon Oose aŭ unu el liaj amikoj. Li rigardis, aŭ pli vere, gapis lian kalvan kapon, kiu tre diligente iris tien kaj tien. Li ial opiniis, ke tiam Tukaguti nepre staros sur lia flanko. Okazu kio ajn! En la koro li pretigis sin por ĉia okazo.

Subite venis al li la ideo, ke la regimenta centralo denuncos iujn kiel respondeculojn de la evento, laŭ ilia propra esprimo, “konflikt-semantojn”, sen kio la afero ne solviĝos. Jes, nepre, devas esti! Kion fari tiam, aŭ kiel? Ĉu milita tribunalo?

Povas esti, ke oni min kondukos al tiu milita tribunalo, se oni nepre bezonos havi ian ŝafon por martirigi. Bone! ankaŭ bone! Se oni eltrenos min al la juĝejo, mi provos repliki plej forte, kaj senmaskigos tiujn kaj tiujn, kaj antaŭ ĉio la veran fazon de la ŝajndemokratio usona. Se temas pri malliberejo, mi estas ne rekruto. Dum li tiel ĉi cerbumadis, venis al li la voĉo, kiel atende, de Oose:

— Mi ja kulpis, mi kulpis, ĉar mi aŭskultis la voĉon de la ruĝuloj.

Ha, li ne perfidis min, Hamada opiniis tiel, kaj de apude sekvis Katayama, la fia satelito de Oose:

— Al kiuj ni devas danki pro nia sorto?

— Al la jankiaĉoj!

Suzuki replikis lin akre en tiu momento.

— Ĉesu, Suzuki!

Antaŭ ol Hamada admonis, Tukaguti sin ŝovis antaŭen.

— Hej, Katayama, Oose, se necese, ankaŭ vi, Nakazima, venu ekster la pavilonon! Mi instruos, kiamaniere la viro devas agi. Ne grumblu vane! ... Venu eksteren! Ĉiuj kune!

Hamada preskaŭ eklarmis ĉe tia konduto de Tukaguti, ĉiam malparolema kaj konata strangulo, kun kiu li aŭ Suzuki kutime ne parolis intime. Kvankam ili kredis ĝis tiam lin ne malamiko, sed ili ne povis rigardi en li la plej bonan amikon en tia stato. Se li ne intervenus, ili ambaŭ povus esti ĉirkaŭbatitaj de Oose kaj lia kompanio.

Tien rivelis sian vizaĝon Kawamura, la batalionesto, denove.

— Sinjoroj Suzuki kaj Hamada, la centralo volas paroli kun vi ambaŭ. Mi petas, venu kun mi.

Kio? Ili sekvis lin senatente. Antaŭ la bataliona centralo, jen staris du usonanoj kun fusilo sur sia dorso kaj kun bastono en sia mano. Ha, damne! La regimentestro staranta apud ili fingromontris ilin, li vidis.

— *Haba! Haba!*

Ili devis denove kuregi anhele bastonate ĉe la sidvango. Ĉe la elirejo de la palisaro Hamada pretervidis,

ke ankaŭ Hayasi, la estro de la 2-a bataliono, estas same pelata de bastonoj.

— Ba! La aĉuloj perfidis?

Batate kaj batate ili venis anhele antaŭ la spaco, en kiu troviĝis la detenejo, kaj apenaŭ tie oni haltigis ilin.

Al ili venis la regimentestro kaj kune kun du usonaj oficiroj-ĝendarmoj. Unu el ili estis sendube tiu komandanto McCoy mem. Lia nervoza vizaĝo ŝvelis de indigno kaj iĝis tute pala. En lia mano Hamada vidis obtuze brilantan revolveron. Li estis konsternita verdire.

Tien alkuris Sobe zensaburô. Hamada ne povis kompreni kial, li restis nur en sia kalsono. De la 1-a bataliono Hamada kaj Suzuki, de la 2-a — Hayasi kaj tiu elektrolaboristo, de la 3-a — Sobe kaj alia nekonato, de la 4-a du, kies nomojn Hamada jam forgesis kaj de la 5-a kaj 6-a neniuj. Nome entute ok “konflikt-semantoj” estis elpinĉitaj de la regimenta centralo kaj enpelitaj tien ĉi batue. De la ok tiuj personoj Hamada konis nur kvin, sed la aliajn tute ne, sed ankaŭ ili devis esti same aktive laborintaj en la evento aŭ povis esti la celoj de la aŭtoritatularo de la koncentrejo almenaŭ tiutempe.

— Atent’!

Kriis la regimentestro. McCoy venis unu paŝon antaŭen kaj parolis, kion kompreni Hamada ne povis pro la troa rapideco kaj flamemo. Sekvis interpreto:

— La ribelulojn la ĝendarmaro malliberigos dum du semajnoj.

Kion diri aŭdace! Hamada pretervole elpaŝis, sed

anticipis lin Hayasi.

— Sen juĝo puni estas maladekvate. Mi mem havis nenian rilaton kun la lasta evento. Prefere oni juĝu en juĝejo!

Suzuki sekvis :

— Mi ne scias, kia devas esti la usona demokratio, tamen kondamni sen juĝo estus kontraŭ la leĝo, mi kredas.

Kvazaŭ domaĝante la interpretisto konsolis ilin.

— Nun la ulo — li aludiŝ per tiu vorto la komandanton — estas en flamo. Nenia plendo utilas. Se ni kontraŭparolus, li povus vin pafi. Mi petas, eniru en la detenejon. Mi miaflanke iel klopodos por vi. . . En ĉiu okazo la ulo restas flamanta, do. . . lia revolvero. . .

La interpretisto mallaŭtigis la voĉon ĉe la vorto “la ulo”, la tradicia termino de la kaptitoj, kaj kvazaŭ petis ilin.

— Se vi petas, ni eniru!

Suzuki senĝene kaj aplombe konsentis, kaj de si mem eniris en la detenejon. Neniu alia rimedo ol sekvi lin.

Ili eniris en la malliberejeton, kiu situis rekte sub gardturo staranta ĉe la plej profunda angulo de la koncentrejo. Kvankam nomate “detenejo”, ĝi efektive estis nur malplena placeto pikdratumita ĉirkaŭe kaj ampleksa nur 25 kvadratmetrojn, kaj la mezon okupis ia fosto. Sen tendo.

Kiam ili ĉiuj eniris, McCoy alkriis :

— ... pantalonon!

Ĉar temis pri ekstersupoza afero, neniu el ili povis kapti lian parolon krom tiu “pantalonon”.

— Mi petas, demetu vian pantalonon.

La interpretisto ŝajne estis tro ĝenata de tiu stranga ordono. Ili demetis sian pantalonon antaŭ la brilo de la revolvero. Tuj sekvis nova ordono demeti ĉemizon. Dum ili restis konfuzitaj, la komandanto fine demetigis eĉ kalsonon, tiel ke ili restis tute nudaj, kvazaŭ ĵusnaskita bebo. Hamada flamis pro tia hontiga kaj ekstravaganca ordono. Se li nur povus, li volonte donus vangofrapon al li, sed siatempe li ne kuraĝis, ĉar timigis lin la revolvero. Li ja estis tiel konsternita, ke li povis fari nenian proteston en tiu okazo.

— Bone!

Kiam la interpretisto diris, McCoy denove kriis ion, kion kompreni Hamada ne povis.

— Li ordonis, ke vi vin starigu per viaj kvar membroj surtere.

Stari sur la kvar membroj surtere? Ili estis deanimitaj, kaj en tiu momento la oficiro pafis sur la teron distancan tri metrojn for de Sobe, kiu staris plej maldekstre de la vico, kaj faris trombeton el sableroj. La alia oficiro metis siajn ambaŭ manplatojn sur la teron, malantaŭen tiris siajn piedojn kunigitajn kaj ektenis sian korpon aere, kiel oni faras en la knabeco gimnastike.

Tute nudaj!

Sen kalsono!

Ok viroj kune en tia pozo!

Hamada brulis de indigno, sed en tiu momento venis al li malgraŭvola rideto, ĉar li povis imagi sian figuron similan al hundo. Paf! Kuglo mergiĝis en la teron ĵetante ŝtonetojn de tuj antaŭ liaj piedoj. Ili ĉiuj devis obei la ordonon de la flamanta ĝendarma oficiro kun serioza mieno. Neniu alia rimedo kontraŭ tiu ĉi. La interpretisto domaĝe diris al ili konfuzite.

— Ni aranĝos tuj baldaŭ iel. Mi petas, ke vi tenu vin brave dum kelka tempo.

— Vi nun havas ŝancon por rekonsideri pri via ago.

La regimentestro bruskis. Kvankam Hamada ĝis tiam havis nenian privatan malamon kontraŭ li, kaj liajn ĉiajn kanajlaĵojn povis atribui nur al la sistemo, kiu permesis aŭ devigis lin tiel konduti, tamen por la unua fojo la forta indigno kontraŭ tiu apaĉo ekflamis en lia koro, jes por la unua fojo li vere eksciis, kiel malami sian malamikon.

— Perfidulo! Ni venĝos nin iam pli grandskale!

Iu el la vico kriis sen levi la kapon.

La kvaroj tuj forlasis la lokon, kredeble ĉiu kun aparta penso kaj sento.

Hamada opiniis, ke teni sin en tia pozo eĉ komplete sana viro povos nur dek minutojn. Li, kaj eble ankaŭ la aliaj ĉiuj, atendis, ke la soldato en la gardturo kalkulas la tempon kaj post nelonge liberigos ilin de tia puno.



Kvin minutoj... dek minutoj... dek kvin...

Neniu voĉo, neniu voĉo. Sen esploro... sen juĝo... kaj tia puno... en tia pozo... sen kalsono... Hamada sentis, ke li baldaŭ estos venkita unue de la fizika forto, due de sia indigno kaj honto aŭ ofendo. Li preskaŭ svenis kaj ŝanceliĝis.

Paf! La kuglo falis antaŭ lin je du metroj kaj plonĝis en la teron. Damne! Li volis sin pli firmigi, sed la manoj ne obeis lin kaj lia korpo mem falis surteren. Paf! Ĉi foje la kuglo mergiĝis antaŭ tri metrojn kun sama trombeto. Spontane lia korpo leviĝis de la tero. Li sentis, ke en li flamas elkora malamo kontraŭ la malamiko, kian li ĝis tiam neniam havis. Diabloj britaj kaj usonaj! Dum la milito la japana militismo distrumpetis pri ilia krueleco per tiaj vortoj ripete kaj ripete, kaj tiel volis stimuli la "nacian spiriton", kion li ĝis tiam nur forridis, sed nun... tamen nun... en sia menso ĉiam svenanta li flame kaj brule pripensis tiajn vortojn trivitajn.

Paf! Denove alflugis kuglo kaj trombeton faris maldekstre.

Ĉe ĉia moveto la mitraleto de gardturo, ne tiu super iliaj kapoj, sed 200 metrojn distanca, nome, trans unu palisaro, oni pafis, ĉar pafi de super la kapoj estis danĝere. Tiu pafanto devis esti tre eminenta pafisto, ĉar la kugloj ĉiam atingis du-tri metrojn for de ili kaj ne vundis ilin. Hamada trovis, ke li ankoraŭ povas esti trankvila kaj aplomba, ĉar li rimarkis, ke li povas ankoraŭ opinii tiel aŭ ĉi tiel.

En ĉiu okazo ni vane ne indignu nek flamu kontraŭ io ajn! Nur ni tenu la malamon al ili kaj kovu ĝin ĉiam, por ke ni iam nin venĝu. Nur eltenu! Jam helpos nin nenio, nek vekrio nek plendo, nek... nek... Nur akumulu la forton kaj ĉiel eltenu... Hamada persvadadis sin kaj provadis forgesi ĉion sed resti nur indiferenta al ĉio kaj iel strebi por kolekti kaj koncentri sian forton por elteni sin kontraŭ tiu granda provo. Esti flegma, senzorga, senpensa, sencerbuma... nur tio savos min de la pereco, li pensis kaj senkonscie, morte sin tenis. Tamen venis al li diversaj ideoj, antaŭ ĉio flama indigno kontraŭ la maljusto...

Vesperigis. Venis lumo al la lampo sur la fosto malantaŭ ili, kaj jetlumo de la gardturoj kaj fosto sur pikdratoj ilin prilumis. Teni sin sur la kvar membroj kaj tute nuda, laŭ la japana esprimo, kun testikoj pendantaj! Certe ridinda figuro! Ili nur atendis la tempon, kiam oni modifos iamaniere la punon kaj post nelonge liberigos ilin. Sed venis nenia informo nenia sciigo, kaj ĉe ĉia moveto ankoraŭ daŭre oni sendis kuglojn. Sub la plena lumego ili daŭre tenis sin en tia pozo. Jam venis nenia pripensado pri la kolegoj, kiuj ŝajne restis enfermitaj en sia palisaro, sed sen pavilono, kaj sub la libera ĉielo. (Ili tamen povis almenaŭ kuŝi, eĉ se sur la sablo!).

Matenigis. Nepre ĉe la mateno! Ili atendis, sed ankoraŭ neniu venis. Ili supozis, aŭ penis supoziti, ke nun oni pretigas por la laboro, kaj ĉiu devas esti tro

okupata de la aferoj, ĉu ĝendarmoj ĉu centralanoj, kvankam ili mem ne forgesis pri ili. Hamada pensis foje tiel sed alifoje neis tion.

Neniu venis. Ĉu la ĝendarmoj malpermesis veni tien?

Tagmeziĝis. sed la sama. . .

Denove vesperiĝis. Sed la sama. . . La interpretisto, al kiu ili metis sian lastan esperon, eĉ ne montris sian vizaĝon.

Denove mateniĝis, denove tagmeziĝis, sed la sama stato ĉiam plu, kaj fine venis denove la vespero. Ili tamen iel eltenis sin en tia pozo, jam 48 horojn ili pasigis senripoze en tia bestia puno. Sen manĝo, sen trinko. Sed ili ne sentis malsaton nek soifon. Grandega hontego kaj flama indigno, sed neniom da pento regis Hamada, kiu jam komencis kredi, ke la morto ne estas tiom malproksima de li. Tian senton li neniam havis eĉ en la batalo.

Fine venis la interpretisto nur sola, kaj diris al ili :

— Ekstaru, mi petas, vi ĉiu! Mi domaĝas kaj devas bedaŭri pri nia malkapablo. — Li diris “nia” — La ulo volas nenion akcepti kaj restas ankoraŭ en kole-rego. Mi devas peti de vi pardonon. . . De nun, vi staru senmove! Ni mem klopodos ĉiamaniere. Vi sciuj, ne ĉiu centralano amikas al la regimentestro aŭ al la ulo. Ni ĉiuj ĉiel penos, mi petas, ke vi staru ĝis tiam. . . Ne, oni ankoraŭ ne permesis doni akvon.

Al li Sobe postulis, ke oni esploru la aferon kaj, se necese, sendu ilin al juĝejo. Laŭ lia angora tono Hamada apenaŭ povis konjekti, ke tiu estis li mem, kiu kriis ĉe la unua okazo "Perfidulo!" La respondo de la interpretisto tamen estis sama, sonis al iliaj oreloj tro formala, flegma kaj apatia. Hamada juĝis, ke oni severe malpermesis ankaŭ al la interpretisto montri ian simpation al ili. Kiel en la armeo, la hierarkio kaj tion sekvantaj denunco aŭ kalumnio ankoraŭ minacas la interpretiston, laŭ Hamada.

Falis mallumo ĉirkaŭen, dum la detenejo restis en lumfaskoj kvazaŭ taglume. Oni donis permeson porti vestojn. Ili ĉiu lantmove sin vestis. Al Sobe, kiu venis nur en la kalsono, de ie oni alportis vestojn. En la poŝo de la pantalono li trovis kelkajn cigaredojn kaj alumetojn. Oni donis certe ne al li, kiu ne fumis, ili juĝis, sed povis esti alia kialo: ekzemple, oni lasis ilin pro simpla forgeso. Tamen ili tiam kuraĝiĝis pro tiu solidareco verŝajne montrita.

La senmova starado same daŭris 48 horojn, kaj same sen manĝo kaj sen trinko. . . kaj ĉe ĉia moveto oni plu sendis kuglojn.

Ĉu mi mortos tie ĉi? Li pensadis. La dekstra kaj maldekstra kruro alterne lin apogis kaj alterne ripozigis sin, sed tia rimedo kompreneble ne multe helpis lin. La buŝo, nur tiam li eksentis, fariĝis ĉiam pli tenaca pro manko de salivo kaj en si murmuris ĉiam: "Ba, janki-aĉoj!" Sed finfine ĉia nervo malaperis ŝajne, kaj tute,

komplete stupora li iĝis. Jam li sentis nenian doloron kaj samtempe nenian koleron. Ne nur la kruroj, sed ankaŭ la tuta korpo estis paralizita, nur en la kapo li sentis kvazaŭ li portus kelkdek kilogramojn da obtuzo, kaj la tuto unuvorte ŝanĝiĝis en unu ŝtipon. Mi falos tuj. Ĉu mi falu memvole por liberigi min de la torturo? Li pensis ripete kaj ripete, sed li povis iel elteni sin eble nur pro sia memfiero. Ne ia klopodo por sin elteni, sed nur la sento aŭ tenacemo, aŭ rezistemo aŭ kontraŭe obeemo. . . Cirkulis ĉiam sama penso en la nebula kapo.

En la vespero de la kvina tago venis la interpretisto ĉifoje ankaŭ sola.

— De hodiaŭ vi povos kuŝi ekde la 8-a horo vespere, oni permesis. Mi alportos poste al vi akvon. Tiam mi iel havigos al vi ankaŭ manĝon, kvankam ankoraŭ sen permeso. Vi devos manĝi nerimarkate. Ne lasu sciiĝi ankaŭ al la regimentestro.

— Ha, dankon!

Kelkaj dankis lin samtempe.

— Sinjoro interpretisto, mi petas, prefere oni pridemandu nin, esploru la aferon. Sen esplori puni estas krimo. Miaflanke mi havas nenian kaŭzon por tia puno. Kredeble iuj aliaj. . .

Hayasi tiel dorne eldiris, ke en la koro de Hamada ekflagris forta kolero kontraŭ li, sed li tenis silenton duone pro sia konsumiteco duone pro sia rezigno pri lia personeco. Ne plendu vane, hundaĉo! Eĉ se vi mem ne havas la kialon, la usona flanko havas ĝin, kaj punas

tiujn, kiuj ne plaĉas al ĝi.

— Ne! . . . Mi penos por tio, sed nepre maleble. Cetere nun mi sciigas al vi tute private: McCoy estis eksigita de la estreco.

Ĉu la komandanto de la usona ĝendarmaro estis forpelita de sia posteno? Ĉu? ĉu vere?

Ĉiu jubilis sed nur en sia koro.

Krakenoj kaj fromaĝoj estis liveritaj. Ankaŭ cigaredoj. Kuŝante sur la sablo kaj gardante sin per rondigitaj ŝultroj kontraŭ rimarko el la gardturo ili manĝis. Sed Hamada sentis naŭzon ial kaj vomis angulen. Post urinado li ekhavis ian trankvilon en la koro kaj eble en la stomako, kaj denove ekmanĝis, voris. Tre bongustaj!

Eble notindas por legantoj, ke li tute forgesis, kiel ili faris kun sia fekado aŭ urinado, kaj kie. . . Eble troviĝis ia necesejo en la palisaro, sed kie? Li ne povis rememori.

— En la palisaro interne de la palisaro!

Sobe ridis. Hamada tuj pensis, ke li iam legis tian frazon en ia poemo.

En la palisaro interne de la palisaro! Sed nun Japanio entute restas en la palisaro, samkiel antaŭ la milito. Troviĝas nur tre malgranda diferenco, al kiu apartenas tiu palisaro. Ha, mi vivis strangan vivon ĝis nun, kaj ankoraŭ nun. Se ne fenomenan aŭ fabelan, almenaŭ neordinaran vivon mi vivis. Hamada pensis en sia ĉiam svenanta kapo pri iamaj scenoj forfadantaj: arestejoj, malliberejoj, armeo, koncentrejo — kaj nun ĝia mallibere-

jeto. Nur armea malliberejo restis ekster mia “eniro” aŭ “enmetiĝo”. Kia sorto! Sed ĝi estas ja konvena al la japana konsciencia junulo vivanta sian Junecon en la ŝtormo de la tridekaj jaroj! Ni eniris ja ĉien, kian ne ŝatas ordinaraj personoj. . .

Li endormiĝis dume, kaj ĉe la venanta mateno — denove senmova starado.

Pasis kvar tagoj, kvin tagoj, kaj unu semajno. Li jam forgesis, de kiam oni permesis al ili manĝi kaj trinki, sed ili manĝis certe almenaŭ la lastan semajnon.

Ne nur Sobe aŭ Hayasi, sed ankaŭ Hamada kaj eble ĉiuj aliaj ne povis malkaŝi, ke en la koro ĉiam kreskas ia espero pri “amnestio” en tiu dimanĉo, sed vane.

Ĉiu diris jam nenion inter si eĉ en kuŝado. Kiam oni unuafoje permesis kuŝi, Hayasi kaj Sobe alterne alparolis soldatojn deĵorantajn en tiu gardturo super la kapoj, en idiomaĵo de kaptitoj, nome, kripligita angla lingvo, ke ili peru ilian deziron ricevi oficialan juĝon, sed la respondo estis ĉiam sama. Post sufiĉa plorpledado ili respondis kategorie: “*I don't know* (Mi ne konas!) aŭ “*I don't understand!* (Mi ne povas kompreni!)

Neniu jam elvortis, eĉ en vespero ili parolis neniom inter si. Preskaŭ mortintaj ili staris tage, preskaŭ mortintaj ili kuŝis nokte. Ĉu ili vivis aŭ mortis? Se tiam troviĝus iu psikologo, tiu nepre dirus, ke iliaj nervoj jam mortis, sed nur la korpo. . . En komato ili daŭre staris kaj estis fojfoje vekitaj de pafado kaj sin streĉis.

Hamada komencis firme kredi, ke li nepre mortos. Dum en la batalo, en kiu pli ol 700 obusoj kaj kugloj lin duŝis statistike, li neniam havis tian senton, kaj efektive li havis nur unu vundeteton ĉe sia maldekstra gambo, sed ĝis tiam li neniam sentis tiel proksiman morton. Li foje rememoris pri la praveco de liaj kamaradoj, kiuj sencede ankoraŭ sidas en malliberejo malluma sed kun espero luma.

Vi estas ja bravaj. Sen perfidi vin mem vi travivas dek jarojn, kaj plie kelkajn jarojn en malliberejo. Kompare al vi, kia estas mi? Mi cedis nur post du jaroj da malliberigo, kaj devis ĵuri antaŭ la malamiko konverti min malgraŭ ne elkore, kaj nun, anstataŭ la eta libero, havas tian vivon. Nun mi devos esti mortigata en tia stato! Sed ankaŭ bone. Konvena kaj merita sorto por mi. Mi povas ankoraŭ fieri eĉ se iomete, ke ankaŭ mi iel kaj iel post mia konvertiĝo daŭre klopodis rezisti kontraŭ la potenco, bari la militon, sed kiel malgranda estis mia rezisto kompare kun la via. Tamen ankaŭ tio estas pardonebla al mi. En ĉia okazo ankaŭ mi iamaniere daŭre luktis. Ne, verdire, mi nur volis lukti. Sed ankaŭ bone, pardonebla por mi, eĉ se malgranda estis la laboro. Ĉiuokaze mi iel batalis ankaŭ por bari la militon kaj nun kontraŭ la usona militismo, kaj almenaŭ tion pruvis la eksigo de la komandanto de la ĝendarmaro sur tiu Okinavo... Do volonte mi fermu la okulojn por ĉiam!

Pensante, repensante tiel kaj ĉi tiel li staradis, sed la kruroj jam ne havis la vivon. Ne nur Hamada sed



ĉiuj aliaj, escepte de Suzuki, kiu neniam ŝanĝiĝis nek ŝanĝis sian pozon. Li firme kaj solide restis sin tenanta senŝancele, dum ĉiuj aliaj sonĝe, delire, halucine. . . naĝadis, ŝanceliĝas.

Iun vesperon, kiam ili kuŝis surtere, iu demandis al li post relasa elŝpiro, kial li povas tiel staradi superhome.

— Hm, mi ĉiam staradis sur armaturaj framoj super la tero, dum mi laboris en mia laborejo. Tiam nur eta ŝanceliĝo kondukos nin al morto.

Li longe predikis aŭ inciris ilin en tiu arto, kiel staradi senŝancele, kaj imponis ilin, sed ne povis konvinki. Nur pecoj de liaj vortoj ankoraŭ nun restas en la memoro de Hamada: kiel eble plej streĉiĝi ĉe la piedpintoj, kaj sin teni senpense kaj sencerbume kun fermitaj okuloj. Hamada tuj provis laŭ lia leciono, sed kiam li fermis siajn okulojn, la dormemo tuj obsedis lian cerbon aŭ lian tutan korpon.

La 14-a tago venis finfine. Ĉu oni venos liberigi nin? Aŭ oni sendos nin al milita tribunalo? Ili atendis kaj atendis frustrante inter si nerimarkate de la gardisto super la kapoj. En la mateno — neniu, en la tagmezo — same neniu. Apenaŭ en la 1-a horo posttagmeze, akurate post 14 tagnoktoj, venis unu oficiro, la regimentestro kaj la interpretisto kun du aliaj laboruloj.

— Hej, vi nun estas liberaj!

La regimentestro kvazaŭ mokante deklaris. Lia

vizaĝo, kiun Hamada vidis post la sufiĉege longa tempo, restis grasbrila kiel antaŭe. Li volis surkraĉi lin, sed apenaŭ sin detenis.

Momente Sobe falis surteren kvazaŭ bastono. Li svenis.

— Venigu brankardon!

Laŭ tiu ordono du laboruloj tuj retroiris okulsignante unu al la alia.

— Nun vi rajtas ripozi. En via propra pavilono vi ripozu trankvile.

La interpretisto diris, al kio Hamada donis vortojn insistajn:

— Ne! Mi volas ricevi oficialan juĝon.

Tiu ĉi respondis mallaŭte:

— Ne, tio ne povas okazi. Se oni havus oficialan juĝon, ankaŭ ilia flanko devus esti iel juĝata pro la malkonvena aranĝo. Kaj ankaŭ vi mem ne povus resti senpunaj, kaj severa punlaboro atendus vin ĉiujn. Mi petas, rezignu, ne plendu. Tio utilos por ni ĉiuj kaptitoj.

— Ne, stultaĵon ne diru! Por kiuj estas tiu “por ĉiuj”. Ĉu tiu “ĉiuj” koncernas la regimentestron?

Suzuki pli impetis repliki. Ŝajne la regimentestro ŝanĝis sian mienon, sed li kuraĝis elbuŝigi nenion. La kalkanojn strikte returnis la oficiro kaj diris nur: “Venu rapide!”

Verdire Hamada jam havis nenian forton por insisti plu. Do ili ĉiuj ĉesis apelacii plue, kaj sekvis la oficiron

kaj aliajn ŝanceliĝe, kvazaŭ naĝante. La estro ne venis kun ili. Ŝajnis ke li atendas la brankardon por Sobe.

— Ha, saluton!

Tuj antaŭ la nove instalita pavilono Tukaguti staris renkonte al ili. Kial li nur sola restis en la ejo, dum ĉiu devis iri al sia laboro? Sed tia penso ne tuj trafis ilin, Hamada kaj Suzuki, kiuj apenaŭ entrenis sin en la pavilonon, kaj tuj sin kuŝigis subtenate de Tukaguti. La kuŝejoj por ili ambaŭ estis jam pretaj, tio estis, kvaroble faldita litkovrilo estis sternita por ambaŭ. Suzuki facile sin kuŝigis kun vortoj: “Ha, mi estas laca.” Hamada trovis, ke li estis kvazaŭ reveninta de ĉiutaga laboro.

Ĉirkaŭ unu horon ili kuŝis senvorte kaj en tia stato dormetis, sed profunde dormi estis maleble malgraŭ tia grandega lacego, aŭ eble pro tiu lacego mem. Tiam Tukaguti proponis, ke ili prenu banon. Do ili volonte ricevis de li bantukon kaj sapon prunte, kaj iris al banejo antaŭ la centralo de la regimento. Tukaguti akompanis ilin malgraŭ ilia rifuzo.

La banejo, Hamada trovis, estis farita multoble pli granda kaj bonaspekta ol tiu antaŭ la evento. Kompreneble sen tegmento sed nun ĉie, ĉu la lavejo ĉu la vestejo, estis plankita per tabuloj, kaj vice staris benzinskatolegoj servantaj kiel bankuvo.

Venis tien ĉiuj kamaradoj en la punejo krom Sobe, kiu kuŝis en la kuracejo, sed laŭdire jam en neserioza stato. Hamada apenaŭ povis rifuzi la proponon de

Tukaguti, ke li lavu al li la dorson. Kaj ili ĉiu lavis la dorson unu al la alia.

Duonhoron ili ĝuis la banon tie, dume ilia streĉo estis relasita, li sentis. Post la bano ili iris al barbirejo, same novinstalita apud la banejo. Tie ne troviĝis granda spegulo kiel en ordinara barbirejo, sed laboris specialistoj el kaptitoj, kaj tondis al ili la harojn kaj razis la vizaĝojn per nova akretranĉa razilo. Poste Hamada aŭdis, ke oni aparte pretigis ambaŭ instalaĵojn por ili en tiu horo, kaj Tukaguti duonĉantaĝe tiun tagon restis senlabora por akcepti ilin aparte, malgraŭ grimaco de la batalionestro, kiu povis resti daŭre sur sia posteno dank' al la evento kaj ĝia sekvo.

Ili ridis unu al la aliaj montrante la novajn instalaĵojn, sed Hayasi tiam deklaris kun brusto ŝveligita:

— Nun por ni restas nur neordinara metodo.

Efektive tiam Hamada ne komprenis, kion li diris tiam, kaj krome li ne povis kompreni kial li devis tiel hasti por sia rehejmiĝo. Ĉu lia ekonomia situacio postulis tion? Post kelkaj tagoj li intence trinkis benzinon kaj fariĝis malsana, kaj dank' al lerta korupto li transsendiĝis al la hospitalo en Kadena, kaj de tie baldaŭ reiris al sia urbo Osako. Kaj ankaŭ post kelkaj jaroj Hamada revidis lin en tiu urbo, kaj tiam trovis, ke li jam estis parveno dank' al la komerco de nigra merkato.

## 7. Post la uragano

Tamen en la pavilono ĉio aliformiĝis.

Oni limigis posedaĵon : nur du litkovriloj, manĝiloj, po unu ĉemizo kaj kalsono, sed ĉio alia estis malpermesita. La bruligita tabulplanko ne estis refarita kaj oni devis kuŝi rekte sur la tero, nur kun du litkovriloj.

Tukaguti bonvolis malfermi ladskatolan bovaĵon, kiun li iel kaŝe konservis en sablo, kaj ili povis apenaŭ ridi unu al la alia. Venis tien Kawamura, la batalionestro, kaj hezite kaj timide donis al ambaŭ viktimoj pakojn da biskvitoj. Pro la manko de apetito Hamada ne streĉis sian manon al ĝi, sed Suzuki senzorge prenis kaj ekvoris.

Ŝajnis, ke la laboro jam finiĝis, kaj oni komencis reveni al sia nesto.

— Ha, saluton !

— Saluton !

Tamen rigardante la vizaĝojn de la kamaradoj Hamada devis rimarki, ke jam preskaŭ duono el ili transiris al la alia flanko, kaj la trio, Oose, Nakazima kaj

Katayama, formis ĝian kernon en la pavilono. Takada donis al li cigaredojn, kiujn li ŝajne apenaŭ ŝparis por tiu tago, kaj preparis por ili kafon el tujpretaĵo.

Venis la vespero al la suda insulo, kie la tago estis longa. Junuloj el la 5-a kaj 6-a batalionoj venis al ili. Unu el ili apartenis al lia kaŝita grupeto. Miyata, iama kamarado en la batalo kaj dizerto, donis al Hamada skatolon da cigaredoj. Sed alia kolego Yosino ne aperis. Jen la du tipoj de la japana kampularo!

Hamada restis cerbumanta pri la estonta taktiko. La usona aŭtoritatularo sukcese skismigis la kaptitojn per la bruligo kaj malpermeso de la proprajoj kaj per ĉantaĝo: ĉiu konflikt-semanto ne povos rehejmiĝi baldaŭ, kaj aliflanke per kelkaj plibonigoj de la vivkondiĉoj kiel jam montrite supre. La usona flanko videble sukcesis, Hamada devis konstati tion, kaj ĝi atribuis ĉian respondecon pri la konflikto al ties "semantoj", kaj oni ektimis ilin. Sed la alia duono ŝajne pli inklinis al ili ankoraŭ, aŭ pli firme ol antaŭe. Nu ni baldaŭ... rekomencos...

Post senbezona flatado aŭ konsolo Kawamura baldaŭ forlasis la pavilonon, kiu komencis brui pro kutima hazardludo, kiel antaŭe, sed kun vetaĵoj multe pli malriĉaj. Oose estis hetmano same kiel antaŭe kaj bruis kun sia balancata kalva kapo. Takada same povis esti la celo de ilia ĉirkaŭplukado. Hamada restis kuŝanta dumtempe kaj penis endormiĝi, sed la bruo estis ne tolerebla por li, kiel ajn li estis lacigita. Li volis iri al la regimenta centralo, sed tuj reŝipensis kaj ĉesis iri, ĉar

tia ago povus esti kvazaŭ de gangstero, kiu iras por “postdanki”.

Li haltigis sian paŝon ĉe la elirejo de la 1-a bataliono. Abrupte la radio komencis paroli. La mikrofono sur fosto laŭte parolis super li. Ĝis tiam la centralo aŭ la ĝendarmaro baris ĉian informon por ke la kaptitoj sciu nur tiujn novaĵojn, kiuj ne pelas ilin al la sopiro al la hejmlando, aŭ kiuj ne tuŝas la majestecon de la tenno-ismo, kaj almenaŭ iugrade ili ja sukcesis kaj igis la simplulojn fremdaj al la situacio en la hejmlando, eble por ke ili ne estu “malfidelaj ruĝuloj”. Nun la radio estis malfermita antaŭ ĉiuj.

Li estis konsternita en tiu momento.

— Sekve parolos sinjoro Tokuda kyūiti, la ĝenerala sekretario de la Komunista Partio de Japanio. . .

Li ekploris, ploris, ploradis aŭskultante la vervan paroladon, kion la regantaro ĝis nun izolis for de la popolo per drasta puno kaj malliberigo. Lia koro dege- liĝis ĉe la vorto “Partio”, kaj spontane elfluis larmeroj sur liaj ambaŭ vangoj, la varmegaj larmeroj. . .

Sed en la sekvanta momento io frida, ekokupis lian koron.

— Ha, granda malfeliĉo!

Tokuda en sia kutima sovaĝa tono agitadis pri la nutraĵa problemo, sed ju pli li entuziasmiĝis, des pli la koro de Hamada iĝis fremda kaj fora de lia agitado, ĝis fine li jam ne povis aŭdi daŭre. Diversaj pensoj kaptis lian cerbon.

Kompreneble li persone ne konis lin, sed nur aŭdis, ke li ne cedis antaŭ la persekutado de pli ol dek jaroj da malliberigo en fora frostega karcero, kaj per tio li povis esti iusence la idolo aŭ simbolo de la komunistoj, eta palpebrumanta lampeto tra la longa densa mallumo. Sed Hamada ne povis lin kredi unuaranga gvidanto pro lia tradicie aŭ legende konataj epizodoj. Li tiam nevole rememoris ke li iam legis lian leteron sur la organo de la partio: “Bedaŭrinde mi estis kaptita. Mi urĝe petas liveri al mi «La Kapitalo» kaj «Montpasejo Daibosatu»”. Ĉi tiu lasta estis vulgara romano siatempe furora. Hamada neniel povis fidi tiun gvidanton, kiu povis meti sur la saman nivelon la aŭtorojn de la du verkoj.

Se tiu Tokuda povas esti la ĝenerala sekretario. . .

— Itikawa mortis!

De la sekretarieco de tiu Tokuda Hamada divenis la morton de tiu gvidanto, membro de la ekzekutiva komitato de Kominterno, longedaŭre tenata en malliberejo kaj neniel fleksebla. Li de antaŭe iel sciis, ke Kokuryô, alia gvidanto el laboristaro, jam mortis en karcero de Sakai, kie iam li mem suferis.

— Ha, granda bato al la partio!

Li intuicie sentis tiel kaj tian ĝenatecon prava atestis multaj plipostaj eventoj.

Kaj iom pli poste li eksciis per la sama vojo pri “la unuamajo por nutraĵoj”.

— Mi, la tennoo, manĝas plenstomake. Vi, la



popolanoj, mortu pro malsato. . .

Tekstis tiel iu portafiŝo, li aŭdis kaj sentis fortan korbato. Li rememoris, ke iam "Sekki" ("La Ruĝa Flago", antaŭmilita kontraŭleĝa organo de la partio) anoncis, ke laboristoj kaj studentoj manifestaciis en la direkto al la tennoa palaco kun la slogano "Renversu la tennoismon!" ĉe la funebra ceremonio por Kobayasi takizi, mondfama verkisto mortigita de la torturo fare de la polico, kaj estis frakasitaj de rajdantaj ĝendarmoj kaj policanoj. Antaŭ longa, longa tempo. . . kaj nun. . . (La evento efektive ne okazis !)

Li larmis kaj larmis ĉe tiu novaĵo, sed tamen li ankoraŭ ne povis konscii pri la eraro de la partia linio. Nome ĝi devis unue celi la okupantan armeon de Mak-Arturo, kiel la ĉefan malamikon, kaj nur duasignife la tennoismon. Nur post unu jaro tion li povis ekscii, cetere, lia propra sperto sur tiu insulo multe helpis lin por kompreni. Ataki unue la malĉefan malamikon kaj preteratenti la ĉefan, jam ŝajnis kronika malsano de la partio kaj de Kominterno.

Diversaj rondoj naskiĝis ĉirkaŭ Hamada kaj liaj kamaradoj, aliflanke ankaŭ pro la prizorgo mildigi la korojn fare de la centralo, kiu celis preventi "la infektiĝon pro la ruĝuloj". La estraranoj, kun la regimentestro kiel la unua, fariĝis rimarkinde malsovaĝaj kaj perfortaĵoj preskaŭ malaperis de la koncentrejo.

Dume parto da kaptitoj klare ekmontris sian anti-

pation al Hamada kaj liaj kolegoj. Sukcesis la politiko de la aŭtoritatularo el la usonaj kaj japanaj flankoj. Tamen alia parto konsciis ke ili ne estis “konflikt-semantoj”, sed nur viktimoj de la kontraŭa flanko. Ili, la “konflikt-semantoj”, efektive ludis nur etan rolon en la evento, kiun lanĉis la amaso mem. La homa karaktero ja estas tiel stranga, ke Hamada malgraŭ tio fine povis ekkredi, ke li estis efektive la gvidanto de la afero, kaj ne hezitis akcepti onian atribuon pri tiu afero. La evento ja estis unika dum la pacifika milito, kiom li nur sciis, li fieris, sed poste li hazarde aŭdis, ke simila afero okazis ankaŭ en la kontinento, kies gvidanto(?) estis lia konato.

Cetere inter tiuj ok viktimoj nur du havis komunistan inklinon, kaj iomete simpatia estis nur unu, nome tiu Hayasi. Hamada kaj Suzuki ja antaŭkalkulis lian tian karakteron kaj eliminis lin de ilia grupo, aŭ pli vere, li mem de sia flanko penis stari ekster ilia ago, kiel jam priskribite. Tamen post ilia persista persvado, precipe pri la tennoismo, kiu katenis ĉiujn japanojn preskaŭ religie, iom post iom junaj amikoj, kolegoj, precipe el la 5-a kaj 6-a batalionoj ekmontris sian simpation al ili. Ili venis tien en sia aktuala militservo, kaj edukitaj de la absolutisma disciplino ne havis ŝancon por malfermi siajn okulojn, sed nun. . . la realo instruis. Tukaguti fine aliĝis al ilia grupo, sed li estis denaska malparolemulo, do reale ne multe kontribuis en tiu persvado aŭ klerigado.

En iu vespero al Hamada venis junulo el la 6-a bataliono kaj petis lin paroli pri socialismo. Li volonte

akceptis la taskon. Tukaguti akompanis lin malgraŭ lia rifuzo, ĉar temis pri tiu bataliono.

Kie finiĝis la vico de pavilonoj, sub la vespera lazura ĉielo kunsidis ĉirkaŭ 30 junuloj. Ili lakone sin prezentis unu al la alia, kaj Hamada povis ekscii, ke ĉiu el ili venis el tiel nomataj pioniradaj korporacioj en "Mongolio" aŭ "Manĉurio", senditaj de la koloniisma politiko de la japana registaro, kaj senescepte el simplanimaj kampuloj. Li priparolis kaj porparolis socialismon, trinkante proponitan kafon. Unu el ili kun brilaj okuloj demandis lin: "Ŝajne la socialismo aŭ komunismo estas prava, mi juĝis, sed kion oni faros pri Lia Tennoa Moŝto?"... Hamada kompreneble klarigis pri la signifo de la tennoismo, sed jam povis instinkte ŝeti sian opinion pri la usona armeo.

Rigardi la usonan armeon aŭ la imperiismon kiel ĉefan malamikon plaĉis al la junuloj, kaj post tio oni kelkfoje invitis lin paroli. Tamen li poste eksciis, ke inter tiuj aŭskultantoj troviĝis kelkaj spionoj de la regimenta centralo. Naiki, la estro de la 2-a roto, afable sciigis pri tiuj dubinduloj.

Ankaŭ en la rondo de la utao Hamada partoprenis, kaj ĉe la rehejmiĝo li apenaŭ kunportis unu broŝureton manfaritan de ili mem, cetere per hektografo el "batalfrukto". Inter tiuj nematuraj versaĵoj troviĝis ankaŭ liaj pecoj, kiuj siatempe ĝuis ies admiron kaj estis publikigitaj sur multobligata organo de la kaptitoj "Gazeto Okinavo", kiun oni komencis eldoni post la evento. Ĝia redaktoro iam apartenis al la maldekstrula tendaro, sed

post la rehejmiĝo li energie porparolas la politikan linion de Liberalista Partio kiel komentisto de “NHK” (Japana Dissenda Asocio). Lia nomo — Matumiya katuya.

Iun vesperon la regimenta centralo venigis Hamada al si kaj ordonis transiri al alia koncentrejo. Pri Hayasi jam estis skribite, kaj el la oko, aliaj ĉiuj krom Suzuki, kiu povis resti samloke, estis senditaj ĉiu aparte aliloken.

En la nova koncentrejo Oroku Hamada povis fari nenion, krom partopreno en malgranda rondo, kiun organizis tie profesoro Utida, nun tiea interpretisto. En sia juneco li laboris en japana kampula movado, gvidata de I. U. (esperantisto-poeto, siatempe vicmembro de la centra komitato de Komunista Partio de Japanio). Utida estis iam interpretisto en la koncentrejo Yaka, sed devis veni tien “ekzilito”. Ĉi tiu donis al Hamada multajn lecionojn, precipe pri la strategio de la partio kaj pri ties bazo : la problemoj pri la burĝo-demokratia revolucio.

Miskantoj gigantaj propraj en tiuj sudaj insuloj ekmontris siajn spikojn kaj ekfrapis iliajn okulojn en karesa venteto venanta de la maro, kaj incitis la nostalgion. Tiam denove ekfluis la onidiro, ke la rehejmiĝo estos en proksimo.

— En la regimenta centralo ĉiutage oni laboras urĝe okupate kaj tajpadas la liston de la resendotoj.

— Ĉiun tagon ĝis profunda nokto tajpiloj en Rycom laboras diligente.

La famo ripetita kaj ripetita denove disvastiĝis tra la koncentrejo, kaj ĉi foje ŝajnis tre vera, ne kiel ĝis tiam.

— La konflikt-semantoj kaj iliaj sekvintoj devos resti ankoraŭ plue.

Samtempe tiu onidiro cirkulis same ripetate. Hamada ne kredis tion, sed por eventuala okazo li pretiĝis sin. Li iris al Utida kaj konstatis, ke la proksimiĝo de la rehejmiĝo ne estas malvera.

Post kelkaj tagoj oni afiŝis la liston de la unuaj rehejmiĝontoj sur la aviztabulo antaŭ la regimenta centralo. Li trovis sian nomon en ĝi kun ekzaltita emocio. Utida ne troviĝis en la listo.

Per kamionoj oni transportis la listanojn al la haveno Yonabaru, en kies kampejo Hamada revidis siajn unuajn kolegojn venintajn el Sobe kaj Makinato. Troviĝis inter ili Suzuki, Tukaguti, Oose kaj liaj du kolegoj, Takada... Naiki kaj ankaŭ Kawamura. Sobe ne estis inter tiuj rehejmiĝontoj, ankaŭ Miyata ne. Sugimoto same. Tamen preskaŭ ĉiuj aŭtentaj kaptitoj-kamaradoj en Sobe ja montris sian sanan vizaĝon al li.

En la sekvanta tago ili ekveturis per kelkaj LST (usona malpeza platfunda transporto-boato). Dum li gaxis la golfon Nakagusuku, kies nomon oni ŝanĝis per la nomo de la usona komandanto Simon B. Buckner, falinta sur tiu insulo: Buckner Bay, li forte sentis, ke liaj fortoj kaj nervoj svenadas, velkadas, malstreĉiĝadas preskaŭ fade, kaj lia juneco, lia tuta vivo, kvazaŭ forflugus de li por eterne. Kiam la boato eknavigis, li

tamen iris al la ferdeko. Oni ekkantis kanzonon furoran en la armeo:

— Ĝis revid', vi Okinav' . . .

La kanto disvastiĝis al la surfaco de la kvietega glaŭka maro, al la malproksimiĝanta horizonto, al la kalva tero plugita de bomboj, obusoj kaj kugloj. Li larmis, larmis aŭdante ĝin, kvazaŭ rekviemon al la juneco. La insulo, por li la plej intensa batalejo en la senco de alia signifo, kaj la tombejo de la japana armeo, ĉiam pli malproksimiĝis de liaj okuloj.

Nun ni reiras al la uragano de ĝeneralaj strikoj! Li voĉis al si mem.

Estis la 22-a de decembro, 1946.

En la lando lin atendis la alarmado por la ĝenerala striko en la 1-a de februaro, kiun baldaŭ frakasis la ĉantaĝo de MakArturo, la komandanto de la usona okupanta armeo, kaj la misstrategio de la Komunista Partio, kio devigis la prezidanton de Tutlanda Kunbatala Komitato plore krii antaŭ la mikrofono de radio: "Unu paŝon malantaŭen, sed tuj baldaŭ du paŝojn antaŭen! Ni, laboristoj kaj kampuloj, nun devas pli firme unuiĝi!" Hamada devis aŭskulti tiun krion en unu el la kaŝejoj de Metallaborista Sindikato.

Li tamen en tiuj momentoj de la rehejmiĝo feliĉe ne povis antaŭscii pri tio.

— *La fino* —

## G l o s o j

Vortoj ne troveblaj en Plena Vortaro kaj ĝia suplemento  
(Asteriskitaj en Plena Ilustrita Vortaro)

- antecedentoj\* : ies privata vivhistorio.  
banjano\* : hinda figujo, kies branĉoj mem reenradikiĝas, *Ficus indica*.  
batui\* : ĉasi elpelante sieĝe.  
bestia\* : bestosimile sovaĝega.  
bruska\* : malmilde, akre malĝentila pro senpacienco aŭ malbonhumoro.  
cikaso : planto deveninta de sudaj landoj, *Cycas revoluta*.  
defetismo\* : malvenkismo.  
degni\* : moŝtece komplezi fari ion.  
diskriminacio\* : sendignige distinga traktado.  
dupo\* : naiva trompeblulo.  
feroca\* : kruelega.  
glaŭka\* : bluverda.  
Go home! : angle, "reiru hejmen!" sed ĉi tie kripligite "ni reiru hejmen!" aŭ "rehejmigo!"  
goo\* : ĉindevena ludo kun 181 nigraj kaj 180 blankaj globetoj sur tabulo kun 360 krucpunktoj. (Ĉinoj preferus diri "vejĉio")  
grumano : origine, usona aviadil-kompanio, sed ĉi tie aviadilo fabrikita de tiu.  
intonacio\* : frazmelodio, kaŭzata de la variado de la voĉa sonalto dum parolado.

- jankio\*: familiara nomo de usonano.
- kamikazo: japana aviadilo sin jetanta kun bomboj sur malamikan ŝipon aŭ aliajn instalaĵojn, moknomate de la alianca armeo, "sinmortig-aviadilo".
- Kominformo: Informejo de Okcidentaj Komunistaj kaj Laboristaj Partioj, sed esence la heredanto de Kominternio.
- Kominternio: Komunista Internacio.
- maĝango\*: ĉindevena hazardludo, en kiu partoprenas kvar personoj per ordinare 136 signitaj bloketoj el osto kun bambua tegajo.
- malversacio\*: ŝtelproprigo de mono, en la administrado de privata aŭ publika funkcio.
- miskanto: plurjara herbo, tre populara kaj intima al japanoj, *Miscanthus sinensis*.
- pandano: planto devena de sudpacifikaj insuloj, tre populara en tiu insulo, *Pandanus tectorius*.
- parlamentario\*: komisiite sendita reprezentanto dum batalo aŭ milito.
- Profinternio: Internacio de Profesiulaj Sindikatoj, aŭ Ruĝsindikata Internacio.
- puntilio\*: afero, kiu vive koncernas ies honoron.
- rankoro\*: obstina malpardonemo, vengema resento.
- rezidi\*: konstante kaj oficiale loĝi.
- rimorso\*: konscienciproĉo.
- scintili\*: stelbrileti.
- skoldi\*: riproĉadmoni.
- stajo\*: fortika ŝnuro, kiu streĉe tenas maston aŭ aliajn staraĵojn.
- stalinismo\*: venene deflankigita leninismo.
- stuporo\*: obstina senmoviĝo pro fortega surprizo aŭ timo.
- ŝamiseno\*: japana trikorda muzikilo, veninta de Okinavo, kie ĝi restas iom aliforma kaj nomata *zyapisen*.



ŝogio : japana ŝako kun 40 lignopecoj sur tabulo kun 81 kvadratoj.  
tennoo\* : japana imperiestro ; la aŭtoro intence diferencigas ĉi tiun  
de "mikado", kiu sonas tro fabela, kaj esence ne sama.  
trivi\* : eluzi.  
vori\* : avide manĝegi.

## Pri japanaj propraj nomoj

La aŭtoro esperantigis kelkajn loknomojn : Hiroŝimo, Jokohamo, Nagojo, Osako, Hokajdo kaj Okinavo, kiel Kioto aŭ Tokio. Li tamen konservis aliajn nomojn en la japana ortografio.

y (= j), w (= ŭ), sy (= ŝ), ty (= ĉ), zy (= ĝ), si (= ŝi), ti (= ĉi), tu (= cu) kaj zi (= ji) : ekzemple Hayasi (= Hajaŝi), Tuka-guti (= Cukaguĉi). Ĉiu vokalo estas mallonga, sed se supersignita (ô = oo) : ekzemple Tyô (= Ĉoo).

## POSTPAROLO

Ĉi tiun novelon aŭ romanon (laŭ William Auld, ĉar ĝi certe ampleksos pli ol 100 paĝojn) mi komencis verki jam frue. La unua ĉapitro “La kaptito” aperis sur “Monda Kulturo” (aŭtuno, 1962) kaj la dua “Antaŭ la 15-a de Aŭgusto” sur “Sennacieca Revuo” (1964), sed la sekvon mi povis apenaŭ finverki nur en la fino de 1975. Nome, mi konsumis pli ol 15 jarojn por tiu verko.

Kvankam mi restis obsedita de la temo kaj devonteco, ke mi nepre devas rakonti pri la batalo sur tiu insulo, tamen ĝis hodiaŭ mi vane baraktadis: mi komencis tajpi, sed tuj forlasis, komencis kaj forlasis... dum tiu tempo mi baraktis ne pro la malemo nek pro malvervo, sed io longe malhelpis min verki.

Miaflanke mi faris nenian kruelon al loĝantoj, kontraŭe, mi foje savis kelkajn vivojn ĝuste en kriza momento, jes, ne de la mano usona, sed de la japana. La japana armeo en sia krueleco neniom cedis al sia posteulo — la usona armeo okupanta tiun insulon — antaŭ la loĝantoj de tiu insulo, siatempe rigardata de multaj kvazaŭ duonkolonio.

Mi tamen estis soldato, kies amikoj aŭ samsortanoj, eĉ se devigite, aŭdacis turmenti insulanojn, kaj samtempe, plejmulto el ili devigite mortis, kaj mi mem — ve, foje konscie — devis silenti aŭ pretervidi tiajn kruelaĵojn.

Mia malkapablo kaj inerto foje eviti la realon ĉiam pli kreskis en tiuj longaj jaroj, dum diversaj raportoj aŭ denuncoj sekvis pli kaj pli, lastatempe preskaŭ inunde.

Kaj nun mi finverkis, sed mia koro ne estas liberigita. Mi devos ankoraŭ labori por verki la unuan parton, kiun mi rezignis ne nur pro la eldoneblo kaj konsidero pri la merkato, sed ankaŭ pro la supre menciita kialo: eviti rektan alfronton. Mi tamen dubas, ĉu mi iam povos. Ne nur pro mia aĝo. . .

Rigardi tiun ĉi novelon kiel pecon el mia propra vivhistorio, mi ne povas oponi, sed por tio, mi petas, oni sciu, ke en ĝi troviĝas multaj fikciaĵoj. Do mi devas aldoni, kiel oni kutimas en tia okazo: se kelkaj personaj nomoj koincidas kun la veraj aŭ historiaj, tio venis simple de hazardo.

Ĉi tie mi esprimas mian elkoran dankon al la Literatura Komitato de SAT, kiu afable kontrolis ĉion kaj donis multajn utilajn konsilojn, kiujn mi plejparte akceptis.

Kaj fine, mian plej grandan dankon akceptu mia amiko Huzisiro, la estro de Pirato, kiu tute ne konsideras la financon aferon kaj ĉiam penas por la bono de la

esperanta literaturo. Mi devas akcenti, ke oni nepre notu: nia literaturo kreskas kaj progresas ne nur per senlaca laboro de aŭtoroj, sed plejparte, eĉ ĉefe, per senkalkula sindediĉa laboro de volontuloj-eldonistoj.

La 15-an, februaro, 1976

La aŭtoro

## ENHAVO

1. La kaptito .....	5
2. Antaŭ la 15-a de aŭgusto .....	22
3. Okulon pro okulo kaj denton pro dento ...	40
4. Laborkampejo .....	64
5. "Venkis ne la japanoj!" .....	82
6. Krime kaj puno .....	112
7. Post la uragano .....	131
Glosoj .....	141
Pri japanaj propraj nomoj .....	143
Postparolo .....	144

エスペラント原作小説

Naskitaj sur la ruino — Okinavo —

---

1976年8月15日 発行

定価950円

著 者 宮本正男

発行者 藤城謙三

印刷所 天声社

---

発行所 ピラート社

559 大阪市住之江区御崎7-5-13

振替 大阪47493



Julio Baghy

**Aŭtuna foliario**

Broŝ. 5.50 gld.

Kolekto el la lastaj poemoj de Baghy, kun kelkaj pli fruaj.

NAGAYO Yosio

**Kristo el bronzo**

Trad. UEYAMA M.

Broŝ. 4.50 gld.

V. I. Lenin

**Ŝtato kaj revolucio**

Trad. G. Demidjuk

Broŝ. 4.80 gld.

Jen la epokfara studo de Lenin ; ĉirkaŭ tiu verko nun turniĝas la mondo kaj ankoraŭ en la estonto.

HASEGAWA Teru

**Flustr' el Uragano**

El la rezistomilito de Ĉinio kontraŭ japanaj imperiistoj, la aŭtorino flustre ŝkribis, alvokis la batalon por la mondopaco.

PIRATO